

CONFERENZE 141

LUDWIK ZAMENHOF
OKAZE DE LA CENTA DATREVENO
DE LA MORTO



ACCADEMIA POLACCA DELLE SCIENZE
BIBLIOTECA E CENTRO DI STUDI A ROMA



CONFERENZE 141

LUDWIK ZAMENHOF
OKAZE DE LA CENTA DATREVENO
DE LA MORTO

Aktoj de la kunveno
Romo, 11 decembro 2017



ROMA 2018



Eldonita de
ACCADEMIA POLACCA DELLE SCIENZE
BIBLIOTECA E CENTRO DI STUDI A ROMA
vicolo Doria, 2 (Palazzo Doria)
00187 Roma
tel. +39 066792170
e-mail: accademia@rzym.pan.pl
www.rzym.pan.pl

Eldondo financata de Accademia Polacca delle Scienze

Tradukado de la itala:

MICHELA LIPARI (TEKSTO DE F. A. PENNACCHIETTI)

NICOLA MINNAJA (TEKSTO DE REGGLANI)

Grafika projekto:

ANNA WAWRZYNIAK MAOLONI

Tecnika redaktado:

BEATA BRÓZDA

Enpaĝigo kaj presado:

EDO – JAKUB ŁOŚ

ISSN 0239-8605

ISBN 978-83-63305-62-8

E N H A V T A B E L O



MICHELA LIPARI

ENKONDUKO

➔ 7

FABRIZIO ANGELO PENNACCHIETTI

LA ZAMENHOF-OJ ANTAŬ LUDWIK ZAMENHOF

➔ 11

DAVIDE ASTORI

LA SOCI-POLITIKA ENGAĜIĜO DE ZAMENHOF

➔ 17

NICOLA REGGIANI

ZAMENHOF, ESPERANTO KAJ LA IDEO DE UNIVERSALA LINGVO

➔ 29

BERNHARD TUIDER

HISTORIO KAJ TUTMONDA DISVASTIĜO DE ESPERANTO

➔ 41

JAVIER ALCALDE

POLITIKAJ ASPEKTOJ EN LA HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO

➔ 55

CARLO MINNAJA

MONDA LITERATURO EN ESPERANTO, ESPERANTA LITERATURO EN LA MONDO

➔ 65

ALICJA SAKAGUCHI

KRITERIOJ POR LA KONSTRUO DE INTERNACIAJ PLANLINGVOJ

➔ 75

ILONA KOUTNY

DE LA PLANLINGVO DE ZAMENHOF ĜIS NATURE DISVOLVIĜANTA LINGVO:
ETAPOJ DE LA EVOLUO DE ESPERANTO

➔ 89

IDA STRIA

VIVANTA LINGVO. ĈU EKZISTAS UNUECA BILDO DE LA MONDO DE ESPERANTISTOJ?

➔ 99

FEDERICO GOBBO

CENT JAROJN POSTE: LA ZAMENHOFA FILOZOFIO KAJ ESPERANTO

➔ 107

ENKONDUKO

KIAL NI NE RAJTAS NE KONSIDERI NIN POLOJ

KIAM BENEDETTO CROCE VERKIS SIAN MALLONGAN ESEON EN 1942 pri la kialo, pro kiu ni ne rajtas ne konsideri nin kristanoj¹, certe li ne povis pensi, ke lia titolo estos paŭsita en la enkonduko al ĉi tiu bela libro, kiu estas densa, kiel densa estis la historio de ĉi tiu pola produkto, Esperanto, kiun ĉi tiu libro priskribas, ĉar ĝi estas sekvo al la kunveno “Ludwik Zamenhof 1859–1917” okazinta en Romo la 11-an de decembro 2017 okaze de la centjara datreveno de la morto de Zamenhof.

Tiuj, kiuj ne rajtas ne konsideri sin poloj estas la parolantoj de Esperanto, kiuj – ĉiuj – dum sia infaneco, tio estas dum la tempo, kiam ili lernis la lingvon, aŭdis pri Bjalistoko, pola urbo, kiu estis parto de la rusa imperio. Tio, kion vi lernas dum la infana aĝo, estas tio, kio poste restas ĉiam kun vi kaj iĝas parto de via DNA, kiel la tre fama frazo “Nos ancêtres les gaulois” [niaj prauloj, la gaŭloj], kiun ĉiu franca infano lernas la unuan tagon, kiam li renkontas la historion, kaj kiun instru-politiko imperiisma provis asimiligi ankaŭ de tiuj, kiuj en la francaj kolonioj ne havis iun ajn ligan kun gaŭlaj prauloj, kiel hironie rimarkis André Chamson en 1958².

Sed, por reveni al la parolantoj de Esperanto, post Bjalistoko ili plusekvas Zamenhof-on al Varsovio kaj poste ili legas la verkon *Sinjoro Tadeo (Pan Tadeusz)* de Adam Mickiewicz laŭ la majstra traduko de Antoni Grabowski

1] *La Critica*, LV, 1942 pp.289-297.

2] A. Chamson (1958) *Nos ancêtres, les Gaulois* (Gallimard).

de 1918 kaj ni haltu ĉi tie, ĉar ĉi tiu libro mem parolas pri la kialo de la titolo de ĉi tiu enkonduko.

La sukcesa kunveno de 2017 – organizita en Romo kunlabore inter la Pola Akademio kaj la Itala Esperanto-Federacio – konsistis el kuniĝo de kelkaj el la plej grandaj kleruloj pri la pluraj kampoj de tiu fako, kiun oni nomas esperantologio, kiu rilatas al la lingvaj, literaturaj, historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la fenomeno Esperanto, la lingvo, kiu estis deklarita nemateria heredaĵo de la pola kulturo kaj kies “instruadon” Unesko, per la vortoj de ĝia ĝenerala direktorino “subtenas...de multaj jaroj”.

Efektive unu aro da kontribuoj al la kunveno kaj nun al ĉi tiu libro rilatas al la bazaj valoroj, kiuj estis ĉe la komenco mem de la naskiĝo de Esperanto. Krom la tre ĝuebla “La Zamenhofoj antaŭ L. L. Zamenhof” de Fabrizio Angelo Pennacchietti, Nicola Reggiani, Federico Gobbo kaj Davide Astori parolas ĝuste pri ĉi tiu temo. Zamenhof estis granda homo kaj granda judo, ĉar li kapablis transiri siajn limojn de homo de la fino de la 19-a jarcento kaj de judo. Li parolis pri homaj rajtoj pli ol kvardek jarojn antaŭ la universala deklaro de homaj rajtoj³ kaj li ĉiam rifuzis naciismajn difinojn, li rifuzis partopreni la kongreson de la Tutmonda Asocio Esperantista Hebrea en 1914 en Parizo, kiam li skribis: “Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel nature sindefenda ago – estas multe pli pardoninda ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta”⁴.

Bernhard Tuidier rakontas la historion de la disvastiĝo de Esperanto. De revo de knabo en Bjalistoko al lingvo parolata de pli ol du milonoj da homoj de Romo al Pekino kaj Rio de Ĵanejro kaj pli malproksime. Bonvolu atenti: iuj parolas pri la kutimaj troigoj de esperantistoj rilate al la nombro de parolantoj, sed se temus pri troigoj, kiel ni povus klarigi la uzon de Esperanto por sia infoma laboro fare samtempe de Vatikano kaj Ĉinujo, kiuj certe ne estas konataj pro sia ”malŝparo” de rimedoj. La vero estas, ke de kiam oni uzas la interreton neniu plu scias, kiom efektive estas la Esperanto-parolantoj. Oni nombras cent homojn ĉiutage, kiuj finas sian retan kurson de Esperanto ĉe *Duolingo*, usona reta ejo, kiu estas vaste sukcesa.

Javier Alcalde siaflanke donas interpreton al tiu historio kaj parolas pri la politikaj aspektoj de la movado por Esperanto. Zamenhof pli interesiĝis pri la interfratiĝo de popoloj ol pri la akuzativo de movo kaj dum la tuta vivo li batalis (sen aparta sukceso) kontraŭ tiuj esperantistoj, kiuj volis vidi en Esperanto nur tehnikan ilon por faciligi la komercajn interrilatojn. Ĉi tio

3] <http://www.steloj.de/esperanto/paroloj/kongr2a.html>

4] Z. Maimon (1978), *La kaŝita vivo de Zamenhof*, Japana Esperanto-Instituto: Tokio

nepre revokas al nia menso tiun vicon tre multenombrian hodiaŭ, kiu parolas pri la neinfekta angla kiel interlingvo (*ELF*= *English as Lingua Franca*), lingvo, kiu estas nur teĥnika ilo, kiu ne kunportas valorojn, kiu estas elŝirita de la denaskaj parolantoj “funkcie difinita de ĝia uzo en interkultura komunikado pli ol formale de la rilato al la normoj de la denaskaj parolantoj [nia traduko].⁵ Sed tamen la movado por Esperanto estas tiom politika, kaj ĝi transportas valorojn tiom revoluciajn, valorojn pri egaleco lingva-kultura inter popoloj grandaj kaj malgrandaj, civilizitaj kaj necivilizitaj, bomb-ĵetantaj kaj bomb-alĵetataj, ke reĝimoj kontraŭaj al ĉi tiuj valoroj ĉiam batalis kontraŭ ĝi. Se Hitler en Germanujo metis esperantistojn en koncentrejojn kaj Franko en Hispanujo dum la intercivitana milito pafmortigis ilin, se Stalin timis iliajn rilatojn kun fremduloj kaj la japana polico arestis ilin, politika motivo ja devis esti.

Alia granda studolinio de ĉi tiu libro rilatas al la aspektoj pli rekte lingvaj. Unue estas Alicja Sakaguĉi, kiu pritraktas la principojn de konstruado de artefaritaj aŭ pli ĝuste planitaj lingvoj, dum Ilona Koutny en vasta prezento de tratempa lingva historio montras al ni, ke la transformiĝo de projekto de internacia lingvo al lingvo vere uzata de komunumo de parolantoj ne estas io memkompreneble okazanta kiel pruvas la fakto, ke inter la centoj da projektoj, de la unuaj provoj reguligi la latinan dum la renesanco ĝis la lingvoj inventitaj por uzo en filmoj de sciencfikcio, kiel la *kelingon-a*, neniu sukcesis imiti la vojon de Esperanto, kiu nuntempe havas eĉ familiojn, en kiuj Esperanto estas la hejma lingvo instruata al la infanoj.⁶

Ida Stria, de la universitato de Varsovio, analizas la kulturon de esperantistoj, kaj ŝi sekvas stud-fadenon, kiu reiras almenaŭ ĝis la germana lungvisto Wilhelm von Humboldt⁷ kaj kies plej konataj reprezentantoj en la dudeka jarcento estas la usonanoj E. Sapir kaj B.L. Whorf.

Laŭ la verkanto de ĉi tiu enkonduko, kiu ĉiuokaze kredas je malforta versio de la teorioj de Sapir-Whorf, la studoj en ĉi tiu kampo estas ankoraŭ ĉe la komenco kaj ne ekzistas multaj pruvoj pri la influo de la lingvo Esperanto je la mond-bildo de la parolantoj de Esperanto, kiuj estas ĉiuj parolantoj ankaŭ de nacia lingvo, uzata pli ofte en la ĉiutaga vivo, kaj pro tio la problemoj,

5] Hülmbauer, Cornelia et al. 2008 “Introducing English as a lingua franca (ELF): Precursor and partner in intercultural communication.” *Synergies Europe* 3, 25-36. p.27 <http://ressources-cla.univ-fcomte.fr/gerflint/Europe3/hulmbauer.pdf>

6] https://en.wikipedia.org/wiki/Native_Esperanto_speakers

7] *The Heterogeneity of Language and its Influence on the Intellectual Development of Mankind* (orig. *Ueber die Verschiedenheit des menschlichen Sprachbaus und ihren Einfluss auf die geistige Entwicklung des Menschengeschlechts*). 1836. New edition: *On Language. On the Diversity of Human Language Construction and Its Influence on the Mental Development of the Human Species*, Cambridge University Press, 2nd rev. edition 1999

ĉu la maro esta verda, kiel por kimroj (kaj D'Annunzio en la poemo "La paŝtistoj": "*scendono all'Adriatico selvaggio/che verde e' come i pascoli dei monti*" = ili malsupreniras al sovaĝa adriatika maro/kiu estas verda kiel la montaj paŝtejoj⁸⁾) aŭ blua kiel por multaj aliaj, ankoraŭ ne estas konsente solvita por la parolantoj de Esperanto.

Fine pri la literaturo en Esperanto parolas Carlo Minnaja unu el la plej kompletaj literaturistoj ekzistantaj nuntempe inter la parolantoj de Esperanto, kies produktado de tradukoj de Esperanto al la itala kaj en la mala direkto estas giganta. Efektive la titolo de lia kontribuo ne povus esti pli kompleta. Li parolas pri monda literaturo en Esperanto kaj pri literaturo originale en Esperanto kaj poste tradukita al la pluraj lingvoj de la mondo. Ni parolis komence de ĉi tiu enkonduko pri la pola *Pan Tadeusz*, kiu komence de la pasinta jarcento estis tradukita al Esperanto kaj estas ankoraŭ nun legata en la tuta mondo en tiu versio. Sed, kiel Carlo Minnaja montras, ĉiuj ĉefaj literaturaj verkoj de pluraj popoloj grandaj (anglalingvaj aŭ ĉinoj) al la malgrandaj (estonoj aŭ kartveloj) estis tradukitaj al Esperanto kaj multaj el ili poste plutradukitaj al naciaj lingvoj, dum verkoj origine en Esperanto estis tradukitaj al la itala aŭ al dekoj da aliaj lingvoj.

Michela Lipari

8] <https://www.pensieriparole.it/poesie/poesie-d-autore/poesia-27837>

LA ZAMENHOF-OJ ANTAŬ LUDWIK ZAMENHOF

LERNINTO KAJ UZANTO DE ESPERANTO, KIU, PERE DE TIU LINGVO, spertis la liberigan senton fariĝi kreiva protagonisto de sia lingva esprimado, sendepende de la modelo de lia gepatra lingvo aŭ de la fremda lingvo kiun li lernis, plejofte nutras por Ludoviko Lazaro Zamenhof aparte fortan dankemon kaj estas ravita de lia plurfaceta figuro.

Fakte Zamenhof povas ravi laŭ diversaj aspektoj: krom kiel genia “lingvo-forĝisto” (gramatikisto kaj leksikografo de planlingvo), larĝan parton de la imago, kiun flegas pri li la esperanto-parolantoj en la tuta mondo, okupas lia originala kaj malavara kontribuo kiel verkisto (poeto, prozisto kaj tradukisto), kiel pensulo kaj filozofo, kaj ne laste, kiel reformisto kaj vivo-majstro.

Trans la fizika, morala kaj intelekta figuroj de Zamenhof, alia aspekto, kiu impresas kelkajn esperanto-parolantojn estas eĉ lia familinomo, kiu povas aperi ekzotika kaj sone kaj skribe.

Ĉu ĝi estas germana familinomo? Tiam, kiel kongruas la komenca litero Z? Scipovanto de la germana lingvo rimarkus ja, ke tiu familinomo devus skribiĝi *Samenhof* se ĝi aludas loknomon signifantan “etbieno de la semoj”. Ekspliko de tiu problema Z anstataŭ S estas do ke tia familinomo estis uzata en medio, nome en pola medio, ne devigata obei la ortografiajn regulojn de la germana lingvo. En tiu medio tamen oni fidele reproduktis la germanan elparolon de vortkomenca litero S antaŭ vokalo. Tion oni faris uzante la literon Z de la latinliteraj slavaj alfabetoj, kiu fakte indikas voĉan frikativan dentalon.

La germana karaktero de la familinomo de la iniciatinto de Esperanto pensigis, ke liaj patroflankaj antaŭuloj devenis de Germanio aŭ de Kurlando, en nuntempa Latvio, regiono kie mezepoke setlis saksoj. La familinomo Zamenhof montriĝis tamen esti relative freŝdata, kiel klarigas la polaj aŭtoroj Zbigniew Romaniuk kaj Tomasz Wiśniewski en la volumo *Zaczęło się na Zielonej. O Ludwiku Zamenhofie, jego rodzinie i początkach esperanta*, Łódź 2009 (kun samvoluma kompleta traduko en Esperanton: *Ĉio komenciĝis ĉe la Verda. Pri Ludoviko Zamenhof, lia familio kaj la komenco de Esperanto*).

En la jaroj 1803 kaj 1807 la burokrataj instancoj de Orienta Prusio, kiuj tiam administris ankaŭ Podlaĥion, regionon situantan en la nord-oriento de Pollando landlime kun Belorusio, devigis pro fiskaj kialoj la lokajn judojn alpreni germanan familinomon anstataŭ la kutiman patronomon en la jida lingvo. Tial Zeev (germane Wolf, “lupo”), la praulo de la Zamenhof-familio, ricevis tiam familinomon, tiam memkompreneble skribitan *Samenhof*. Verŝajne en tiu tempo Zeev loĝis en vilaĝo de norda Podlaĥio inter nuntempa Pollando kaj Litovio. Same verŝajne li okupiĝis pri la revendo de semaro. En dokumentoj datitaj post 1836 kaj verkitaj aŭ ruse aŭ pole, lia familinomo estas skribita fonetike Zamenhof, kiel pruvas naskiĝatesto datita la 27-an de januaro 1837, kiu koncernas Motel, alidirite Mordche (Mordeĥajo), la patron de L.L. Zamenhof. Mordche en 1871 aliigis sian propran judan nomon en la nejudan paralelformon Marek (Marko).

La ĵus menciita naskiĝatesto pruvas, ke la familio Zamenhof tiam loĝis en Suwalki, apud la nuntempa landlimo inter la rusa enklavo de Kaliningrado (iam Königsberg) kaj Litovio. Ĝi krome atestas, ke la patro de Motel naskiĝis en 1807 kaj nomiĝis Fajwel aŭ Fajba (neĵude Fabian) Wolfowicz Zamenhof. Fajba estis do la filo de Zeev, alidirite Wolf. La dokumento sciigas ankaŭ, ke Fajba, la patra avo de Ludoviko Lazaro, en 1837 estis 30-jaraĝa, ke li estis analfabeto kaj ke li vivtenadis sin kiel “revendisto” sur la placa merkato de Suwalki. La propra nomo Fabian estis al li postmorte donita en 1861 fare de lia filo Marek, kiu per tiu nejudaj formo volis oficiale registri la nomon de sia patro.

La figuro de Marek estos decida en la historio de la Zamenhof-oj, ekzempla historio por kompreni la sociajn ŝanĝojn okazintajn en Pollando en la dua duono de la 19-a jarcento, ne nur koncerne la judan komponanto de la pola popolo. La tuta vivo de Marek Zamenhof spegulas fakte la ascendon al la klera kaj civitane engaĝita burĝa klaso de Pollando fare de socie margenaj homoj kiel la filoj de analfabetaj kolportistoj.

La patro de Marek, konstatinte lian rimarkindan inklinon al studo, permesis al li vizitadi privatan judan lernejon en litova urbeto, probable en Raseiniai apud Kaunas. Oni rakontas, ke en 1849 la entreprenema, tiam 12-jaraĝa,

Marek jam liveris al siaj samlernejanoj ripetadon de la lecionoj. Intertempe lia patro Fajba decidis, ke lia unua filo, Josel Wolf, lin helpu en lia modesta komerca aktivado.

Jam en jaro 1853 la tuta familio Zamenhof, nome Fajba, lia edzino Rajna Percowna, la filo Josel, la filino Pesia o Peszka (n. 1834), Marek mem (n. 1837), la du filinoj Riwka (n. 1839) kaj Perla (n. 1843) kaj la lasta filo Lejzer, trasloĝiĝis en Tykocin, industrieman urbeton situantan je proksimume 30 km nord-okcidente de Bialystok ĉe la rivero Narew. Tie prosperis granda juda komunumo kun antikva kaj impona sinagogo. Sur la ĉefa strato de Tykocin, ne malproksime de la sinagogo, bela bronza epigrafo memorigas kaj pollingve kaj en Esperanto pri tiu loĝperiodo de la familio Zamenhof.

Guste en la sinagogo de Tykocin, jam en decembro 1853, oni oficiale legis la anoncon, ke Pesia aŭ Peszka (nejude Paulina), la unua fratino de Marek, edziniĝos kun la vidvo Aron Szwarcenberg (n. 1816) printempe de 1854 en la sinagogo de Łomża. Evidentiĝas, ke Paulina scipovis skribi nek pole nek jide nek hebree; male lia edzo instruis en lernejo por judaj geinfanoj unue en Varsovio, poste en Łomża. Tre verŝajne Aron Szwarcenberg ludis decidan rolon en la klerigo de Marek. Tiu, post vizitado de nejudaj duagradaĵoj, sukcesis en la ekzameno por eniri en universitaton. Tio ebligis al li lerni pedagogion en la universitato de Moskvo.

Malgraŭ ke formale ĝis jaro 1866 la multnombra familio Zamenhof estis registrita en la komunumo de Tykocin, en 1857 ĝi jam transloĝiĝis en la apudan urbon Bialystok. Tiam Bialystok plene apartenis al Rusio, dum Tykocin male apartenis al la Pola Reĝlando, superregata de Rusio. En Bialystok, antaŭ la jaro 1870, la familinomo de la Zamenhof-oj estis strange skribata *Zamenov*, dum en la cirila alfabeto ĝi aperis kiel Заменгоф kaj per la literoj de la hebrea alfabeto kiel ך ם ן ן ן ן ן ן ן ן <z m nh f>.

Tiutempe en Bialystok loĝis 16.500 homoj, el kiuj 2/3 estis judoj, 1/5 katolikaj poloj, 1/20 germanaj protestantoj kaj 1/27 ortodoksaj belorusoj. La oficiala lingvo de la urbo estis la rusa. Pro ĝia rimarkinda industria produktivo, aparte en la kampo de teksaĵoj, Bialystok nel 1862 jam posedis fervojan kunigon kun Varsovio kaj Sankt-Peterburgo.

Transloĝinte en tiun urbon kaj jam malsaniĝinte, Fabian transdonis sian komencan aktivadon en la manojn de Josel. Tiu en 1857 edziĝis kun Sora Ickowna Wiernicka kaj generis 8 gefilojn, el kiuj la plej juna, Lejzer, estis 10 monatojn pli juna ol L.L. Zamenhof, kun kiu li kunpartigis la propran nomon. La kuzo Lejzer konvertiĝis al ortodoksa kristanismo, kaj, elmigrante al Kanado, alprenis la nomon Louis Samenhof.

Inter 1858 kaj 1859 ankaŭ Marek, apenaŭ 23-jaraĝa, edziĝis. Lia edzino, Liba Rochla (nejude Rozalia), filino de Szolom Sofer, estis tiom pia kaj kulture

modesta, kiom Marek estis klera, intelekto verva, agnostika kaj egoisme kalkulema, se ne oportunisma.

Ĝis 1862 li laboris kiel librotenisto kaj privata instruisto por la gefiloj de riĉa juda familio de la urbo. Poste, kune kun aliaj instruistoj, li kreis instruejon kun dujara lernoprogramo por judaj knabinoj, en kiu la tradicia religia instruado paralelis kun la instruado de “profanaj” lernotemoj. Montrinte esti fidinda regnante de la Rusa Imperio post la ruiniga pola ribelo de januaro 1863, Marek estis akceptita kiel instruisto de la germana lingvo kaj de geografio en ŝtata lernejo.

La unuenaskito de Marek., Ludoviko Lazaro (Ludwik Lejzer), kiel konate, naskiĝis en Białystok la 15-an de decembro 1859. Fajba, lia patroflanka avo, mortis la 28-an de marto 1861. En 1862 naskiĝis la fratinoj de Ludoviko Lazaro Fejga, alinomite Gitla (nejude Augusta; 1864) kaj Sora Dwora (1866), la fratoj Fabian (1868), Hersz (1870) kaj Grzegorz (1871), kaj la fratino Minna (1872). Post la transloĝiĝo de la familio Zamenhof en Varsovion, Marek plue generis la filojn Leon (1875) kaj Aleksander (1877) kaj la filinon Ida (1879).

En Varsovion Marek Zamenhof transloĝiĝis en 1868, apenaŭ la caro Aleksandro la Dua allasis al la ruslandaj judoj elmigri en la tiel nomitan Polan Reĝlandon sen peti la koncernan rajtigon. En Varsovio Marek mortis en 1907. En 1873 L.L. Zamenhof, tiam 13-jaraĝa, kaj la resto de la familio rekuniĝis kun Marek en la pola ĉefurbo. Tie Marek, kunlaborante kun la rusa reĝimo, baldaŭ fariĝis instruisto de la germana lingvo ĉe la Veterinara Instituto kaj ĉe la Gimnazio-Liceo de Varsovio. Nur du aliaj judoj ricevis la rajton instrui en tiom prestiĝaj lernejoj. Krome, komisiite de la rusa povo, Marek laboris kiel cenzuristo de la publikaĵoj verkitaj en la hebrea kaj en la jida lingvoj.

Lia rango kiel ŝtata funkciulo estis egalvalora kun tiu de oficiro de la pola armeo kaj tial li ricevis la privilegion porti spadon. Ĉiel ajn Marek ne damaĝis siajn fortojn por garantiĝi al siaj gefiloj la plej bonan lerneblecon, obstine strebante li, filo de analfabetoj, al projekto de antaŭenigo de la propra socia stato, al kiu li aspiris ekde sia knabeco.

Ne nur Marek insistis, ke Ludoviko Lazaro eniru en la kuracistan karon vizitante la universitaton de Moskvo (1879-1881), kie li mem siatempe studis, sed li financis ankaŭ la studojn de Fabian (m. 1933), kiu fariĝis apotekisto, kaj de Grzegorz (m. 1932), kiu fariĝis dermatologo. Otorinolaringologo fariĝis siavice Leon (m. 1934), kaj ankaŭ Aleksander (m. 1916) aktivis kiel kuracisto.

Preskaŭ nenion oni scias pri la familioj de la parencoj de L.L. Zamenhof, kiuj restis en Białystok. Lia onklino Riŭka en 1860 edziniĝis kun la samurbano Benjamin Fridman. Male lia onklino Paulina Szwarzenberg jam de longe

transloĝiĝis kune kun sia edzo en Varsovion. En la tombejo de Bialystok plustaras la tomba ŝtono de la edzino de Josel, Sora Ickowna Wiernicka, kun epigrafo.

Tiuj ĉi estas la nomoj de la Zamenhof-oj antaŭtempaj aŭ samtempaj kun Ludoviko Lazaro. Ili portis maloftan familinomon, kiun preskaŭ forviŝis la naziisma furiozo, sed kiu nun estas universale konata, honorata kaj primemorata en ĉiu parto de la mondo per titolado de stratoj, placoj, pontoj, florgardenoj kaj montetoj, de insulo en Danubo kaj eĉ de asteroido de la Themis-familio. Nuntempe la familinomon portas la posteuloj de Adam (1888-1940), filo de Ludoviko Lazaro, okulisto kiel lia patro, murdita de la naziistoj. Temas pri Louis- Christophe Zaleski-Zamenhof (n. 1925) kaj liaj gefiloj.

Samurbano kaj samaĝano de Marek estis la patro de Leo Wiener. Tiu ĉi estis usona historiisto, lingvisto, verkisto kaj tradukisto, naskiĝinta en Bialystok en 1862 kaj samliceano de Ludoviko Lazaro en Varsovio. Aktiva esperantisto, Leo Wiener estas rigardata kiel pioniro de *Lingvo universala*, la projekto de pra-Esperanto, kiun la 19-jaraĝa Zamenhof prezentis al siaj familianoj kaj amikoj la 17-an de decembro 1878. Filo de Leo Wiener estis Norbert Wiener (1894-1964), la “patro” de moderna kibernetiko. Tio estas alia paralela historio, samgrade ekzempla pri la elaĉeto elde kultura subalterneco kaj pri la plibonigo de la socia stato, kiuj en la dua duono de la 19-a jarcento koncernis vastajn sektorojn de la pola popolo.

LA SOCI-POLITIKA ENGAĜIĜO DE ZAMENHOF

Estus pli prudente, se mi silentus, sed mi ne povas.

(L.L.Zamenhof, el la “Vortoj de lasta konfeso”)

LA ZAMENHOFA PROGRAMO PRI UNIVERSALA LINGVO PREZENTIĜAS MULTĜE pli aranĝita kaj kompleksa ol oni povus supraĵe kredi. La ideo de privilegia komunikilo por la homaro estintus, en la okuloj de lia iniciatinto, nur la unua paŝo al pripensado tre pli ambicia: Esperanto estintus nur viatiko por la kontribuo al kreado, en la mondo, de komuna kulturo, de komuna sento, de komuna celo. La historiisto de la esperantista movado Edmond Privat estis samopinianta pri la fakto ke

krei novan lingvon estas kvazaŭ iniciati novan religion¹

asertante ke iu etika motivo estis je la bazo de la origina movado: same kiel *ponto-lingvo*, ankaŭ protektante la denaskajn, kontribuus al plibonigo de komunikado en la mondo, tiel *ponto-religio*, en la samaj termoj de Esperanto, helpus al progreso de la Homaro.²

1] Privat E. *Historio de la lingvo Esperanto. Parto I: Deveno kaj komenco 1887-1900*, Internacia Esperanto-Instituto, The Hague 1982 [1923], p. 10.

2] En unu el siaj lastaj projektoj (profeta, oni dirus, per la okuloj de la posteuloj) L.L. Zamenhof (v. “Projekto de Kongreso pri neŭtrale-homa religio”. *Teknika Revuo* 9 (gen.-feb. 1918), pp. 8-14, progetto in data 18 ott. 1914, giunto alla rivista il 4 gen. 1918) asertas sian volon diskuti, ene de kunveno, la ‘neŭtrale-homan religion’, dirante: “La plej granda disigilo de la homaro kaj sekve ankaŭ la plej granda malfeliĉo de la homaro estas la diverseco de la lingvoj kaj religioj de la homoj. Sed dum la lingvo ordinare disigas nur landon de lando, la religio disigas la filojn de la sama lando kaj subtenas inter ili konstantan malamon kaj malamikecon. La *lingvo* disigas nur *mallongatempe*,

La projekto, kiu en la tro profana rondo de Esperanto estis difinita per formulo ambigua kaj nekohera pere de la *Interna ideo*, formiĝis ĝuste post malmulte da jaroj, per la teorioj de la *Homaranismo* kaj de la tuta produktado kiu preparis ĝian kulturen grundon (*tutunue* la *bilelistan* prikonsideron) kaj kiu sekve evoluigis ĝin. Tiu projekto naskiĝis kiam Zamenhof estis juna kaj ĝi akompanis Lin dum lia tuta vivo: ĝis la jaro 1901 la *bilelismo*³ (poste *homaranismo*) estas tute certe sekreta plano de Zamenhof, kiu timis ke lia religia kaj filozofia projekto estus malhelpanta la naskiĝantan esperantistan movadon. Ke la filozofia kaj morala projekto de la fondinto estis pli grava ol tiu lingva estas tute sendube. Zamenhof mem, en letero de la 21-a de februaro 1905 al la amiko Micheaux, asertas:

Mi de la plej frua infaneco fordonis min tute al unu ĉefa ideo kaj revo – al la revo pri la unuigo de la homaro. Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo – pri la tuta cetera parto mi ne ĉesas pensi kaj revii; kaj pli aŭ malpli frue... , kiam Esperanto jam ne bezonos min, mi elpaŝos kun unu plano, por kiu mi jam de longe prepariĝas ... Tiu ĉi plano (kiun mi nomas *Hilelismo*) konsistas en la kreado de morala ponto, per kiu povus unuigi frate ĉiuj popoloj kaj religioj...⁴

ĉar ĉiu nova enmigrinto baldaŭ alproprigas al si la lingvon de sia nova patrujo; se malsameco de lia religio kaj sekve ankaŭ de liaj familiaj moroj kaj tradicioj ne subtenas en li kaj en lia familio la konstantan senton de genta aparteco [...]. En aŭgusto de la jaro 1915 ni intencas aranĝi en unu el la urboj de Svisujo kongreson por la kreo de neŭtrale-homa religio[...]. Por plifaciligi kaj ordigi la laboron de la kongreso, la Organiza Komitato prezentos al la kongreso la malsupre donitan projekton de principaro, kiun ĝi konsilas akcepti kiel *bazon* por la estonta neŭtrale-homa religio. Pri ĉiu paragrafo de tiu projektata bazo estos aranĝita detala diskuto kaj voĉdono, post kiuj en la projekto estos faritaj ĉiuj ŝanĝoj, elĵetoj aŭ aldonoj, kiuj montriĝos utilaj, kaj tiam estos fiksita la definitiva formo de la religia bazo”.

- 3) La nomo rilatas al Rabeno Hillel, Judisma doktoro vivis en la fino de la Komuna Erao, proponanto de malfermita vizio de la leĝo kiuj – laŭ fama anekdoto – estas resumitaj en la maksimumo “kion vi ne deziras por vi mem, ne faru al via najbaro” tiel simila al la preskaŭ nuntempa, sed iom posta, evangelia aserto. Sekvante la kernon de la formulado de Hillel, la unua Zamenhof (ankoraŭ profunde interesiĝanta pri la juda problemoj kaj, laŭ Gobbo 2005, kaj identiganta ĝuste en Hillel la esencon de plej vera monoteismo: vid. Talmudo *Ŝabato* 31A) proponas esencan religion kiu estu malfermata kaj universala, malkiel la malnova religio nacikarakterata. La ritojn oni povas konservi, opinias la Nia, ĉar ili fortigad popularan partoprenon, kondiĉe ke ili ignoru dogmatismen. Mallonge, valoras la devizo de Hillel kaj ĉiuj ceteraj estas komento. Pri la personeco de Hillel indas referenci almenaŭ al la Encyclopaedia Hebraica kie aperas lia bibliografio. Resumitas en Zamenhof 1901a la principoj kiuj ampleksis la hilelistan periodon: 1. Ni sentas kaj perceptas la ekziston de pli alta forto, kiu regas la mondon, kaj tiun forton ni nomas Dio. 2. Dio metis siajn leĝojn en la koro de ĉiu homo en la formo de konscio; tial ĉiam obeu la voĉon de via konscienco, ĉar ĝi estas la voĉo de Dio, kiu neniam silentas. 3. La esenco de ĉiuj leĝoj donitaj al ni de Dio estas esprimita per la formulo: amu vian proksimulon kaj agu kun la aliaj samtiel, kiel vi volus ilin agu kun vi.
- 4) Tiu ĉi ideo ke “la lingvo en si mem estas nur lingvo, tamen, ke ĝi estas nacia kaj internacia, ĝi kaŝas en si mem difinitajn sentojn, ideojn kaj celojn” (kiel oni klarigas en la klasika difino de ‘interna ideo’ eltirita de la klasika *Enciklopedio de Esperanto* de Kőkény–Bleiber, 1933, reprenita en Chiti-Batelli

Ankaŭ se parte kaŝitaj, al la esperantistoj mem, la originoj kaj idealoj de Esperanto, inter la dramo de du tutmondaj militoj kaj la freneza evoluo de la mondo, tiu ĉi tutmondiga klopodo antaŭtempa vidigas, filigrane, iun supozitan matricon de libera penso.⁵ La pli kulturaj aspektoj de tolero, internacieco, frateco tipaj de tiu mondvidpunkto, kiuj emergis pli ĝenerale el la parolado, troviĝas en la *Dogmoj de la Homaranismo*, kiuj aperas en la numero de februaro 1906 de *Ruslanda Esperantisto* sub pseŭdonimo, prezentante sin kiel unu el la tekstoj plej pridebatitaj de la Majstro. Konformiĝante al la konceptoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco kaj intencante lokigi sur tute saman nivelon la kredojn de ĉiuj homaj estaĵoj, esperante atingi la realigon de iu universalismo, kiu povos garantiĝi pacon, prosperon kaj bonstaton al la tuta homaro, en Boirac 1909 s.v. la homaranismo estas tiel difinita:

politika-religia doktrino, iniciatita de Zamenhof por servi kiel ponto inter la liberpensuloj el ĉiuj komunumoj

aŭ ankoraŭ en PIV 447⁶:

doktrino postulanta, ke ĉiu rigardu kaj amu ĉiulandajn homojn kiel siajn fratojn

Johannes Dietterle, editoro de *Originala Verkararo* (OV), publikigis la tutan koncernan materialon (tie, pp. 312-343) aldonante, interalie, la sekvan komenton:

1999: 69), estas bone atestita de la etoso de la Kongreso en 1906, en kies antaŭparolo Zamenhof interalie asertis: “[...] al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi kredo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi kredo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano [...]”. Tiu ĉi etiko-mistika inspiro akompanis Zamenhof ĝis la lastaj vivojaroj, kiel atestas la filo Adam (Zamenhof 1960: 39): “La ideo de homaranismo multe okupis mian patron en tiu ĉi epoko. Li revis pri fondiĝo de neŭtrallingva kulturejo, kie la adeptoj de la pure homa etiko povus kuniĝi por diskuti pri diversaj demandoj. Dume li intencis aranĝi akcepttagojn por tiu ĉi celo. La simpatiuloj de la ideo kolektiĝus por amikaj interparoladoj por ekzerci la koron kaj la spiriton”.

5] Vidu MORAMARCO 1995: 354, kiu resumis, enkondukante la ĉapitron “Framasonismo kaj lingva frateco: framasonaj kontribuoj al la esperanto lingvo”: “Unu el la kosmopolitaj agadkampoj kie rekta interveno de unuopaj framasonoj pli vigle aŭdiĝis, estas sendube la lingva, aparte ĉirkaŭ la Esperanto-projekto, kiu ekde 1889 katalizas la energion de multaj – kvankam minoritato – “ĉivitanoj de la mondo”, engaĝitaj por realigi operacian simbolismon – krom semiotikan proceduro – de lingvo, celanta restarigi, per “radikala” komuneco serĉata en la diasporo de idiomoj kaj poste kondensata en struktura kanvaso surbaze de kriterioj de racieco, simpleco kaj kreivo, “la antaŭprebabela kondiĉo de interhoma komunikado”.

6] <http://vortaro.net/>.

La tre ideala homaranisma ideo okupis lin dum lia tuta vivo, kaj kiel ŝajnas al mi por li estis ankoraŭ pli grava, ol la tuta ideo de internacia lingvo, kiu evidente servis al li nur kiel vojo al la ideala celo, kiun li esprimis per la preskaŭ sinonimaj vortoj ‘hilelismo’ kaj ‘homaranismo’.

La plej singardaj asertoj – petitaj pli ofte de la esperantistaro de la unuaj tempoj ol de liaj timoj – ke la homaranista idealo “prezentas mian unike privatan kredon” kaj “proponas nur nedefinitan senton de frateco kaj de espero” (OV 339), estas alimaniere esprimitaj en formoj malpli mildaj: por “ebligi justecon kaj fratecon inter la popoloj” nepras superi ĉiun naciismon, partikularismon kaj diskriminacion, startigi universalan lingvan kaj religian kaj moralan fundamenton por la tuta homaro, kaj, en tio ĉi, hilelismo/homaranismo “estas strikte kunligitaj kaj nedisigeblaj: kiel la hilelismo ne povos ekzisti sen iu ajn neŭtrala lingvo, tiel la ideo de neŭtrala lingvo neniam povos realiĝi sen la hilelismo” (OV 323).

De la antaŭparolo de la *Dogmoj* emerĝas ekde la komenco la ŝlosilaj temoj:

La Homaranismo estas celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco.

La ideo de homaranismo naskiĝis de la antaŭe ekzistinta ideo de “hilelismo”, de kiu ĝi distingiĝas nur per tio, ke la hilelismo koncernis nur unu homan grupon, dum la homaranismo koncernas ĉiujn popolojn kaj religiojn.

La homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religianaro, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komuniĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neutrale-homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco.

La homaranoj esperas, ke per konstanta reciproka komuniĝado sur la bazo de neutrale lingvo kaj neutralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neutrale-homan popolon, sed tio ĉi fariĝados iom-postiom, nerimarkate kaj sen ia rompado.

Longan tempon la iniciatoroj de la homaranismo ne kuraĝis precize formuli siajn dogmojn, timante, ke tio, kio teorie ŝajnis bona, en la praktiko eble montriĝos neplenumbla. Sed en la jaro 1905 okazis io, kio neniigis ĉiujn dubojn. En Augusto 1905 en la franca urbo Boulogne-sur-Mer havis lokon la unua tutmonda kongreso de esperantistoj, kies sukceso superis ĉiujn atendojn. Pli ol mil homoj, kiuj alveturis el la plej diversaj landoj de la tuta mondo kaj apartenis al 22 diversaj popoloj kaj al la plej diversaj religioj kaj filozofiaj sistemoj, en la daŭro de tuta semajno vivis kune en la plej sincera amikeco kaj frateco, parolis inter si ekskluzive nur en neutrale internacia lingvo, konfesis religiajn principojn nur neutrale-homajn. Kiu audis la

multenombrajn parolojn kaj diskutojn en la vasta kaj plenigita konstruaĵo de la kongreso, kiu ĉeestis en la teatraj prezentadoj, en kiuj la auskultantoj kaj plenumantoj prezentis per si miksaĵon de ĉiuj gentoj kaj popoloj, kiu vidis tiun plenan senĝenecon kaj tiun kortuŝantan fratecon, kiu regis inter ĉiuj partoprenantoj de la kongreso, tiu al si mem ne kredis, ke ĉiuj tiuj homoj ankoraŭ hieraŭ estis tute fremdaj unuj al la aliaj, ke ilin unuigis nur neutrala lingvo kaj ke tiuj kelkaj semajnoj, kiujn ĉiu el ili dediĉis por la lernado de la fable facila neutrala lingvo, faris miraklon kaj, deŝirante neniun de lia natura patrujo, lingvo au religiaro, donis al homoj de plej diversaj gentoj kaj religioj la eblon vivi inter si en la plej paca kaj sincera frateco.

La mirinda sukceso de la Bulonja kongreso konvinkis la iniciatorojn de la homaranismo, ke absoluta justeco, egaleco kaj frateco inter la popoloj en la praktiko estas plene ebla. Tial ili decidis proponi al ĉiuj amikoj de interpopola justeco unuigi en apartan grupon, kiu inter la amikoj de internacia lingvo prezentus apartan sektion. La kurantaj fariĝoj en la patrujo de la unuaj homaranoj devigis ilin elpaŝi kun sia programo pli frue, ol ili intencis. En la celado al libereco la popoloj komencis persekutadi unu alian au serĉadi pseudo-liberalajn kompromisojn inter la plimulto kaj la malplimulto, forgesante, ke ĉiuj kompromisoj estas maljustaj kaj nefortikaj, kaj ke honesta kaj fortika libereco povas esti atingita nur per absoluta justeco kaj egaleco, sed ne per modifiko de kruda besta forto, por kiu ekzistas nur la demando “kiu kie super kiu kaj en kia grado devas regi”. Ĉar ekzistas homoj, kiuj meze de la aperinta intergrupa haaoso serĉas la veron kaj dezirus scii unu pri la alia, tial la homaranoj decidis publikigi siajn dogmojn jam nun kaj proponi al ĉiuj amikoj de intergenta egaleco kaj frateco, kiel ajn malgrandnombraj ili estas, aliĝi al ili.

La homaranoj faras al si neniajn iluziojn kaj tial ili timas nenian disreviĝon. Ili konscias tre bone, ke ilia voĉo longe restos voĉo krianta en la dezerto, ke longan tempon ili estos tre malgrandnombraj kaj la mondo ilin mokados kaj nomados ilin utopiistoj, kiuj batalas por afero, kiu “ne havas eĉ la plej malgrandajn ŝancojn de sukceso”. Sed la homaranojn tio ĉi tute ne malkuraĝigas. Ĉar la homaranismo estas ne “entrepreno”, kies valoro dependas de ĝia atendata sukceso au malsukceso, sed nur “principaro”, kaj ĉiu homo fortike konservas sian principaron tiel longe, kiel ĝi estas konsenta kun liaj konvinkoj, sendepende de tio, ĉu ĝi havas multe da partianoj au malmulte.

La homaranoj estas konvinkitaj, ke ili staras sur fundamento de absoluta vero, kiu pli au malpli frue devos venki, kiel ajn longe la mondo batalus kontraŭ ĝi; ke ĉiu nacia au religia ŝovinismo kaj ĉiu celado de unu gento regi super aliaj gentoj, kiel bazita sur malvero kaj rajto de pugno, pli au malpli frue devos malaperi; ke la homaranismo, bazita ne sur tempaj politikaj kondiĉoj de la vivo de tiu au alia gento, ne sur elpensitaj religiaj dogmoj, ne sur tempaj modaj doktrinoj kaj fluoj, sed sur vero absoluta, ĉiuloka kaj ĉiutempa, estas la sola politika-religia idealo, kiun povos havi la estonta homaro, la sola idealo, kiun ĉiu patro kun pura konscienco povas

transdoni al siaj infanoj sen timo, ke ŝanĝiĝintaj kondiĉoj de la vivo elŝiros tiun idealon el ilia brusto kaj lasos ilin en la mezo de la vojo de l'vivo sen ia programo kaj spirita apogo, kiel faris kun ni diversaj malverfundamentaj idealoj transdonitaj al ni de niaj prapatroj.

Ni, homaranoj, al neniuj altrudas niajn idealojn kaj esperojn, ni deziras nur ke la mondo sciu pri ili, por ke tiuj aŭ aliaj niaj agoj aŭ opinioj ne ŝajnu al la mondo strangaj. Ekzistas momentoj en la vivo de ĉiu nacio, kiam ĉiu regnanto nepre devas stariĝi sub iun difinitan standardon. Ni publikigas niajn dogmojn por tio, ke ili povu servi al ni kiel malkaŝa standardo kaj por ke, agante en tia maniero aŭ alia, ni ne devu sur ĉiu paŝo donadi senfinajn klarigojn, sed ni povu simple montri nian standardon kaj diri “mi agas tiel, ĉar mi estas homarano”.

Ligante sin ne per la litero de siaj dogmoj, sed nur per ilia komuna spirito, la homaranoj rezervas al si la rajton per komuna reciproka interkonsento ŝanĝi kaj perfektigi siajn dogmojn, se tiu aŭ alia el ili montriĝos erara. Tial la malsupre donitaj dogmoj de la homaranismo havas signifon nur principan kaj ilia definitiva teksto estos fiksita nur poste, en unu el la kongresoj de la homaranoj.

Ni venu nun al la zamenhofa “Deklaro pri Homaranismo”:

Mi estas homarano: tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj:

I. Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

II. Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

III. Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas; la identigadon de la intereso de lando kun la intereso de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretekstadon de iaj historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuji al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, mi rigardas kiel restaĵon el la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

IV. Mi konscias, ke ĉiu regno⁷ kaj ĉiu provinco devas porti nomon neutrале-geografian, sed ne la nomon de ia gento, lingvo aŭ religio, ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas

7] La konceptoj esprimitaj, kaj la kondiĉoj, per kiuj ili konkretigas, devas esti nepre kuntaktaj al la periodo kaj politika situacio, en kiu Zamenhof pripensis sian penson.

ankorau multaj landoj de la malnova lando, estas la ĉefa kauzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia deveno. Ĝis la tempo, kiam tiuj landoj ricevos nomojn neutralajn, mi devas almenau en interparolado kun miaj samprincipanoj nomi tiujn landojn lau iliaj ĉefurboj kun aldono de la vortoj ‘regno’, ‘provinco’ k.t.p.

V. Mi konscias, ke en sia privata vivo ĉiu homo havas plenan kaj nedisputeblan rajton paroli tiun lingvon au dialekton, kiu estas al li plej agrabla, kaj konfesi tiun religion, kiu plej multe lin kontentigas, sed en komunikiĝado kun homoj de aliaj lingvoj au religioj li devas peni uzi lingvon neutralan kaj vivi lau etiko kaj moroj neutralaj. Mi konscias, ke por samregnanoj kaj samurbanoj la rolon de lingvo neutrala povas ludi la lingvo regna au tiu kultura lingvo, kiun parolas la plimulto de la lokaj loĝantoj, sed ke tio devas esti rigardata nur kiel prooportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne kiel ia humiliga tributo, kiun ŝuldas gentoj mastrataj al gentoj mastrantaj. Mi konscias, ke en tiaj lokoj, kie batalas inter si diversaj gentoj, estas dezirinde, ke en la publikaj institucioj estu uzata lingvo neutrale-homa, au ke almenau krom la gentlingvaj kulturejoj tie ekzistu ankaŭ specialaj lernejoj kaj kulturaj institucioj kun lingvo neutrale-homa, por ke ĉiuj dezirantoj povu ĉerpi kulturon kaj eduki siajn infanojn en senŝovinisma spirito neutrale-homa.

VI. Ĉar mi konscias, ke la reciproka malpaco inter la homoj neniam ĉesos, ĝis la homoj alkitimiĝos starigi la nomon ‘homo’ pli alte, ol la nomon de gento, kaj ĉar la tro nepreciza vorto ‘popolo’ ofte donas kazon al genta ŝovinismo, disputoj kaj malbonuzoj kaj ofte malame dividas inter si la filojn de la sama lando au eĉ de la sama gento, tial je la demando, al kiu popolo mi alkalkulas min, mi respondas: mi estas homarano; nur tiam, kiam oni demandas min speciale pri mia regno, provinco, lingvo, deveno au religio, mi donas pri tio precizajn respondojn.

VII. Mia patrolando mi nomas tiun landon, en kiu mi naskiĝis; mia hejmlando mi nomas tiun landon, en kiu mi estas konstanta, fikŝejma loĝanto. Sed ĉar pro la nedifiniteco de la vorto ‘lando’ la vortoj ‘patrolando’ kaj ‘hejmlando’ estas neprecizaj kaj ofte kausas disputojn kaj malpacon kaj malamike disigas inter si la filojn de la sama terpeco, tial en ĉiuj dubaj okazoj mi evitas tiujn neprecizajn vortojn kaj uzas anstataŭ ili la pli precizajn vortojn ‘patruja regno’, ‘patruja regiono’, ‘patruja urbo’, ‘hejma regno’, ‘hejma regiono’, ‘hejma urbo’.

VIII. Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kian ajn devenon, lingvon, religion au socian rolon ili havas. La servadon speciale al la interesoj de unu gento au la malamom kontraŭ alihejmuloj mi neniam devas nomi patriotismo. Mi konscias, ke profunda amo al sia patrujo kaj al sia hejmo estas afero tute natura kaj komuna al ĉiuj homoj, kaj nur nenormalaj eksteraj cirkonstancoj povas paralizi tiun tute naturan senton. Tial se en mia hejmo ĉiuj laboroj estas ekspluatataj por la oportuneo au gloro de unu speciala gento kaj tio paralizas mian

entuziasmon por socia laborado au eĉ devigas min revii pri alia hejmlando, mi ne devas malesperi, sed mi devas min konsoli per la kredo, ke la nenormala stato en mia hejmo pli au malpli frue pasos kaj miaj filoj au nepoj plene ĝuos tiun fortigan entuziasmon, kiun en mi paralizis la maljusteco de miaj samhejmanoj.

IX. Koscianta, ke lingvo devas esti por la homo ne celo, sed nur rimedo, ne disigilo, sed unuigilo, kaj ke la lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kauzoj de malamo inter la homoj, mi neniam gentan lingvon au dialekton devas rigardi kiel mian sanktaĵon, kiel ajn mi ĝin amus, nek fari el ĝi mian batalan standardon. Kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo gepatra, mi nomas senŝovinisme tiun lingvon au dialekton, en kiu mi en mia infaneco parolis kun miaj gepatroj; kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo persona, mi — gvidante min per neniamaj ŝovinismaj konsideroj — nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone posedas au plej volonte uzas; sed kia ajn estas mia lingvo gepatra au persona, mi devas posedi ankaŭ tiun neutrale-homan lingvon, kiun miaj samtempuloj uzas por rilatoj intergentaj, por ke mi ne bezonu miakulpe altrudi al aliuloj mian lingvon kaj por ke mi havu moralan rajton deziri, ke aliuloj ne altrudu al mi sian, kaj por ke mi povu sur senŝovinisma bazo servi al la kulturo neutrale-homa.

La sekva dogmo eniras la koron de la religia interkonsiliĝo de Zamenhof. Esenca referenco estas la plej malnova klerisma tradicio de la natura religio, kiu ek de Locke kreskis ĝis la nuntempo. Tia sento, antaŭ ol esti teoria pripensado, de laika-natura religiemo, reaperas kaj estas evidentigita en la fragmento plej ofte memorita kiel “Vortoj de lasta konfeso”, kiu en la plej poezia formo malkaŝas eble la plej intima alproksimiĝo de la Nia al la transcenda ebena.⁸

8] Trovita sur la skribotablo de la Majstro kiel lasta manuskripto enkajere (ne finita, eble skizo de artikolo pri la senmorteco de la animo), ĝi estas menciita de Privat 1946: 198-200 (OV = 358) tiele: “Ĉio, kion mi nun skribas, naskiĝis en mia kapo ne nun, sed antaŭ kvardek jaroj, kiam mi aĝis 16 ĝis 18 jaroj; malgraŭ ke mi de tiu tempo multe meditis kaj legis plurajn sciencajn kaj religiajn verkojn, miaj tiamaj pensoj pri Dio kaj pri senmorteco preskaŭ tute ne ŝanĝiĝis. Dum en la scienca mondo mi perdos ĉian estimon, samtempe en la mondo de kredantoj mi trovos nenian kompensan simpation, verŝajne nur atakon, ĉar MIA kredo estas tute alispeca ol ILIA kredo... Estus pli prudente silenti, sed mi ne povas. Mia patrino estis religia kredanto, mia patro ateisto. Dum mia infaneco mi kredis je Dio kaj je senmorteco de la animo en la formo instruata mia denaska religio. Mi ne memoras tute precize, en kiu vivojaro mi perdis la religian kredon; sed mi memoras, ke la plej altan gradon de kredomanko mi atingis ĉirkaŭ la aĝo de 15-16 jaroj. Tio estis ankaŭ la plej turmentita tempo de mia vivo. La tuta vivo perdis por mi ĉian sencon kaj valoron. Kun malestimo mi rigardis min mem kaj la aliajn homojn, vidante en mi kaj en ili nur sensencan pecon da karno, kreitan, oni ne scias pro kio kaj por kio, kiu transiras en la eternecon malpli ol plej malgrandan sekundeton, por rapide forputri porĉiame kaj ne plu reaperi dum la venontaj senfinaj milionoj kaj miliardoj da jaroj. Pro kio mi vivas, pro kio mi lernas, pro kio mi laboras, pro kio mi amas? Ĉar estas ja tiel sensenca, tiel senvalora, tiel ridinda... Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero...; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo...; ke io min gardas al alta celo...”.

X. Kosciante, ke religio devas esti nur afero de sincera kredo, sed ne ludi la rolon de hereda genta disigilo, mi nomas mia religio nur tiun religion au religianstatauantan sistemon, je kiu mi efektive kredas. Sed kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ neutrale-homaj principoj “homaranaj”, kiuj konsistas en jeno:

- a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kauzo de la kauzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo ‘Dio’ au per alia nomo, sed mi konscias, ke la esenco de tiu Forto ĉiu havas la rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro au la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami au persekuti iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia.
- b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco, kaj ke la ĉefa por ĉiuj homoj deviga principo de tiuj ordonoj estas: agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi: ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruintoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado au neplenumado dependas de nia volo.
- c) Se mi kredas je neniu el la ekzistantaj revelaciaj religioj, mi ne devas resti en iu el ili sole pro motivoj gentaj kaj per mia restado erarigi homojn pri miaj konvinkoj kaj herede nutri per senfinaj generacioj intergentan disecon, sed mi devas — se la leĝoj de mia lando permesas — malkaŝe kaj oficiale nomi min “liberkreda”, ne identigante tamen la liberkredon speciale kun ateismo, sed rezervante al mia kredado plenan liberecon. Kiam en mia loĝloko ekzistos komuninterkonsente aranĝita, plenforme organizita samgenta kaj sendoktrina komunumo de liberkredantoj, al kiu mi povas aliĝi kun plena kontenteco por mia konscienco kaj por la bezonoj de mia koro, tiam — por fiksi fortike kaj precize mian religian neutralecon kaj savi mian posteularon kontraŭ senprogrameco kaj konsekvence kontraŭ refalo en gente-religian ŝovinismon, mi devas aliĝi al tiu liberkreda komunumo tute oficiale kaj heredigeble kaj akcepti por mi ĝian neutralan nomon, ĝiajn komunumajn aranĝojn, ĝiajn nedevigajn neutrale-homajn festojn kaj morojn, ĝian neutrale-homan kalendaron k.t.p.; ĝis tiu tempo mi povas resti oficiale alskribita al tiu religio, en kiu mi naskiĝis, sed mi devas ĉiam aldoni al ĝia nomo la vorton “liberkreda”, por montri, ke mi alkalkulas min al ĝi nur provizore, laŭmore kaj administre.

Konklude ni legas la du lastaj dogmojn:

XI. Kiam en mia urbo estos fondita templo homarana, mi devas kiel eble pli ofte vizitadi ĝin, por frate kunvenadi tie kun homaranoj de aliaj religioj, ellaboradi kune kun ili morojn kaj festojn neutrale-homajn kaj tiamaniere kunhelpi al la iom-post-ioma ellaboriĝo de filozofie pura, sed samtempe bela, poezia kaj varma vivo-reguliga

religio komune-homa, kiun gepatroj povos sen hipokriteco transdoni al siaj infanoj. En la templo homarana mi auskultados la verkojn de la grandaj instruintoj de la homaro pri la vivo kaj morto kaj pri la rilato de nia “mi” al la universo kaj al la eterneco, filozofie-etikajn interparolojn, altigajn kaj nobligajn himnojn k.t.p. Tiu ĉi templo devas edukadi la junulojn kiel batalantojn por la vero, bono, justeco kaj ĉiuhoma frateco, ellaboradi en ili amon al honesta laboro kaj abomenon por frazisteco kaj por ĉiuj malnoblaj malvirtoj; tiu ĉi templo devas donadi spiritan ripozon al la maljunuloj, konsolon al la suferantoj, doni la eblon sensarĝigi sian konsciencon al tiuj, ĉe kiuj ĝi estas sarĝita per io k.t.p. Tiel longe kiel en mia urbo ne ekzistas templo homarana, mi devas kiel eble plej ofte kunvenadi por komunaj interparoladoj kun aliaj homaranoj de mia urbo, kaj se tiaj ne ekzistas, mi devas komunikiĝadi letere kun homaranoj de aliaj urboj.

Rimarko: Pri la dogmo 11, kiu krom la karaktero societa havas ankoraŭ karakteron teozofian, oni devas memori, ke ĝi parolas nur pri tiaj instruoj, kiuj ne kontraŭparolas al la scienco, kaj ke ĝi rilatas nur al la templo de la homaranoj, sed tute ne al la privataj rondetoj de la homaranoj. Tiuj ĉi rondetoj havas karakteron ne religian, sed pure societan kaj servas por liberaj amikaj interparoladoj pri ĉiuj eblaj temoj, lau la deziro de la partoprenantoj, kaj de aliaj rondetoj ili distingiĝas nur per tio, ke en ili partoprenas homoj, kiuj havas neutrale-homajn, religiajn kaj naciajn principojn, kaj ke la interparolado en ili estas farata precipe en la lingvo neutrale-homa.

XII. Homarano mi nomas ĉiun homon, kiu subskribis la “Deklaracion de Homarano” kaj alskribiĝis al iu el la ekzistantaj homaranaj temploj au rondetoj.

Rimarko: Ĉiu nova rondeto de homaranoj devas publikigi sian adreson en iu el la gazetoj, kiuj estas eldonata en la lingvo internacia.

La konsonanco de la tuta Zamenhofa produktado kun la ideoj malantaŭ la kultura sep-jarcenta grundo aperas aparte en la filozofia kaj politika produktado⁹, kaj ĉefe en la parolado de Bulonjo¹⁰, kies kulmino estas la tuj sekvanta *Preĝo sub la verda standardo*, tiu programa poeziaĵo kiu devintus diri multe pli ol mil paroladoj kaj pri kiu la plej intimaj amikoj de Zamenhof mem lin admonis – ĉar la tempoj ankoraŭ ne estis venintaj – ne legi integre: jen la volo, kiu jam plurfoje ĝis tiam aperis, ke tio kio estis plej “interne de” Esperanto estus devinta resti en la manoj de malmultaj gardantoj de Tradicio,

9] La problemaro je profunde soci-politika valoro (ek de la demando de unuiĝinta Eŭropo ĝis la monda paco), nuntempe ĉiam pli deviga kaj debatata, estas prezentataj en Zamenhof (1911, 1915, 1918) laŭ vidpunkto kiu, ankaŭ terminologie, perfidas la referencan matricon ĉi tie elstarigita.

10] Kie centra estas la koepto de “granda homa familio”, kiu finfine kuniĝas fizike en periodo de profunda spiritualeco (“Sankta estas por ni tiu tago”) por kunmeti planon de tutmondaj libero, egaleco kaj frateco: “ni ĉiuj staras sur neŭtrala fundamento, ni ĉiuj jvas la samajn egalajn rajtojn; ni ĉiuj sentas nin anoj de unu nura nacio, anoj de unusola familio”. La ideo de orepoko, absolute rekuperenda, enradikiĝas en la antikvan miton de la Babela turo, kaj de ĝia fondinto, Nimrod.

kiu de supre estus devinta gvidi la evoluan proceson de la Ideo, en tiu duobla valoro inter la profana kaj laikigita vidoj de Esperanto kiel lingva helpilo kaj la celoj plej “sanktaj” kiuj troviĝis je ties bazo.¹¹

Ĝuste tiu ĉi lasta strofo, aparte, estis ekskludita de la legado, kaj konsiderita tiom esotera, en la etimologia senso de la termino, ke oni eĉ ne publikigis ĝin en la *Krestomatio de Esperanto*: fortaj estas la palpebrumo al la *Ringparabel* kiun Lessing reprenis de Boccaccio, aŭ ankoraŭ la referencoj al la poezia produktado de la 19a jarcento, kiu spirite ligas Goethe’n al Kipling, aŭ Fichte’n al Voltaire, por doni nur minimumajn ekzemplojn de la klimato.

Signifa kaj simbola estas, fine, la fakto ke en 1959, okaze de la centjariĝo de lia naskiĝo, la Plenuma Komitato de UNESKO deklaris Zamenhof’on “unu el la grandaj personecoj de la homaro”, instigante solenadon.¹²

11] En la letero al Michaux de la 5-a de januaro 1905 Zamenhof skribas: “Mi deziris esprimi, en tiu preĝo, tiun naturan religion de la homa koro kiu estas la sama en ĉiu el ni, civila aŭ sovaĝa, filozofe edukita aŭ senscia, kaj ĝi ne havas ion ajn komunan kun la pluraj eklezioj, pastroj, produktitaj aŭ altruditaj dogmoj. Mi volis levi kanton al tiu nekonata kaj nekomprenebla mistera morala forto, kiu estas la fonto de ĉiu bono en la mondo... tamen malbonŝance mi komplete malsukcesis...”.

12] V. tiurilate la lastatempan Astori 2016, kaj plue la belan Minnaja 2009.

ZAMENHOF ESPERANTO KAJ LA IDEO DE UNIVERSALA LINGVO

La ideo de komunumo perfekta kaj nemortema estos ĉiam
taksata ĥimera kiel tiu de perfekta kaj nemortema homo

(David Hume *Historio de Anglujo* VI, 1539).

CELO DE ĈI TIU ESEO ESTAS ENKADRIGI LA LINGVISTIKAN UTOPION DE Esperanto¹ laŭ la vidpunkto de la studoj pri antikvaj civilizacioj, surbaze de la antikva lingvistika kulturo, kiu estas en la origino de la idealo de Ludwik Lejzer Zamenhof, en lia eksplicita kaj profunda kunligo kun la juda tradicio, kaj aparte kun la rakonto pri la Babela turo. Estos pruvite, ke laŭ la antikvaj kulturoj kaj tradicioj, la homaro estis komence unulingva, kaj nur poste la lingvoj de la popoloj diferenciĝis unu

1] Pri la utopiaj aspektoj de la esperantista ideo oni vidu almenaŭ D. Astori, *Esperantujo. Uno strumento di comunicazione e di comprensione interculturale tra religioni e popoli diversi*, “Prometeo”, n. 114, junio 2011, pĝ-oj 102-111; D. Astori, *La esperanta espero fra creazione linguistica e costruzione identitaria*, “Paideia”, n. 66, 2011, pĝ-oj 383-403; D. Astori, *La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado: interpopola dialogo kaj tutmonda interkompreno per Esperanto kaj homaranismo*, “Beletra Almanako”, n. 5/12, okt. 2011, pĝ-oj 156-166; D. Astori, F. Gobbo, C. Minnaja, G. Silfer, *La visione ideale di Zamenhof*, https://www.academia.edu/28024416/La_visione_ideale_di_Zamenhof; D. Astori, N. Reggiani, *Esperanto 125*, Milano, FEI, 2012, #76 (<http://www.trapassatoefuturo.it/125/schede/076.html>); F. Gobbo, *La filosofia morale di Ludwik Lejzer Zamenhof per il nuovo millennio*, <https://web.archive.org/web/20160306011804/http://erewhon.ticonuno.it/primavera2005/zamenhof.htm>. Oni vidu krome A. Korzhenkov, *Zamenhof. The Life, Works and Ideas of the Author of Esperanto*, eld. H. Tonkin, New York-Rotterdam, UEA, 2010, pĝ-oj 59-77. Generale, pri la lingvistikaj utopioj, oni referencas al C. Marrone, *Le lingue utopiche*, Roma, Stampa Alternativa, 1995; U. Eco, *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea*, Roma – Bari, Laterza, 1996; D. Astori, *Creazione linguistica e identità socio-nazionale: da Alessarco di Macedonia all’Isola delle Rose*, en: *Multilingualism. Language, Power, and Knowledge*, eld. P. Valore, Pisa, Edistudio, 2011, pĝ-oj 145-158.

de la alia, por fine reveni al la origino, kaj kiu estas la rolo de Zamenhof en tiu historio².

LA JUDAJ LINGVAJ RADIKOJ DE ZAMENHOF, LA BIBLIA RAKONTO DE BABELO KAJ LA REAKIRO DE LA ‘ORA LINGVO’

Zamenhof estis pola judo kaj, kiel tia, li konsciis pri kaj konis la judan kulturan tradicion. Tio estas bone konata afero, samkiel estas konate, ke la tradicia nesekureco de la juda popolo en Orienta Eŭropo estis la favora grundo por la naskiĝo de Esperanto³. Tion li mem klarigis per sia fama letero al Alfred Michaux, skribita en 1905, kiam li estis preparanta la unuan Universalan Kongreson en Boulogne-sur-Mer. La plej elstaraj frazoj meritas kompletan citon:

“[...] mi estas hebreo kaj ĉiuj miaj idealoj, iliaj naskiĝo, maturigado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj – ĉiuj estas nedisigeble ligitaj kun tiu ĉi mia hebreeco. Mi neniam kaŝas mian hebrecon kaj ĉiuj esperantistoj tion ĉi scias; mi kun fiereco alkalkulas min al tiu ĉi tiel antikva kaj tiom multe suferinta kaj batalinta popolo, kies tuta historia misio konsistas, laŭ mia opinio, en la unuigo de la nacioj en la celado al “unu Dio”, t.e. unuj idealoj por la tuta homaro. [...] Se mi ne estus hebreo el la ghetto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo. La malfeliĉon de la homara disiĝo neniuj povas senti tiel forte, kiel hebreo el la ghetto. La necesegon de lingvo sennacia, neŭtrale homa neniuj povas senti tiel forte, kiel hebreo, kiu estas devigata preĝi al Dio en jam longe mortinta lingvo, ricevas sian edukadon kaj instruadon en lingvo de popolo, kiu lin forpuŝas, havas samsuferanojn en la tuta mondo kaj ne povas kun ili kompreniĝadi. [...] Mia

2] Mi dankas Davide Astori kaj Federico Gobbo pro la utilaj sugestoj pri la temo.

3] Pri la kulturaj hebreaj radikoj de Zamenhof oni vidu almenaŭ N.Z. Maimon, K. Domoslawski, *Por pli bone kompreni la formiĝon de Zamenhof*, “Nica Literatura Revuo”, n. 7/41, majo/junio 1962, pĝ-oj 160-164; D.L. Gold, *Pli pri judaj aspektoj de Esperanto*, “Planlingvistiko”, n. 2, 1982, pĝ-oj 7-14; G. Silfer, *Se mi ne estus hebreo... Una ricerca sulle origini dell’Esperanto*, Milano, FEI, 1986; P. Janton, *Zamenhof kaj la juda demando*, en: *Sociaj aspektoj de la Esperanto-monado*, eld. S. Ĉolić, Sarajevo, Elbih, 1988, pĝ-oj 24-33; D. Astori, *Se non fossi ebreo... Qualche nota per una riflessione sul rapporto fra ebraismo ed Esperanto*, en: L.-Chr. Zaleski-Zamenhof, *Via Zamenhof*, Firenze, Giuntina, 2009, pĝ-oj 5-10; A. Korzhenkov, *Zamenhof...*, cit., pĝ-oj 3-7; M. Lipari, *Zamenhof e l’ebraismo*, en: *Esperanto e spiritualità*, zorge de D. Astori, Milano, FEI, 2017, pĝ-oj 9-12. Kaj laste, ankaŭ la Aktojn de la Kolokvo *The Heritage and Legacy of Ludwik Lejzer Zamenhof*, okazinta ĉe POLIN (Museum of the History of Polish Jews, Warsaw) la 13an-15an de decembro 2017 kaj publikigota fare de Hentrich & Hentrich. Pri la kompleksa problemaro de la interligoj inter Esperanto kaj hebraismo en Orienta Eŭropo, oni vidu ankaŭ la majstran eseon de C. Minnaja, *Ebraismo ed esperanto nell’Europa dell’Est*, <http://www.math.unipd.it/~minnaja/RICERCA/Slavia/EBRAISMOedESPERANTO.pdf>.

hebreeco estis la ĉefa kaŭzo, kial mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo – al la revo pri unuiĝo de la homaro”.⁴

La plej granda parto de la hebrea kultura identeco konsistas el la lingvo: en kondiĉo de tutmonda diasporo, la lingva problemo originas de la biblia rakonto pri la Babela Turo, kaj evoluigas en la klopodo reakiri lingvon kiu povi unuiĝi dispelitan kaj ‘migrantan’ popolon.⁵ Bazante la estonto de propra revo sur la potenca Babela mito, prototipo enradikiĝinta en la plej profundan kaj intiman homan naturon,⁶ Zamenhof legis la ĉi-subajn vortojn en la parolado kiun li prezentis dum la unua tutmonda esperanto-kongreso:

“En la plej malproksima antikveco, kiu jam de longe elviŝiĝis el la memoro de la homaro, kaj pri kiu nenia historio konservis al ni eĉ la plej malgrandan dokumenton, la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ĉesis kompreni unu la alian. Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiuj egalan korpon, egalan spiriton, egalajn kapablojn, egalajn idealojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio — tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikajn grupetojn, kaj inter ili komenciĝis eterna milito. En la daŭro de multaj miljaroj, en la daŭro de la tuta tempo, kiun la homa historio memoras, tiuj fratoj nur eterne bataladis inter si, kaj ĉia interkompreniĝado inter ili estis absolute ne ebla. Profetoj kaj poetoj revadis pri ia tre malproksima nebula tempo, en kiuj la homoj denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion: sed tio ĉi estis nur revo. Oni parolis pri tio, kiel pri ia dolĉa fantazio, sed neniu prenis ĝin serioze, neniu kredis pri ĝi.”⁷

La ideo de Internacia Lingvo – ponto-lingvo kiu ne anstataŭu la ekzistantajn lingvojn sed kiu povu krei superlingvistikan unuon celantan reciprokan interkompreniĝon – profunde enradikiĝis en la hebrea pensmaniero, se ni sekvas la tradician interpreton de Babelo ne kiel simpla ‘multobligo’ de

-
- 4] A. Korzhenkov, *Zamenhof...*, cit., pĝ. 5 (komparu L.L. Zamenhof, *Mi estas homo*, eld. A.V. Korzhenkov, Kaliningrad, Sezonoj, 2006, pĝ-oj 99–100). Iujn pecojn de tiu ĉi teksto estis citataj dum la intervjuo allasita de Zamenhof al rabeno Isidore Harris por *Jewish Chronicle* de la 6a de septembro 1907.
- 5] Konsultu D.I. Block, *The Role of Language in Ancient Israelite Perceptions of National Identity*, “Journal of Biblical Literature”, n. 103, 1984, pĝ-oj 321–340. Por interesa analizo de la diversaj fazoj de identigeco de la hebrea dum la Antikveco oni vidu S. Schwartz, *Language, Power and Identity in Ancient Palestine*, “Past & Present”, n. 148, aŭg. 1995, pĝ-oj 3-47.
- 6] Konsultu D. Astori, *From the Tower of Babel to the Internet: Educating Humanity to Peace By Re-stabilizing Communication, Communication, Culture, Creation: New Scientific Paradigms*, eld. V. Popović, I. Janjić, S. Milancovici, E. Gagea, Arad – Novi Sad, Vasile Goldiș University Press – Fundatia Europa, 2015, pĝ-oj 49-58. Pri Zamenhof kaj Babelo: D. Astori, *Quale/i lingua/e per l’Europa? Alcune riflessioni tra pianificazione, creatività, economia e diritti linguistici*, Parma, Bottega del Libro, 2016, pĝ-oj 251-262.
- 7] <http://www.stelooj.de/esperanto/paroloj/kongr1a.html>. Mia traduko.

lingvoj, sed kiel forprenoj de komuna, sankta lingvo: por puni la arogantecon de la homoj, Dio forprenis de ili la kapablon sin kompreni reciproke, ilin lasante al la necesa, disa, polifonio de la malsamaj lingvoj.⁸ Ĉi sube legeblas la gravaj pecoj de la Biblio (*Genezo* 10,5-31 kaj 11,1-9)⁹ paralele al la komento de Rabbi Salomon ben Isaac (1040-1106), kutime pli konata per sia akronimo Rashi, la plej influa hebrea biblia komentaristo en la Mezepoko,¹⁰ El la biblia teksto evidentas ke distingo inter la homaj lingvaĵoj ekzistis jam en la tempoj de la filoj de Noa kaj de iliaj posteuloj, tuj post la Diluvo, multe pli frue ol la eventoj ĉirkaŭ la Babela Turo, sed ankaŭ multe pli poste ol la tempoj de la Edeno, kiam Adamo paroladis kun Dio kaj donis la nomojn al la vivantaj estaĵoj (ekz. *Genezo* 2,19-20).¹¹

Genezo

komento de Rashi

[10.5] De ĉi tiuj dissemiĝis la insuloj da popoloj en siaj landoj, ĉiu laŭ sia lingvo, laŭ siaj gentoj kaj nacioj.
[Tiaj estis la gefiloj de Jafeto]

[10.20] Tio estas la filoj de Ĥam laŭ siaj gentoj kaj lingvoj, en siaj landoj kaj nacioj.

[10.31] Tio estas la filoj de Ŝem laŭ siaj gentoj kaj lingvoj, en siaj landoj, laŭ siaj nacioj

[11.1] Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero.

Unu lingvo: La Sankta Lingvo

-
- 8] *Berešit rabbá, ad loc.* (eld. Torino, UTET, 1978, pĝ-oj 280-287). Konsultu. D. Astori, *Quale / i lingua / e per l'Europa?...*, cit., pĝ-oj 251-252 e 257-258.
- 9] Konsultu F. Staal, *Oriental Ideas on the Origin of Language*, "Journal of the American Oriental Society", n. 99, 1979, pĝ-oj 1-14; pĝ-oj 5-6; U. Eco, *La ricerca della lingua perfetta...*, cit., pĝ-oj 13-16. Pri la formado de la biblia rakonto konsultu. K. Seybold, *Der Turmbau zu Babel. Zur Entstehung von Genesis XI 1-9*, "Vetus Testamentum", n. 26, 1976, pĝ-oj 453-479; Chr. Rose, *Nochmals: Der Turmbau zu Babel*, "Vetus Testamentum", n. 54, 2004, pĝ-oj 223-238.
- 10] Pri la bildo de Rashi kaj pri lia komento konsultu E. Shershevsky, *Rashi: The Man and His World*, New York, Jason Aronson, 1982; A. Grossman, *Rashi: R. Shelomoh Yitshaki*, Jerusalem, Merkaz Zalman Shazar le-toldot Yiśra'el, 2006. La tekstoj estas troveblaj en Rashi di Troyes, *Commento alla Genesi*, zorge de L. Cattani, Casale Monferrato, Marietti, 1985, pĝ-oj 79-82.
- 11] La komento de Rashi lokigas la disperdon de la lingvoj en la jaro de la morto de Peleg, kies nomo signifas "divido" kaj pri kiu *Gen.* 10,25 diras ke "je liaj tempoj la tero estis dividita". En iuj esoteraj tradicioj, Peleg estas identigita en Nimrod, la 'titano' kiu verŝajne gvidis la konstruon de la Babela Turo (konsultu S. Farina, *Il Libro dei Rituali del Rito Scozzese Antico ed Accettato*, Roma, Piccinelli, 1946, pĝ. 345). Temas do pri la babelata disperdiĝo, kaj ne pri la originoj de la antaŭbabela multlingvismo.

Kaj unu parolmaniero: ili venis kun ununura projekto kaj diris ‘Li havis neniun rajton elekti por Si mem la superajn regionojn: ni supreniru al la ĉielo kaj faru militon kontraŭ Li!’; alia klarigo: ‘ili parolis kontraŭ la Unikulo de la mondo’. Alia klarigo: ili diris ‘Unu fojon ĉiun 1656-an jaron la ĉielo ŝanceliĝas, kiel okazis je la tempo de la Diluvo. Ni iru konstrui konzolojn por ĝi!’

[11.3] Kaj ili diris unu al alia: ‘Venu, ni faru brikojn kaj ni brulpretigu ilin per fajro’. Kaj la brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kalko.

Kaj ili diris unu al alia: unu nacio al la alia nacio, Micraim al Kuŝ, kaj Kuŝ al Put, kaj Put al Kanaan.

[11.4] Kaj ili diris: ‘Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero’.

[11.5] Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj.

[11.6] Kaj la Eternulo diris: ‘Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari.’

[11.7] Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia.’

Ne komprenu: Unu petas brikon, kaj la alia portas al li kalkon: la unua malleviĝas kaj rompas lian kranion.

[11.8] Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon.

[11.9] Pro tio oni nomis ĝin Babelo, ĉar tie la
Sinjoro konfuzis la tutteran lingvon kaj de tie la
Sinjoro ilin disperdigis sur la tutan teron.

Laŭ la hebrea tradicio, kompreneble, tiu Sakta Lingvo estis la hebrea, kaj identigita en la lingvo parolata de Adamo en la Edeno;¹² la ebleco renversi Babelon kaj reakiri fine la komunan lingvon – en tiu *tikkun olam*, “riparado de la mondo”, kiu estas bone konata al la hebrea mistikismo¹³ – profetita plurfoje en la sanktaj fontoj.¹⁴

LA ORIGINA MONOLINGVISMO KAJ LA SEKVA LINGVA DIFERENCIGO EN LA ANTIKVA PENSO

Tiu duobla vojo estas profunde enradikiĝinta en la antikva penso, en kiu, apud iu imanenta multlingvismo¹⁵ en kiu ĉiu popolo identiĝis tutunue per la propra idiomo,¹⁶ ekzistis la forta kaj persista ideo pri iu universala lingvo, parolata dum la mita kaj praa Ora Epoko, kiam la personoj povis komuniki ne nur inter si, sed ankaŭ kun la aliaj naturaj elementoj kaj eĉ kun la dioj.¹⁷ La proksimorienta deveno, de kiu la biblia tradicio kunfluita en la ideon de Zamenhof eltiras sian esencon, estas klare reprezentata per epopea sumera peco de a IV/III jarmilo a.K., kiu notas la deziresprimon por estonta reakiro de la ora monolingvismo: temas pri la tieldirita “Sorĉo de Nudimmud”, parto de la *Epica di Aratta* (verso 136-155).

Iun tagon ne estos serpentoj, nek skorpioj, nek hienoj, nek leonoj, ne ekzistos sovaĝaj hundoj aŭ lupoj, tial ne estos timo, ĉar homo ne havos malamikojn. Tiun

12] Komparu D. Levine Gera, *Ancient Greek Ideas on Speech, Language, and Civilization*, Oxford, Oxford University Press, 2003, pĝ-oj 20-21 kaj 93.

13] Cf. J. Jacobs, *The History of “Tikkun Olam”*, “Zeek: A Jewish Journal of Thought and Culture”, June 2007, <http://www.zeek.net/706tohu>.

14] 4Q464 fr. 2-3; *Testamento di Giuda* 25,3; *Midraŝ Tanbuma* a Gen. 11. Pri la reakiro de la sankta lingvo de la originoj konsultu R. Guénon, *Simboli della Scienza sacra*, Milano, Adelphi, 1997, pp. 50-53.

15] Pri la antikva multilingvismo komparu D. Astori, *Multilinguismo e traduzioni nel Mediterraneo antico*, en: *Multilinguismo e società 2010*, zorge de D. Astori, Pisa, Edistudio, 2011, pp. 51-58; A. Bernini, N. Reggiani, *Le vie del multilinguismo nel mondo antico: il caso dell’Egitto greco-romano*, un: *Multilinguismo e Società 2011*, zorge de D. Astori, Pisa, Edistudio, 2012, pp. 47-65.

16] Rimarkinda esyas la leksika koincido inter la termino utiligata por “lingvaĵo” kaj tio por “lango” en la egipta (komparu S. Sauneron, *La différenciation des langages d’après la tradition égyptienne*, “Bulletin de l’Institut Français d’Archéologie Orientale”, n. 60, 1960, pp. 31-41: pp. 40-41), en la aramea (komparu D.I. Block, *The Role of Language...*, cit., pp. 323-326 kaj sekvaj paĝoj) kaj en la latina (*lingua*).

17] Pri tio oni vidu nun detale N. Reggiani, *Parlare con la Natura. Dal monolinguisimo aureo primordiale alla Lingua degli Uccelli*, en: *Natura che mi ispira*, zorge de S. Voce, Bologna, Pàtron, eldonata.

tagon, la landoj de Ŝubar kaj Hamac, same kiel dulingva Sumer – la granda monto de la reĝeca povo – kune kun Akkad – la monto kiu havas ĉion, kio konvenas al ĝi – kaj ankaŭ la lando Martu, kiu troviĝas sur verdaj paŝtejoj, jes, la tuta mondo de popoloj bone regitaj povos paroli al Enlil en unu lingvo! Ĉar tiun tagon, por la diskutoj inter sinjoroj kaj princoj kaj reĝoj, Enki [...], Sinjoro de abundeco, Sinjoro de la ĝustaj decidoj, Sinjoro de saĝo kaj scio sur la Tero, sperta pri dioj, elektita pro saĝo, Sinjoro de Eridu, ŝanĝos la lingvojn en iliaj buŝoj, tiom da kiom iam li metis, kaj la parolmaniero de la homaro vere estos nur unu! (“sorĉo de Nudimmud”): *Epoĥo de Arata*, 136-155)

En la citita peco, la tero de Sumer estas difinita “dulingva” (referencante al la akada kaj al la sumera kiuj estis tie parolataj) kiel fakto, kiu estas supervenkita (se ne nuligita) de la esperanta komuna lingvo,¹⁸ kiu portos al produktiva internacia komunikado, dum la manko de komunikado portas al konflikto, ĝuste kiel en la biblia rakonto.¹⁹ Se la ideo de estonta reaktiro de la komuna lingvo ŝajnas malesti en la egipta tradicio, anstataŭata ŝajne de la observo de iu necesa plurilingvismo, fiziologie ena en la fizikaj malsimilecoj de la pluraj etnaj grupoj,²⁰ la greka kaj romana kulturoj heredigas la proksim-orientan

18] La peco, strukturita kiel himno al dio Enki, povus esti kaj la revoko de ideala pasinto kaj la aŭspicio de ĝia reaktiro. La unuaj priaj studoj estas tiuj de S.N. Kramer, *Man's Golden Age: A Sumerian Parallel to Genesis XI, 1*, “Journal of the American Oriental Society”, n. 63, 1943, pp. 191–194, kaj *The “Babel of Tongues”: A Sumerian Version*, “Journal of the American Oriental Society”, n. 88, 1968, pp. 108–111. Pli poste: J. van Dijk, *La “confusion des langues”. Note sur le lexique et sur la morphologie d'Enmerkar, 147–155*, “Orientalia”, n. 39, 1970, pp. 302–310; D.I. Block, *The Role of Language...*, cit., pp. 334–337; Th. Jacobsen, *The Spell of Nudimmud*, en: *Sha'arei Talmon. Studies Presented to Shemarjahu Talmon*, ed. by M. Fishbane, E. Tov, Winona Lake (IN), Eisenbrauns, 1992, pp. 403–416; H. Vanstiphout, *Another Attempt at the “Spell of Nudimmud”*, “Revue d'Assyriologie”, n. 88, 1994, pp. 135–154; J. Klein, *The Origin and Development of Languages on Earth: The Sumerian versus the Biblical View*, en: *Tebillah le-Moshe. Biblical and Judaic Studies in Honor of Moshe Greenberg*, ed. by M. Cogan, B.L. Eichler, J.H. Tigay, Winona Lake (IN), Eisenbrauns, 1997, pp. 77–92 (en la hebrea; angla resumo je pĝ. 319); J. Klein, *The So-Called “Spell of Nudimmud” (ELA 134–155): A Re-examination*, in: *Studi sul Vicino Oriente Antico dedicati alla memoria di Luigi Cagni*, zorge de S. Graziani, Napoli, Istituto Orientale, 2000, pp. 563–584; C. Mittermayer, *Enmerkara und der Herr von Arata. Ein ungleicher Wettstreit*, Fribourg, Presses Universitaires, 2009. La mito de estonta reestablado de la komuna lingvo de la originoj pretervivis en la Proksima Oriento dum longa tempo: Plutarĥo (*Is. et Osir.* 370b) rakontas ke la Person kredis en iu estonta renovigo de la mondo, kun la homoj kiuj feliĉe estos parolantaj la saman lingvon.

19] La *epos* baziĝas sur la komercaj rilatoj inter la reĝo de Uruk, Enmerkar, kaj la suvereno de la fora lando Aratta, tiel ke la pozitivaj influoj de la efika interlingva komunikado montriĝas evidentaj: komparu N. Reggiani, *Rovesciare la lingua: interpreti e traduttori nell'Egitto antico*, en: *Produrre “quasi” lo stesso effetto. Quindici percorsi nei boschi traduttivi*, zorge de D. Astori, Parma, Bottega del Libro, 2013, pp. 123-146; pp. 124-125.

20] Komparu S. Sauneron, *La différenciation des langues...*, cit., p. 40. La egipta tradicio, dum la preskaŭ du jarmiloj pasigitaj inter la ‘universaleca’ himno de Tell el-Amarna (ĉ. 1500 a.K.: “La lando Sirio, la Sudano, la egipta tero, vi metas ĉiun el ili je ilia loko kaj prizorgas iliajn bezonojn; ĉiu havas

koncepton kaj parolas pri iu sekvenco de la Ora Epoko, karakterizata per globala interkompreniĝo, pri iu sekva fazo de lingva diferencigo, kun la implicita ebleco reakiri tion kio estis perdita je la originoj. En la fabeloj ni povas trovi simplan version de tiu kredo:

Sed estis ora epoko kiam ĉiuj bestoj havis artikulaciitan voĉon kaj scipovis paroli, kaj faris kunvenojn meze de la arbaroj. La lingvoj de rokoj kaj de folioj estis liberaj; al la ŝipo kaj al la ŝipano parolis la maro; paseroj faris spritajn konversaciojn kun la kamparanoj; tero produktis ĉiujn fruktojn sen postuli streĉojn. Mortidevaj homoj kaj dioj kutimis miksiĝi kiel amikoj (Babrio, 6-13 – 1a-2a p.K.). Homoj, antaŭ multaj jarcentoj, vivis sen urboj kaj sen leĝoj, kaj parolis unu solan lingvon (*lingua*), sub la regno de Jupitero; sed post kiam Merkuro *interpretatus est* la parolojn (*sermone*) de la homoj, el kio sekvas ke interpretanto estas dirita ἐρμηνευτής (fakte Merkuro estas nomita Ἐρμῆς en la greka lingvo; li mem distribuis la naciojn), tiam ekestis malakordo inter la mortidevaj homoj, kio ne plaĉis al Jupitero (Igino, *Fabulae*, 143,2 – 1a a.K.-1a p.K.).

Pli ordigita filozofia teksto kia la *Politika* dialogo de Platono efektive prezentas la ideon de lingva fiziologia diferencigo en la nuna mondo, kun rimarkinda sprita aludo kontraŭ tiuj kiuj subtenis la dikotomio Helenoj/Barbaroj:

Kiel se iu volante entrepreni la dispartigon en du partojn de la homa speco, tiu dispartigus kiel multaj ĉi tie dispartigas, nome la Grekan genton kiel unuo aparta el ĉiuj, dum, rilate ĉiujn aliajn gentojn, kiuj estas sennombraj kaj havas nenian rilaton kaj ne interkomprenas unu la alian pro la lingva diverseco, oni nomas ilin per ununura nomo ‘barbaro’, kaj kredas ke temas ankaŭ, pro tiu sola nomo, pri unika speco (262d).

Malgraŭ tio, iom pli poste, Platono lokigas tiun ĉi vizion en pli ĝeneralan kosman kuntekston, kiu enhavas la ‘oran’ komunan lingvon kaj la necesan malproksimiĝon de ĝi. Tiu kadro estas imagata kiel sinsekvo de ripetigantaj cikloj (surbaze de la prototipa mito de la kvin rasoj kodigita en la Verkoj

pretervivilojn kaj lia vivo estas difinita. La lingvoj estas disigitaj en lingvaĵojn, samkiel la homaj specioj; iliaj haŭtoj estas malsam(kolor)aj, ĉar vi diferencigis la popolojn”, *Bibliotheca Aegyptiaca* VIII, p. 95, rr. 1-2) kaj la sinkretistaj himnoj al Iside dum la helen-romia epoko (la diino mem diras “estas mi kiu dispartigis la lingvaĵojn inter Helenoj kaj Barbaroj” en iu surskribo de Io, *Inscriptiones Graecae* XII.5 14, rr. 34-35, II-III jc. d.K.), sin adresas ĉiam al la kreiva dio kiel al la ento kiu disigis la lingvojn je la kmenco de la mondo: komparu J. Černý, *Thoth as Creator of Languages*, “Journal of Egyptian Archaeology”, n. 34, 1948, pp. 121–122; S. Sauneron, *La différenciation des langages...*, cit., passim.

kaj tagoj de Esiodo²¹), kiu estas la sama koncepto substanta la hebrean tradicion memorigata de Rashi. Laŭ la Platona vidpunkto, klaras ke reveno al la ‘oraj’ kondiĉoj de la originoj estas atendataj en iu estonta momento:

Aŭskultu. Tiun ĉi universon jen dio mem gvidas kune survoje kaj sekvas en ĝiaj movoj, jen li lasas ĝin iri, kiam la ĉirklaj movoj de la iro jam atingis la antaŭfiksitan tempolimon, kaj denove, moviĝante spontane, turnas sian orbiton al la kontraŭa flanko, ĉar ĝi estas vivanta estaĵo kiu ricevis bonŝance inteligenton fare de tiu, kiu lin konsistigis ĉe la komenco. [...] Necese okazas do en tiu evento la plej grandaj amasbuĉadoj de la aliaj bestoj, kaj ankaŭ la homa speco supervivas en malgranda parto: rilate ĉi ulojn okazas aliaj suferoj, multnombraj, nekredeblaj kaj neatenditaj, sed tiu ĉi estas la plej grava kaj kuniĝas al la universa renverso, kiam okazas la ŝanĝiĝo de la direkto laŭ senco kontraŭa al tiu nuntempa. [...] Tiu aĝo kiun havis ĉiu vivanta estaĵo, ĉi tiu la unua inter ĉiuj haltis, kaj ĉio, kio estis mortema, ĉesis pluiri al maljuneco ne plu havante la distingajn trajtojn de tiu aĝo, kaj ŝanĝante direkton laŭ kontraŭa senco estis generata pli juna kaj pli mola: la blankaj haroj de la pli maljunaj iĝadis nigraj, la glataj vangoj de tiuj, kiuj portas barbojn, portis denove ĉiun al la pasinta printempo, kaj la korpoj de la junuloj, iĝante ĉiun tagon kaj ĉiun nokton glataj kaj pli malgrandaj, revenis ree al la naturo de beboj, similaj al ili kaj en la animo kaj en la korpo. Ekde ĉi tiu punkto, nun jam konsumiĝinte, ili malaperis tute. Aliflanke, la kadavroj de tiuj, kiuj tiutempe estis mortantaj per perforta morto, spertiĝante per ĉi tiuj samaj okazaĵoj, rapide malaperis kaj en malmultaj tagoj estis neniigitaj. [...] Tiam la dio unue direktis la rotacion mem, tute zorgante pri ĝi, kaj – kio okazas same eĉ nun en kelkaj lokoj – ĉiuj partoj de la kosmo estis dividitaj de la dioj, kiuj regas ilin: kaj diaj demonoj kvazaŭ paŝtistoj dispartigis ankaŭ vivantajn bestojn laŭ la specoj kaj grupoj, kaj ĉiu tute sufcis por ĉiu grupo estante mem paŝtisto, sekve ne ekzistis sovaĝaj estaĵoj kaj neniu havigis manĝaĵon al aliaj, kaj tute ne ekzistis milito nek ribelo. Sed estus multe plu direnda pri tio, kio postvenis tiun aranĝon de la universo. Kion oni diras pri homoj kaj ilia vivo, en kiu ĉio produktiĝadis spontane, tion oni diris pro tiu kaŭzo. La dio gvidis ilin kaj estis ilia estro, kiel nuntempe la homoj, kiuj estas bestoj pli proksimaj al la dia naturo, paŝtas la aliajn speciojn kun malsupera rango: kiam la dio ilin paŝtis ne estis registaraj konsistoj, nek aĉeto de virinoj kaj infanoj. Ĉiuj revenis al la vivo el la tero, kaj ekzistis neniu rememoro de la antaŭa situacio: tiam ĉi tiuj varoj estis mankantaj, sed ili havis multe da fruktaroj kaj multaj aliaj plantoj, ne produktitaj per agrikulturo, sed proponitaj spontane de la tero. Nudaj kaj sen kovriloj ili vivis pasigante plej multan

21] La mito de la rasoj, pri kio J.-P. Vernant, *Mito e pensiero presso i Greci. Studi di psicologia storica*, Torino, Einaudi, 2001, pp. 15-90 donis nepran strukturan interpreton, kontemplas la kronologian sinsekvon de serio de kvin aĝoj en laŭgrada socia kaj kultura defalo. En la prezento de *Erga* 106-201 oni ne eksplicite mencias la eventualan oran monolingvismon de la unua fazo, sed la lingvistika temaro restas fone. (komparu D. Levine Gera, *Ancient Greek Ideas on Speech...*, cit., pp. 46-49 kaj 58).

tempon subĉiele: la sezonoj estis moderaĵoj tiel ke ili ne sentu doloron, kaj ili havis komfortajn litojn faritajn el abunda herbo kreskanta konstante de la tero. La vivo de kiu vi aŭskultas la rakonton, Sokrato, estas tiu de tiuj kiuj vivis en la epoko de Krono: tiun ĉi nuntempan, kontraŭe, kiun la parolado montras esti de la tempo de Zeŭso, vi mem spertas persone. [...] Se tiam tiuj, kiuj estis edukitaj de Krono, kiam ili havis multan tempon kaj la ŝancon renkontiĝi kaj paroli ne nur kun homoj, sed ankaŭ kun la bestoj, uzis ĉiujn tiujn favorajn cirkonstancojn por filozofio, konversante kun bestoj kaj inter si, kaj klopodante lerni de ĉiuj specoj, ĉu iu posedanta specialan kapablon iam spertis ion kio elstaris de la resto pliiĝante la kapitalon de la inteligenteco, facile oni juĝas ke ekzistas grandega diferenco, rilate al feliĉo, inter tiuj, kiuj vivas nun kaj tiuj kiuj vivis tiam: sed se pleniĝante ĝissate per nutraĵo kaj trinkaĵoj ili interparolis inter si kaj kun la bestoj dirante kion oni diras pri ili eĉ nun, ankaŭ tio, laŭ kio ŝajnas al mi, estas tre facile juĝebla (269c-272c).

REVENO AL LA ORIGINOJ: LA SENCO FONDI MONOLINGVAN ESTANTECON

Konsiderante tiun globalan kaj necesan mekanismon, estas kompreneble kiel la maloftaj utopi-lingvaj eksperimentoj dum la Antikveco, kiujn ni konas, ne kuraĝis proponi ian ajn universalistan klopodon. Temis pri lingvaĵoj kreitaj por apartaj kulturaj cirkonstancoj, tempe kaj space limigitaj, kiel la ‘ideala urbo’ de Alessarco el Makedonio (IV jc. a.K.), memorigitaj de Ateneo²², aŭ de imagitaj idiomoj kunigitaj kun ‘primitivaj’ popoloj konsiderataj ankoraŭ vivi en harmonio kun la naturo, kiel la literatura insulo de Iambulo en la rakonto de Diodoro el Sicilio²³. Kiu ajn alia antikva interlingva fenomeno baziĝas

22] Aleksarko, kiu fondis la urbon Uranopolo, importis en la lingvon multajn vortojn kaj apartajn parolmanierojn, nomante kokon ὀρθοβόας, t.e. “matena kantanto”; kaj barbiron βροτοκέρατης, t.e. “virtranĉanto”; kaj drakmon li nomis ἀργυρίς, “peco da arĝento”; kaj kenikon ἡμεροτροφίς, “kio nutras (homon) por unu tago”; kaj heroldo ἀπύτης, “kolportisto”. Foje li skribis leteron al la juĝistoj de Kasandreo en la jena formo: Ἀλέξαρχος ὁ μάρμων πρόμοις γαθεῖν. τοὺς ἡλιτορεῖς οἰῶν οἶδα λιποῦσα θεωτῶν ἔργων κρατήτορας μορσίμῳ τύχῃ κεκυρωμένος θεοῦ πόγαις χυτλώσαντες αὐτοὺς, καὶ φύλακας ὀριγένης. Sed tion, kion signifas ĉi tiu letero, mi opinias, ke eĉ Apolono Pita mem malfacile povus aserti. (Eraclide Lembo en Ateneo, *Deipnosophistai* III 54). komparu P. duBois, *The History of the Impossible: Ancient Utopia*, “Classical Philology”, n. 101, 2006, pp. 1-14: pp. 3-5; D. Astori, *Creazione linguistica...*, op. cit., p. 153.

23] Diodoro, *Bibliotheca historica*, II 55–60, raportas la rakonton de Iambulo (III–I jc. a.K.) pri la laŭdira malkovro de iu insulo antaŭe nekonata, e la Suda Oceano: la priskribo referencas evidente al la ĉefaj temoj de la mitoj de la Ora Epoko (harmonio inter homo kaj naturo, spontanaj fruktoj, ktp.) miksitaĵoj kun la plej tipaj priskriboj de la ‘mirindaĵoj’ de la ekzotaj landoj foraj je la konata mondo (fizikaj, sociaj, kulturaj strangaĵoj), kaj tiel la lingvaj kapabloj de tiu stranga popolo, ekipita per duobla lango kaj pro tio kapabla reprodukti ĉiun eblan lingvaĵon, eĉ la pepadon de la birdoj, estas ekzota *avatar* de la ‘ora’ monolingvismo.. Komparu N. Reggiani, *Parlare con la Natura...*, cit., kun la antaŭa bibliografio.

sur la disvastigo kaj sur la superrego de iu specifa jam ekzistanta lingvo, ekonomie aŭ kulture forta (la akadia de la tempoj de la Sargon-a imperio, fine de la III jarmilo a.K., ĝis la amarna epoko meze de la II jarmilo a.K.; la arama dum II-I jarmilo a.K.; la helena dum la klasika helena epoko).²⁴ La utopia tradicio daŭrigas praktike tiun iradon, priskribante ĉiam ‘perfektajn lingvojn’ kaj ‘perfektajn sociojn’, sed sen koncepti universalajn dimensiojn ĝis la plej proksimaj tempoj, kiuj preteriras la celojn (kaj la kompetentecon) de tiujn ĉi paĝoj.²⁵

Kvankam Zamenhof direktis siajn studojn al klasika formado kaj pro tio konis la helen-romanon parton de la tradicio, certe el la reakiro de la tradiciaj hebreaj radikoj, kaj finfine de la proksim-orienta fluo, kiu deziris revenon al la ‘ora’ kondiĉo de universala monolingvismo por pac(ig)a globala interkompreniĝo, venas lia ideo. En tiu preskaŭ profeta impulso, li povas do tute prave esti difinita “la homo kiu venkis Babelon”.

Tradukado de Nicola Minnaja

24] Komparu A. Bernini, N. Reggiani, *Le vie del multilinguismo...*, cit., pp. 48-49.

25] Komparu la revuon de U. Eco, *La ricerca della lingua perfetta...*, cit.; ankaŭ A. Bausani, *Le lingue inventate. Linguaggi artificiali – linguaggi segreti – linguaggi universali*, Roma, Ubaldini, 1974, pp. 98-144 estas esenca referenco. Oni vidu krome D. Astori, *Saussure e il dibattito (inter)linguistico sulle lingue internazionali ausiliarie a cavallo fra XIX e XX secolo*, “Atti del Sodalizio Glottologico Milanese”, n. 3, 2008, pp.102-120; F. Gobbo, *Fondamenti di interlinguistica ed esperantologia*, Milano, Cortina, 2009; D. Astori, *De Sargon al Eŭropa Unio: enserĉade de “lingvo por la mondo”*, en: *Perspectives of Language Communication in the EU*, ed. by D. Tekeliová, Nitra, Constantine the Philosopher University, Faculty of Central European Studies, 2016, pp. 43-49.

HISTORIO KAJ TUTMONDA DISVASTIĜO DE ESPERANTO

VERKI TEKSTON PRI LA "HISTORIO KAJ TUTMONDA DISVASTIĜO DE Esperanto" povas esti iomete tikla, ĉar tiu temo malfermas ege vastan, kvazaŭ senliman esplorkampon. Tial la sekvanta artikolo ne povas ĉiome pritrakti la historion, sed ĝi tiel nur enfokusigas kelkajn aspektojn, kiuj retrospektive montriĝis plej gravaj por la disvastiĝo de Esperanto. Ĉi-kuntekste la vorto "tutmonda" ne estas uzata en la senco de "ĉie en la mondo", sed en la senco de "en multaj lokoj kaj per multaj personoj en la mondo".

LA DISVASTIĜO DE ESPERANTO ANTAŬ LA UNUA MONDMILITO

Se oni konsideras, ke ekde la mezepoko kelkcent planlingvoj – ĉirkaŭ 250 inter 1880 kaj 1930 – estis ellaboritaj kaj publikigitaj,¹ sed nur ege malmultaj iĝis parolataj lingvoj de komunumoj, indas starigi la demandon: Kiel Esperanto povis entute disvastiĝi malgraŭ diversaj seriozaj obstakloj? Esperanto aperis en 1887 dum florepoko de naciismo kaj kulmino de kolonialismo, kiam la eŭropaj ŝtatoj disdividis Afrikon inter si. La plej granda parto de la lingvistoj kaj ĝenerale de la socio ne prenis ĝin serioza aŭ eĉ ne perceptis ĝin, la lingvo havis nenian influgrupon kaj ankaŭ la certagrada

1] A. Okrent, *In the land of invented languages. Esperanto rock stars, Klingon poets, loglan lovers, and the mad dreamers who tried to build a perfect language*, New York, Spiegel & Grau, 2009, pp. 298-314.

konkurenco kun aliaj planlingvoj kaŭzis relative malfavorajn antaŭkondiĉojn kaj kuntekston por la disvastiĝo de Esperanto. Retrospektive oni ja scias, ke la disvastiĝo estis ebla, sed en 1887 ĝi nek estis certa nek iel antaŭvidebla.

En la pasinteco pluraj sciencistoj okupiĝis pri la demando, kial Esperanto entute disvastiĝis, kaj preskaŭ ĉiu el ili venis al la konkludo, ke ne temis pri blinda hazardo, sed pri pluraj kaŭzoj, kiuj baziĝas precipe sur la grava, decida rolo de Ludwik Zamenhof (1859-1917).²

En sia libro "Esperanto and its rivals" la sociologo Roberto Garvía emfazis, ke same grava kiel la strukturo kaj kvalitoj de la lingvo estis la strategio, prezentita en la Unua Libro. Strategio, kiu ne nur antaŭenigis novan lingvon, sed ankaŭ novmaniere engaĝigis homojn por lingva disvastigo. Zamenhof intencis doni al homoj komunan lingvon, komunan ilon. Li estis konvinkita, ke la kreo de lingva korpuso kaj la establo de lingva komunumo estas multe pli gravaj ol la perfektigo de la lingvo. Tial li ankaŭ konsciis, ke estis esence identigi tiujn personojn, kiuj principe estis pretaj por lerni Esperanton. Saĝe, li metis en la *Unuan Libron* adreslipetojn kaj demandis la legantojn plenigi kaj resendi ilin. Per tio Zamenhof aktivigis interesitajn homojn, li invitis la komencontojn partopreni la projekton, li instigis ilin rapide lerni kaj uzi la lingvon, kaj per la eldono de adreslibroj³ li ligis la unuajn uzantojn de Esperanto, tiel, ke Roberto Garvía konkludas: "retrospektive la strategio de Zamenhof aspektas kiel majstraĵo de brila taktikisto".⁴



Ludwik Zamenhof,
Meĝdunarodnyj jazik. Predislovie i polnyj učebnik,
Varšava, Kelter, 1887.

- 2] R. Garvía, *Esperanto and its rivals. The struggle for an international language*, Philadelphia, University of Pennsylvania Press, 2015. D. Blanke, *Causes of the relative success of Esperanto*, "Language Problems and Language Planning", n. 3, 2009, pp. 251-266.
- 3] L. Zamenhof, *Adresaro de la personoj kiuj ellernis la lingvon "Esperanto"*, Varsovio, Zamenhof/Nurembergo, Tümmel, 1889-1908.
- 4] R. Garvía, *Esperanto and its rivals...*, cit., p. 68. Originala teksto: "Retrospectively, Zamenhof's strategy looks like the masterwork of a brilliant tactician."

En sia eseo "Causes of the relative success of Esperanto"⁵ Detlev Blanke (1941-2016) argumentas, ke la disvastiĝo de Esperanto baziĝas kaj sur lingvistikaj strukturoj kaj sur ne-lingvistikaj faktoroj. Blanke identigis jenajn sep strukturajn faktorojn, kiuj favoras Esperanton:

1. Por multaj personoj la leksikaj originoj de Esperanto estas facile rekoneblaj.
2. Esperanto havas facile kompreneblan fonologion.
3. Esperanto havas fonologian alfabeton kaj facilan ortografion.
4. Esperanto ne havas morfemajn variantojn.
5. Esperanto ebligas facilan kombinon de morfemoj por produktiva vortfarado.
6. Esperanto estas malferma rilate al la asimilado de novaj internaciaj leksikaj elementoj.
7. Esperanto estas karakterizita per precizaj markoj rilate al la ĉefklasoj de vortoj kaj de gramatikaj kategorioj.⁶

Krome Blanke substrekiĝis jenajn dek nelingvistikajn faktorojn, kiuj subtenis la disvastiĝon de Esperanto:

1. Esperanto konstituas lingvan projekton, kiu estas malferma por pluaj evoluoj.
2. La lingvo Esperanto estas ligita al humanisma idealo.
3. Zamenhof vidis lingvon kiel socian fenomenon. Laŭ lia vidpunkto lingvo ne povis dependi de unu persono.
4. Esperanto estis intendita por universala uzo.
5. Zamenhof vidis "sian lingvon" kiel lingvon por ĉiuj tavoloj de la socio.
6. Per Esperanto Zamenhof ankaŭ celis la protekton de etnaj lingvoj.
7. Zamenhof vidis Esperanton kiel praktikan ilon. Sekve li konceptis kaj iniciatis la lingvon, por ke ĝi rapide povu ekfunkcii en la praktiko.
8. Jam ege frue ekzistis tekstoj en Esperanto, kiuj stabiligis la lingvon, kio estis grava por novlernantoj.
9. Zamenhof atente permesis demokratiajn decidojn rilate al lingvaj reformoj.
10. La reformdiskutoj respondecis pri la frua establo kaj kodigo de "norma Esperanto".⁷

Blanke venis al simila konkludo kiel Garvía, kiam li notis:

5] D. Blanke, *Causes of the relative success of Esperanto...*, cit., pp. 251-266.

6] D. Blanke, *Causes of the relative success of Esperanto...*, cit., pp. 253-254.

7] D. Blanke: *Causes of the relative success of Esperanto...*, cit., pp. 255-258.

Zamenhof intuicie komprenis la esencajn problemojn de strukturo kaj funkciado de lingvo, interalie la rilaton inter lingva sistemo (langue) kaj ĝia konkreta aplikado (parole), la gravecon de la lingva komunumo, la rilaton inter stabileco kaj evoluo, kaj la problemon de normoj kaj ilian kodigon.⁸

Post la publikigo de la unua Esperanto-lernolibro *Internacia Lingvo*⁹, kaj dum la apero de la unua revuo *La Esperantisto*¹⁰, Esperanto relative rapide disvastiĝis dum la 90-aj jaroj de la 19-a jarcento – pro kaj malgraŭ prilingvaj diskutoj. En pli kaj pli da lingvoj aperis Esperanto-lernolibroj, kiuj estis kvazaŭ bazo por tradukoj en Esperanton, kaj tiel la literaturproduktado daŭre kreskis.¹¹ Precipe grava por la disvastiĝo de Esperanto montriĝis la jaro 1898. Tiam la franco Louis de Beaufront (1855-1935) ekeldonis la dulingvan franc-Esperantan revuon *L'Espérantiste*¹², kaj samjare li ankaŭ fondis la unuan nacian Esperanto-societon, la *Société Pour la Propagation de l'Espéranto*. Ene de mallonga tempo Beaufront varbis plurajn, en la publiko ege estimatajn personojn, kiuj iĝis komence de la 20-a jarcento la motoro de la internacia Esperanto-movado. Inter ili estis Émile Boirac (1851-1917), filozofo kaj rektoro de la universitatoj de Grenoble (1898) kaj Dijon (1902), Carlo Bourlet (1866-1913), matematikisto kaj profesoro pri mekaniko en Parizo, la lingvisto Théophile Cart (1855-1931), la generalo Hippolyte Sébert (1839-1930) kaj la okulkuracisto Émile Javal (1839-1907).

Pro tiu grava influgrupo kaj ankaŭ pro kontrakto (1901) kun la renoma eldonejo *Hachette*, kiu antaŭ la unua mondmilito eldonis pli ol ducent librojn en kaj pri Esperanto, jam en 1902 estis pli da esperantistoj kaj Esperanto-kluboj en Francio ol en iu alia lando.¹³

8] D. Blanke: *Causes of the relative success of Esperanto...*, cit., p. 255. Originala teksto: “Zamenhof intuitively understood the essential problems of structure and functioning of a language, among them the relation between linguistic system (langue) and its concrete application (parole), the importance of the language community, the relationship between stability and evolution, and the problem of norms and their codification.”


9] L. Zamenhof, *Meždunarodnyj jazыk. Predislovie i polnyj učebnik*, Varŝava, Kelter, 1887.

10] *La Esperantisto. Gazeto de la lingvo internacia Esperanto*, Nurembergo, 1889-1895.

11] Digitaĵoj sur la retejo de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: <https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/>

12] *L'Espérantiste. Organe propagateur de la langue internationale "Esperanto"*, Paris, 1898-1909.

13] En la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko troviĝas pli ol 240 diversaj libroj en kaj pri Esperanto, kiujn eldonis la eldonejo Hachette inter 1901 kaj 1914.



Adresaro de la kongresanoj en Boulogne-sur-Mer,
Boulogne-sur-Mer, Lajoie, 1905.

Plua grava paŝo por la disvastiĝo de Esperanto kaj pruvo por ĝia funkciado estis en 1905 la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.

La kongreso estis grava ne nur pro tio, ke ĝi estis la unua kunveno de pli ol 600 esperantistoj kaj la komenco de pli ol 100-jara tradicio, sed aparte gravaj estis la kongresaj decidoj kaj la sekvoj. En Boulogne-sur-Mer la libro *Fundamento de Esperanto*, eldonita jam en printempo 1905, oficiale iĝis la gvida dokumento, kvazaŭ la konstitucio de la lingvo. Aldone, por konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de Esperanto kaj por kontroli ĝian evoluon, estis fondita sendependa lingva institucio, la Lingva Komitato, kiu unuiĝis en 1948 kun sia akademio al la Akademio de Esperanto.



L. Zamenhof, *Fundamento de Esperanto. Gramatiko, ekzerkaro,*
universala vortaro, Paris, Hachette, 1905.

Pro la kongreso en Boulogne-sur-Mer la Esperanto-komunumo konsiderinde fortiĝis kaj la reto de Esperanto-parolantoj tiom plidensiĝis, ke Émile Boirac jam tiam nomis Esperanton vivantan socian fakton. En januaro 1908 Boirac skribis en letero al la nobelpremioto Wilhelm Ostwald (1853-1932):

Laŭ ni Esperanto estas lingvo jam ekzistanta, vivanta, simila en tiu rilato al naturaj kaj naciaj lingvoj, angla, franca, germana, k.t.p. Ĝi estas konsekvence kiel ili fakto kaj eĉ fakto sociala, kiu evolucios, same kiel ĉiuj socialaj faktoj, per la agado grandaparte meminciata de la homaro, kies vivon ĝi siamaniere ebligas.¹⁴

Post la 1-a Universala Kongreso de Esperanto la nombroj de Esperanto-grupoj kaj -periodaĵoj draste kreskis – eĉ triobliĝis inter 1906 kaj 1908 – de 434 grupoj al 1.300 kaj de 18 periodaĵoj al 59. Analizo de tiuj nombroj ankaŭ spegulas la jam tiam ekzistantan diversecon de la Esperanto-movado: interesiĝis pri la lingvo katolikoj, protestantoj, pacifistoj, militistoj, laboristoj, sciencistoj, vegetaranoj kaj multaj aliaj grupoj, kiuj ofte fondis proprajn Esperanto-asociojn kaj eldonis fakrevuojn. Aparte grava el tiuj asocioj estis la Universala Esperanto-Asocio, fondita en 1908 de la sviso Hector Hodler (1887-1920), filo de la fama pentristo Ferdinand Hodler (1853-1918).

Se oni starigas la demandon ”Kiom da personoj parolis Esperanton antaŭ la unua mondmilito?”, oni ricevas diversajn respondojn. Inter 1889 kaj 1909 ĉirkaŭ 22.000 personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto, sendis siajn nomojn kaj adresojn al Ludwik Zamenhof kaj en 1912 la Universala Esperanto-Asocio havis 7.816 individuajn membrojn.¹⁵ Fakte, ne ekzistis ekzakta nombro de Esperanto-parolantoj, ĉar tiam certe ne ĉiu esperantisto sendis sian adreson al Ludwik Zamenhof aŭ estis membro de la Universala Esperanto-Asocio. Edmond Privat (1889-1962) notis en sia libro *Historio de la lingvo Esperanto*, ke en 1914 ĉirkaŭ 40.000 personoj parolis Esperanton.¹⁶ Tamen, baziĝante sur la Zamenhofa adresaro ekzistas pri la disvastiĝo de Esperanto antaŭ la unua mondmilito ege interesa animacio, kiun kreis Marek Blahuš.¹⁷

14] *Letero: Émile Boirac al Wilhelm Ostwald, 18.01.1908*, en: *Leteroj de L.L. Zamenhof, II, 1907-1914*, eld. de Gaston Waringhien, Paris, S.A.T., 1948, p. 139.

15] Universala Esperanto-Asocio, *Oficiala Jarlibro 1913*, Genève, p. 34.

16] E. Privat, *Historio de la lingvo Esperanto. La movado 1900-1927*, Leipzig, Hirt, 1927, p. 90.

17] M. Blahuš, *Ciferecigo de la Zamenhofaj adresaroj. Rezultoj*, en: *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*, red. de K. Novotníčková, Partizánske, Espero, 2015, pp. 9-20.



L. Zamenhof, *Adresaro de la personoj, kiuj ellernis la lingvon "Esperanto", Serie I*, Varsovio, Zamenhof, 1889.

LA INTERMILITA PERIODO – FLOREPOKO DE ESPERANTO

Kiam en 1914 la granda milito komenciĝis, esperantistoj devis vole nevole adaptiĝi al la nova situacio. Dum la venontaj kvar jaroj ili plenumis diversajn taskojn per ĵurnaloj, per humanecaj agadoj aŭ ene de pacifismaj organizaĵoj. Malgraŭ tio la milito estis forta bato kontraŭ universalaj idealoj kiel tiuj de Esperanto.¹⁸

Post la unua mondmilito la Universala Esperanto-Asocio daŭrigis sian laboron, kaj en 1921 estis fondita nova influhava ligo, la Sennacieca Asocio Tutmonda. Ambaŭ asocioj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ funkcias, estis tre gravaj dum la intermilita periodo eldonante librojn kaj periodaĵojn, organizante ĉiujare apartan kongreson, kaj tiel kunigante kaj ligante siajn membrojn.

La Universala Esperanto-Asocio estis politike pli neŭtrala asocio, ĝia celo estis interalie "la plifaciligado de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj"¹⁹, kaj la Sennacieca Asocio Tutmonda rigardeblis "pli laborista asocio", kaj strebis precipe "utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro

18] J. Alcalde, J. Salguero (eld.), *Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto*, Paris, SAT-EFK, 2018.

19] Universala Esperanto-Asocio, *Oficiala Jarlibro por 1908*, Genève, p. 4.

tutmonda”²⁰. Sed fakte ambaŭ asocioj celis intensigi kaj fortigi la internaciajn ligojn de solidareco inter sia membraro.

La intermita periodo estis kvazaŭ florepoko de Esperanto, precipe en Eŭropo. Tion ankaŭ montras la havaĵo de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo en Vieno, kie konserviĝas pli ol 700 diversaj esperantlingvaj periodaĵoj eldonitaj inter 1918 kaj 1939 de plej diversaj sociaj grupoj.

Komence de la 20-aj jaroj la plenkunsido de la Ligo de Nacioj serioze, sed kvazaŭ senrezulte okupiĝis pri Esperanto, kiam precipe la delegitoj de malgrandaj, novfonditaj ŝtatoj subtenis la planon – sub la gvido de Lord Robert Cecil (1864-1958), kiu en 1937 ricevis la Nobel-premion pri paco – devige enkonduki Esperanton en lernejoj.²¹



Internacia Esperanto-konferenco ĉe la Ligo de Nacioj, Ĝenevo 1922.

Tiutempe, en 1927, Hugo Steiner (1878-1969) fondis influhavan centron, la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, kiu hodiaŭ kiel Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteka konservas kaj disponigas la plej ampleksan kolekton pri Esperanto kaj planlingvoj. Tiu fondo parte estis rezulto de forta politika subteno, kiun Esperanto relative longe ĝuis en Aŭstrio. Ankaŭ pro tio Vieno iĝis kvazaŭ centro de la Esperanto-movado: En la 20-jaroj ekzistis Esperanto-kursoj en Radio Vieno kaj en pluraj gazetoj, Esperanto-kursojn organizis poŝtovicistoj, policistoj, fervojistoj, laboristoj, katolikoj kaj ekde 1926 Esperanto estis ankaŭ fako en

20] Sennacieca Asocio Tutmonda, *Jarlibro 1923*, Paris, p. 10.

21] C. N. Biltoft, *Speaking the peace: Language, world politics and the League of Nations, 1918-1935*, Dissertation Princeton University, 2010.

lernejoj. Tiam Wien gastigis du Universalajn Kongresojn en 1924, respektive en 1936, kaj kongreson de la Sennacieca Asocio Tutmonda en 1925. Ĉirkaŭ 600 gastoj el 30 landoj ĉeestis en 1929 la solenan inaŭguron de la Esperanto-Muzeo, kaj en 1934 okazis internacia konferenco en la parlamento pri la temo *Esperanto en lernejoj kaj en praktiko*.²²



Afiŝo 28-a Universala Kongreso de Esperanto, Wien 1936.

Precipe en Eŭropo aparte famaj estis en la 20-aj kaj 30-aj jaroj la tiel nomataj Cseh-kursoj, Esperanto-amaskursoj laŭ speciala metodo de la katolika pastro Andreo Cseh (1895-1979), kiu en 1930 ankaŭ fondis kune kun Julia (1887-1971) kaj Johannes Rijk Gerardus Isbrücker (1889-1967) la Internacian Esperanto-Instituton. Tiu instituto, kiu ankoraŭ hodiaŭ funkcias en Den Haag, havas bibliotekon, arkivon kaj ankaŭ zorgas pri la okazigo de Esperanto-kursoj speciale laŭ la Cseh-metodo.²³

Pri la intermilita periodo gravas noti, ke ŝtatoj respektive politikistoj plej diverse traktis pri la fenomeno Esperanto. Ekzemple en Francio la instruado de Esperanto estis malpermesita inter 1922 kaj 1925,²⁴ ekde 1936 Esperanto-asocioj estis likviditaj en Germanio, kaj post la ankesado de Aŭstrio en 1938 tie sekvis la likvidadoj.²⁵ Jam pli frue nazioj disvastigis tute

22] B. Tuider, *Bibliothek und Ideologie – Die Nationalbibliothek in der Zwischenkriegszeit zwischen Deutschnationalismus und Esperantosammlung*, en: *Schatzkammer des Wissens. 650 Jahre Österreichische Nationalbibliothek*, eld. de J. Rächinger, Wien, Kremayr & Scheriau, 2018, pp. 130-137.

23] E. Borsboom, *Vivo de Andreo Cseh*, Hago, Internacia Esperanto-Instituto, 2003.

24] U. Lins, *Die ersten hundert Jahre des Esperanto*, en: *Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt. Begleitband zur Ausstellung an der Bayerischen Staatsbibliothek (19. Juni bis 9. September 2012)*, München, Allitera-Verlag, 2012, p. 98.

25] U. Lins: *Dangerous Language – Esperanto under Hitler and Stalin*, Basingstoke, Palgrave Macmillan, 2016, p. 117 kaj p. 123.

malĝustajn informojn, interalie, ke Esperanto estas juda lingvo aŭ Esperanto celas elimini aliajn lingvojn. Kvankam tio neniam estis la celo de Ludwik Zamenhof, tiuj negativaj stereotipoj estis efikaj kaj transdonitaj, parte eĉ ĝis la nuntempo. En la Sovet-Unio Stalin agis alimaniere ol Hitler, sed tamen lia agado havis similajn sekvojn. Dum la Granda Purigo (1936-1939) la Sovetia Esperanto-movado kvazaŭ pereis, plej multaj gvidaj Sovetiaj Esperantistoj estis mortpafitaj, aliaj estis deportitaj al laborkampoj kaj nur malmultaj travivis. En neniu alia lando homoj estis tiel persekutitaj por ilia engaĝiĝo por Esperanto, kiu tie precipe iĝis "danĝera lingvo" dum la 30-aj jaroj, ĉar Stalin strebis al Sovetia naciismo, kiu direktis sin kontraŭ internaciismo, kaj tiel ankaŭ kontraŭ la internacia korespondado en Esperanto.²⁶

POST LA DUA MONDMILITO – NOVAJ KOMENCOJ

Dum la dua mondmilito nur ekzistis limigitaj Esperanto-aktivaĵoj. Ekzemple en Budapeŝto kelkaj esperantistoj helpis al homoj, precipe Tivadar Soros (1893-1968) kaj la svedo Valdemar Langlet (1872-1960), kiu organizis en 1944/45 rifuĝpasportojn de la Sveda Ruĝa Kruco por minacataj judoj.²⁷ Tiel la totalismaj reĝimoj kaj la dua mondmilito interrompis la disvastiĝon de Esperanto kaj ĝi damaĝis al Esperanto pli draste ol la unua.

Post 1945 la Universala Esperanto-Asocio precipe celis atentigi internaciajn organizojn pri la lingva problemoj kaj pri Esperanto kiel ties solvo. En 1952 estis fondita CED, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, kiu ekde tiam okupiĝas pri la antaŭenigo de sciencaj esploroj pri Esperanto. En 1953 CED pretigis por Unesko raporton pri la stato de Esperanto en la mondo, kaj en 1954 la ĝenerala konferenco de Unesko en Montevideo akceptis rezolucion, kiu rekomendis, ke la ĝenerala direktoro de Unesko sekvu la evoluon en la uzado de la lingvo Esperanto:

La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto,

1. notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;
2. rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;
3. instrukas la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn;

26] U. Lins, *Die ersten hundert Jahre des Esperanto...*, cit., pp. 107-109.

27] T. Soros, *Maskerado ĉirkaŭ la morto. Nazimondo en Hungariujo*, La Laguna, Régulo, 1965.

4. notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo.²⁸

Kvankam la rezolucio havis nur konstatan karakteron, ĝi estis relative efika, ĉar tra la mondo aperis centoj da artikoloj pri la interŝtata agnosko de la pozitiva valoro de Esperanto.²⁹

En 1968 alia grava institucio estis fondita, la Esperantic Studies Foundation (ESF), kiu ekde tiam subtenas edukajn projektojn kaj sciencajn esplorojn pri Esperanto, ekzemple la retejojn *Edukadu.net* kaj *lernu!* aŭ la interlingvistikajn kaj esperantologiajn studojn ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań.³⁰

En 1987 la Jubilea Universala Kongreso okazis en Varsovio kun rekorda nombro de pli ol 5.900 partoprenantoj. Ĝis tiam la centro de la Esperantomovadoj estis Eŭropo kaj nur 6 Universalaj Kongresoj estis kunvenintaj ekster Eŭropo: Vaŝingtono (1910), San Francisko (1915), Tokio (1965), Portlando (1972), Braziljo (1981), Vankuvero (1984), Pekino (1986). Tio ŝanĝiĝis en la okdekaj jaroj kaj ekde tiam jam 14 Universalaj Kongresoj okazis ekster Eŭropo.

EVOLUOJ EN LA 21-A JARCENTO — LA VIRTUALA DISVASTIĜO

La plej gravaj evoluoj dum la pasintaj 20 jaroj estis la novaj ebloj, efikoj kaj influoj pro la interreto, kiu ofertas ege facilan aliron al Esperanto, precipe al kursoj, diĝitaj dokumentoj kaj interkonaj retejoj, kiuj donas indikon pri la disvastiĝo de Esperanto en la nuntempo.

La retejo *lernu!* ofertas Esperanto-kursojn en pli ol 30 diversaj lingvoj, ekde 2002 pli ol 270.000 personoj el pli ol 100 landoj tiel eklernis Esperanton, plej multaj el Usono (35.196), Brazilo (19.419) kaj Ĉinio (10.932).³¹

Alia retejo, sur kiu oni povas lerni Esperanton, estas Duolingo, kie jam pli ol 1.350.000 personoj eklernis ĝin per la angla versio, pli ol 385.000 per la hispana kaj pli ol 4.000 per la portugala. La franca versio de tiu Esperanto-kurso plej verŝajne aperos en 2019.³²

28] *Originalaj Tekstoj de la Unesko-Rezolucio pri Esperanto en la Hispana, Angla kaj Franca Lingvoj*, En: "Revuo Esperanto Internacia", N-ro 591 (2) 1955, p. 34.

29] M. R. Andersen, *50-jara datreveno de la Montevidea rezolucio favore al Esperanto. 1954 – 10 decembro – 2004*, Kopenhago, Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, 2007.

30] Retejo de la Esperantic Studies Foundation: www.esperantic.org

31] Nombroj laŭ la stato de junio 2018. Retejo de lernu: www.lernu.net

32] Nombroj laŭ la stato de junio 2018. Retejo de duolingo: www.duolingo.com

Ekde 2017 ekzistas aplikaĵo nomita *amikumu*, per kiu oni povas serĉi kaj trovi Esperanto-parolantojn. Sur tiu aplikaĵo homoj povas registriĝi, poste noti, kiujn lingvojn ili parolas, kaj tiel trovi samlingvanojn. Ene de unu jaro aliĝis pli ol 10.000 personoj, el kiuj la plej granda parto loĝas en Eŭropo kaj en Usono, sed estas ankaŭ multaj en Sudameriko kaj en Orient-Azio.³³

Ankaŭ la aliro al Esperanto-bibliotekoj plifaciliĝis dum la pasintaj du jardekoj pro diĝitizaj projektoj kaj la daŭra pliampleksigo de la virtualaj legsalonoj. Tiel sur la retejo de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko jam estas legeblaj pli ol 1.200 libroj kaj pli ol 130 diversaj periodaĵoj kun pli ol 1.000 jarkolektoj.³⁴ Krome videblas en Trovanto, la katalogo de la Kolekto por Planlingvoj, la diĝitizaĵoj de ĉirkaŭ 7.500 fotografajoj, 3.000 muzeaj objektoj, 2.500 bildpoŝtkartoj kaj 1.000 afiŝoj.³⁵ La nombro de diĝitaj dokumentoj plialtiĝos ankaŭ dum la venontaj jaroj, tiel ke en la estonteco kreskanta parto de la havaĵo estos rete konsultebla.

Generale la ebloj Esperante komuniki en la interreto estas kvazaŭ senlimaj: en 2016 pli ol 300.000 personoj indikis sur facebook, ke ili parolas la lingvon. Multaj Esperanto-parolantoj ankaŭ uzas aliajn sociajn retojn kiel twitter, instagram, tumblr aŭ flickr. Se oni serĉas sur la retejo youtube laŭ la vorto “Esperanto”, oni ricevas pli ol 300.000 rezultojn – nombro, kiu daŭre kreskas.³⁶ Krome de tio ankaŭ ekzistas granda diverseco de blogoj kaj podkasto en Esperanto. Unu el la plej aktivaj Esperanto-organizoj en la interreto estas *E@I* (Edukado@Interreto), kiu ekde sia formiĝo en 1999 realigis plurajn projektojn – plej konataj estas *lernu!*, *lingvo.info* kaj *komputeko*.³⁷

Prognozaj pri la estonteco de lingvo ne ĉiam montriĝas ĝustaj, ĉar oni neniam povas ekzakte antaŭvidi la lingvan evoluon – nek laŭ la nombro de parolantoj nek laŭ la lingvoŝanĝiĝo – eĉ ne por la venontaj 50 jaroj. Tamen, rilate al Esperanto eblas singarde konstati, ke la evoluo de la pasintaj dek jaroj plej verŝajne daŭrigos almenaŭ en la venontaj dek, tiel ke la nombro de parolantoj iomete kreskos, Esperanto-literaturo kaj -muziko pli kaj pli publikiĝos en la interreto, sed samtempe la realaj renkontiĝoj, la rekta, senpera, buŝa komunikado en Esperanto daŭrigos kaj restos alloga kaj fascina por lernantoj kaj por fluparolantoj de la internacia lingvo.

33] Retejo de amikumu: www.amikumu.com

34] Nombroj laŭ la stato de junio 2018. Diĝitaj dokumentoj de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo: <https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/>

35] Nombroj laŭ la stato de junio 2018. Ligilo al la katalogo Trovanto: https://search.onb.ac.at/primo-explore/search?query=&tab=onb_undersammlungen&search_scope=ONB_esperanto&vid=ONB&lang=de_DE&offset=0

36] Nombro laŭ la stato de junio 2018.

37] Retejo de Edukado@Interreto: www.ikso.net

BIBLIOGRAFIO – PRESAĴOJ

- Adresaro de la kongresanoj en Boulogne-sur-Mer*, Boulogne-sur-Mer, Lajoie, 1905.
- Alcalde J., José Salguero (eld.), *Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto*, Paris, SAT-EFK, 2018.
- Andersen M.R., *50-jara datreveno de la Montevidea rezolucio favore al Esperanto. 1954 – 10 decembro – 2004*, Kopenhago, Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, 2007.
- Biltoft C. N., *Speaking the peace: Language, world politics and the League of Nations, 1918-1935*, Dissertation Princeton University, 2010.
- Blahuš M., *Ciferecigo de la Zamenhofaj adresaroj. Rezultoj*, en: *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*, red. de Katarína Novotníčková, Partizánske, Espero, 2015.
- Blanke D., *Causes of the relative success of Esperanto*, “Language Problems and Language Planning”, n. 3, 2009, pp. 251-266.
- Borsboom E., *Vivo de Andreo Cseh*, Hago, Internacia Esperanto-Instituto, 2003.
- L'Espérantiste. Organe propagateur de la langue internationale “Esperanto”*, Paris, 1898-1909.
- La Esperantisto. Gazeto de la lingvo internacia Esperanto*, Nurembergo, 1889-1895.
- Garvia R., *Esperanto and its rivals. The struggle for an international language*, Philadelphia, University of Pennsylvania Press, 2015.
- Lins U., *Die ersten hundert Jahre des Esperanto*, en: *Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt. Begleitband zur Ausstellung an der Bayerischen Staatsbibliothek (19. Juni bis 9. September 2012)*, München, Allitera-Verlag, 2012.
- Lins U., *Dangerous Language – Esperanto under Hitler and Stalin*, Basingstoke, Palgrave Macmillan, 2016.
- Okrent A., *In the land of invented languages. Esperanto rock stars, Klingon poets, loglan lovers, and the mad dreamers who tried to build a perfect language*, New York, Spiegel & Grau, 2009.
- Originalaj Tekstoj de la Unesko-Rezolucio pri Esperanto en la Hispana, Angla kaj Franca Lingvoj*, En: “Revuo Esperanto Internacia”, N-ro 591 (2) 1955, p. 34.
- Privat E., *Historio de Esperanto. La Movado, 1900 – 1927*, Leipzig, Hirt, 1927.
- Sennacieca Asocio Tutmonda, *Jarlibro 1923*, Paris.
- Soros T., *Maskerado ĉirkaŭ la morto. Nazimondo en Hungarijo*, La Laguna, Régulo, 1965.
- Tuider B., *Bibliothek und Ideologie – Die Nationalbibliothek in der Zwischenkriegszeit zwischen Deutschnationalismus und Esperantosammlung*, en: *Schatzkammer des Wissens. 650 Jahre Österreichische Nationalbibliothek*, eld. de Johanna Rachinger, Wien, Kremayr & Scheriau 2018, pp. 130-137.
- Universala Esperanto-Asocio, *Oficiala Jarlibro por 1908*, Genève.
- Universala Esperanto-Asocio, *Oficiala Jarlibro 1913*, Genève.
- Waringhien G. (eld.), *Leteroj de L.L. Zamenhof, II, 1907-1914*, Paris, S.A.T., 1948, p. 139.
- Zamenhof L., *Meždunarodnyj jazyk. Predislovie i polnyj učebnik*, Varšava, Kelter, 1887.
- Zamenhof L., *Adresaro de la personoj kiuj ellernis la lingvon “Esperanto”*, Varsovio, Zamenhof/Nurembergo, Tümmel, 1889-1908.

BIBLIOGRAFIO — RETEJOJ

Amikumu: www.amikumu.com

Digitaj dokumentoj de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo: <https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/>

Duolingo: www.duolingo.com

Edukado@Interreto: www.ikso.net

Esperantic Studies Foundation: www.esperantic.org

Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko:

Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko: <https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/>

Lernu: www.lernu.net

Trovanto: https://search.onb.ac.at/prim-explore/search?query=&tab=onb_sondersammlungen&search_scope=ONB_esperanto&vid=ONB&lang=de_DE&offset=0

POLITIKAJ ASPEKTOJ EN LA HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO

MALSAME OL CENTOJ DA SIMILAJ LINGVO-PROJEKTOJ, ESPERANTO iĝis vivanta lingvo, kiu travivis la morton de ĝia iniciatinto. Laŭ kelkaj fakuloj, tio ŝuldas al la fakto, ke ĝi enhavas etikajn valorojn, kiuj ebligis ĝiajn subtenantojn venki malfacilajn momentojn de dividoj kaj persekutoj.¹ Tio estas, Zamanhof postlasis sian homisman kaj pacisman sintenon al socia movado kreita de la apogantoj de tiu ĉi internacia lingvo. Komprenita diversmaniere, tiu interna ideo influis politike en pluraj historiaj momentoj. Mi ne celas enciklopedie klarigi ĉiujn el ili. Tamen, mi prezentos aron da ekzemploj, kiuj kune montras kompleksan kaj nuanc-plenan soci-politikan bildon de la Esperanto-movado.

La strukturo de la artikolo estas jena. Unue, mi mencias la funkcion de Esperanto ene de la proleta movado. Due mi pritraktos la subpremadojn, kiun multaj esperantistoj suferis en malsamaj diktaturoj. Trie, mi analizos iom pli detale la rolojn luditajn de tiu ĉi internacia lingvo dum la Hispana milito. Kvare, mi argumentos, ke esperantismo kaj pacismo estas tre proksimaj vortoj. Kvine, mi priskribos la humanan agadon de kelkaj esperantistoj, kiuj riskis siajn vivojn por konstrui mondon pli justan kaj dignan. Konklude,

1] Vidu, ekzemple, R. Garvía, *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language*, Philadelphia, University of Pennsylvania Press, 2015.

mi defendos, ke indas valorigi kaj de fakuloj, kaj de aktivuloj, la politikan dimension de Esperanto (kaj de ĝiaj subtenantoj).²

LA LATINO DE LA PROLETAR’

Kiam oni esploras la rilatojn inter Esperanto kaj politiko, ofte aperas forta ligo kun la proleta movado. En Francio, ĉefe kun la komunismo. En aliaj mondopartoj, kiel Hispanio sed ankaŭ en Orienta Azio, tio kutime okazas kun la anarkiismo.³ Internacie, estas konata la rolo ludata de asocioj kiel Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu dum la intermilita epoko influis samnivele kiel la neŭtralaj esperantaj asocioj. Kvankam ĝi havis malpli da rimedoj ol la burĝa esperantistaro, SAT sukcese produktis gravajn ilojn de la esperantismo, ekzemple la Plenan Ilustritan Vortaron.⁴ Ĉu tio estas hazardo aŭ ĉu tio okazis ĉar la laboristoj komprenis, ke la interna ideo rilatas al (klasbatala) solidareco inter homoj kaj homoj kaj tial ili pli sinofere pritraktis la aferon?

Historie, la neceso de internacia helplingvo jam estis en la tagordo de pluraj Internacioj kaj kunvenoj de la proleta movado eĉ antaŭ la publikigo de la unua zamenhofa gramatiko en 1887.⁵ Tial, Esperanto enŝoviĝis perfekte en tiaj idealismaj medioj. Oni vidis ĝin kiel efikan komunikilon por unuiĝi kun la proletoj de aliaj landoj, tiel superante la lingvajn kaj naciismajn barilojn, kiujn uzis la kapitalo por subpremadi la laboristojn. Aldone, temis pri lingvo (relative) facile lernebla, eĉ de homoj, kiuj laboris dekon da horoj ĉiutage en fabriko aŭ en la kamparo. Ĝis tiam internacia komunikado okazis pere de malmultaj instruitaj homoj, scipovantaj diversajn (Eŭropajn) lingvojn. La *latino de la proletoj* kapablis demokratiigi tiun sistemon, pri kiu nur profitis la ekonomian kaj politikan eliton.

Okaze de la 5-a Universala Kongreso en 1909, Zamenhof alparolis la lokan proletaron en Barcelono, konfesante ke la estonteco de la lingvo

2] Kvankam la politika flanko de Esperanto ankaŭ rilatas al debatoj pri lingva justeco, lingva diskriminacio ktp, mi ne pritraktos ilin ĉi tie. Koscie kaj intence mi fokusigos pri la politikaj aspektoj ekster tiu lingva dimensio.

3] Por la hispana kazo, vidu la duan ĉapitron de D. Marin, *Anarquistas. Un siglo de movimiento libertario en España*, Barcelono, Ariel, 2010. Por la japana kazo, vidu S. Konishi, *Provincialising the State: Symbiotic Nature and Survival Politics in PostWorld*, en: *New Worlds from Below. Informal life politics and grassroots action in twenty-first-century*, kun. de T. Morris-Suzuki kaj E. Jeong Soh, ANU Press, 2017, pp. 15-36, alirebla je: <http://www.jstor.org/stable/j.ctt1pwt47.6>

4] Vidu V. Markov, “*Sennacieca Asocio Tutmonda: no importando a ideologia, um ponto de encontro duradouro dos trabalhadores esperantistas*”, en: *O Esperanto além da língua*, kun. de G. Fians kaj F. Pita, Porto Velho – Rondônia, Brazilo, Temática Editora, 2017, pp. 216-229.

5] Vidu la unuan ĉapitron de T. Abelló, *Les relacions internacionals de l’anarquisme català*, Barcelono, Edicions 62, 1987.

ligiĝas al la laborista movado.⁶ Poste, la mondmilitoj ŝajnis pravigi lin, ĉar ili forte batis, kaj la klopodojn de la klasa uniĝo fronte al la patriotismo, kaj la utopiajn movadojn celantajn homan interfratiĝon, kiel Esperanton. Krome, la totalismaj reĝimoj de tiu periodo persekutis esperantistojn, ne nur metafore, sed ankaŭ fizike.

LA DANĜERA LINGVO

Kiel klarigas la jam klasika verko de Ulrich Lins, pluraj diktaturoj konsideris esperantistojn kiel siajn malamikojn.⁷ Hitler kaj Stalin, interalie, eksplicite klopodis ekstermi tiajn danĝerajn homojn. Ili timis ilin, ĉar “Esperanto peras nekontroleblajn pensojn kaj kontribuas al malfirmigo de la nacia lojaleco”.⁸ Kiel pruvo, ili montris la internaciajn kontaktojn, kiujn esperantistoj havis danke al sia nekontrolebla lingvo.

Interese estas, ke tia persekuto okazis en diktaturoj de malsama signo. El tiu perspektivo, la politika dimensio de Esperanto rilatas ne nepre rilatas al konkreta ideologio, sed pli ĝenerale al la libero, al la libera pensado, kaj ankaŭ al la pacismo de la interna ideo, kiu faciligas rektajn internaciajn rilatojn. Temas pri valoroj, kiuj ne kongruas kun la agresema naciismo postulata de totalismaj reĝimoj.

Tamen, la Esperanto-movado estas heterogena, inkludanta homojn el ĉiu kredo kaj socia kondiĉo. Tiel, ankaŭ ekzistis esperantistoj, kiuj subtenis tiujn reĝimojn pro ideologio aŭ (plej ofte) kiel strategio por supervivi ekstreme malfacilan periodon kiel esperantistoj kaj eĉ kiel homoj.⁹

Ĝenerale, oni povas diri ke la esperantistoj suferis en kuntekstoj kiam ankaŭ la libero suferis. Kaj tio okazis (kaj okazas) ne nur en diktaturoj. Konata ekzemplo de demokratia reĝimo, kiu grandskale subpremis suspektindajn personojn, estis Usono dum la makartismo.¹⁰ Denove esperantistoj persekutis

-
- 6] Vidu F. Poblet, *La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono*, Barcelono, Kataluna Esperanto-Asocio, 2008.
- 7] Vidu U. Lins. *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ esperanto*, 3a eldono, Roterdamo, Universala Esperanto-Asocio, 2016. Vidu ankaŭ U. Lins, *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ esperanto*, 2a eldono, Moskvo, Progreso, 1990.
- 8] Vidu la intervjuo kun Ulrich Lins *Novaj detaloj pri persekuto de esperantistoj trovitaj*, “Libera Folio”, 26 de Septembro de 2016, alirebla je: <http://www.liberafolio.org/2016/09/26/novaj-detaloj-pri-persekuto-de-esperantistoj-trovitaj/>
- 9] Menciinda kazo tiurilate estas Adalberto Smit, nederlanda esperantisto, kiu subtenis nazismon. Vidu T. Jung, *Ĉiu-Ĉiun. Sep jardekojn en la Esperanto-movado. Memorajoj de 86-jara optimisto*, Antverpeno kaj La Laguna, Stafeto, 1979, p. 269.
- 10] Tiun temon iom pritraktas I. Lapenna, U. Lins kaj T. Carlevaro, *Esperanto en perspektivo: faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo*, Roterdamo, Universala Esperanto-Asocio, 1974. Vidu ankaŭ E. Schor, *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language*, Novjorko, Metropolitan Books, 2016.

aliajn esperantistojn. Ĉu tio malebligas nin ligi la internacian lingvon kun la konkretaj valoroj ĵus menciitaj?

Simila dilemo aperas kiam oni konsideras la esperantan agadon en intercivitanaj militoj, kie nature esperantistoj batalas kontraŭ esperantistoj. Tiurilate, la Hispana milito (1936-1939) aparte esplorindas pro la riĉeco de roloj luditaj de la internacia helplingvo. Ĝia ekzameno helpas al ni lumigi la politikan dimension de la Esperanto-movado.

ESPERANTO EN LA HISPANA MILITO

En Julio de 1936 parto de la hispana armeo ribelis kontraŭ la lauleĝa respubliko en Hispanio kaj ĝia maldekstra koalicia registaro. Tamen, la rapida puĉo celita de la militistoj fiaskis pro la rezistado de la popolo en pluraj regionoj de la lando. Tiel ekis milito (ne nur inter hispanoj), kiu daŭris tri longajn jarojn. La venko de la ribeluloj en 1939 signifos kvar jardekojn de faŝisma diktaturo en unu el la plej totalismaj reĝimoj de la pasinta jarcento. Kiel vidote, la roloj de la esperantistoj dum la Hispana milito spegulis la politikajn nuancojn de la tiea Esperanto-movado. Laŭ Del Barrio kaj Lins, “en la esperantista movado troviĝis personoj dekstraj kaj maldekstraj, homoj do, kiuj baldaŭ alfrontis unu la alian en la batalkampoj.”¹¹ Tiel, hispanaj esperantistoj batalis ambaŭflanke, kvankam sia partopreno en la milito malsamis kvante kaj kvalite. Dum kelkaj (ĉefe militistoj kaj religiuloj) aliĝis al la ribela flanko, inter la respublikanoj Esperanto estis elemento pli regule kaj vaste uzata, ekzemple por propagandaj celoj; interalie, de la komunistoj kaj de la anarkiistoj, de la kataluna registaro kaj ankaŭ de internaciaj brigadistoj.

En la lukto kontraŭ la faŝismo, oni eĉ klopodis krei tutan roton de esperantistoj, nomita *kolumno Antaŭen*.¹² Kvankam fine tiu ideo ne efektiviĝis,¹³ tio tamen montras, ke en la respublikana flanko partoprenis internaciaj brigadistoj, kiuj scipovis Esperanton. Anekdote, kelkaj el ili estis atletoj.

Fakte, inter la unuaj eksterlandanoj en la demokratia armeo menciindas dekoj da atletoj, kiuj vojaĝis al Barcelono por partopreni la Popolajn Olimpiajn

11] La ĉefa referenco pri 3. Esperanto en la Hispana milito estas T. Del Barrio kaj U. Lins, “*La utiligado de Esperanto dum la Intercivitana Hispana Milito*”, en: *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*, kun. de F. Poblet kaj H. Alòs, Barcelono, Kataluna Esperanto-Asocio, 2010, alirebla je: <http://www.nodo50.org/esperanto/artik68.htm>. Mi varme konsilas ĝian legadon por scii pliajn detalojn, inkluzive de kromaj roloj de Esperanto en la Hispana milito.

12] Vidu la anoncojn prie en la hispana ĵurnalo *La Vanguardia* la 27-an de Aŭgusto, 30-an de Aŭgusto kaj 6-an de Septembro de 1936.

13] Vidu la esploron faritan tiurilate de J. Hierai, *Hispana, Kataluna, Mangada – verkoj de Dil Avia*, Osaka, Riveroj, 2003. Ankaŭ konfirmis al mi tiun ĉi neefektivigon Eduardo Vivancos, veterano de la Hispana milito, en intervjuo farita en Toronto la 15-an de Majo de 2017.

Ludojn.¹⁴ Okazinta kiel bojkoto al la Olimpiaj Ludoj de Berlino samjare, la popola evento kunigis milojn da sportemuloj. Inter ili, abundis la grupoj, kiuj ne estis bonvenaj en la nazia ludoj, kiel komunistoj kaj judoj. Ĝenerale, temis pri homoj venintaj el proletaj medioj, en kiuj ne mankis esperantistoj. Sekve, Esperanto estis unu el la lingvoj uzataj de la organizantoj de tiuj olimpikoj,¹⁵ kiuj kunordigis la tradukan servon en la internacia lingvo kun la Kataluna Esperanto-Federacio.¹⁶ Inter la membroj de la plenumkomitato de tiu sporta evento ĉefrolis Jaime Miravittles, multflanka intelektulo kaj ankaŭ esperantisto.

Kiam ekis la milito, Miravittles iĝis Komisararo pri Propagando de la kataluna registaro, kunordigante teamon de preskaŭ 150 homoj.¹⁷ Tiu komisarejo produktis diverslingve propagandajn eldonaĵojn, afiŝojn kaj filmojn. En Septembro de 1937 ĝi organizis grandan ekspozicion pri la 50-a datreveno de la internacia lingvo dum semajno plena de prelegoj kaj artaĵoj, pri kiuj detale raportis la gazetaro.¹⁸ Kongrue kun la alianco en la respublikana flanko inter maldekstruloj kaj katalunistoj, la temoj de tiuj prelegoj kombinis interalie laboristajn interesojn kaj tiujn de la kataluna naciismo.¹⁹ En tia agado, la komisarejo kunlaboris kun la Kontraŭfaŝista Esperanto-Komitato de Katalunio, kiu kunigis ĉiujn esperantajn grupojn aktivajn en Katalunio. Dum la funda kunveno de tiu komitato, Miravittles publike diris: “Mi esperas, ke Esperanto helpas al la rapida venko super la faŝismo kaj al la instaligo de paco

-
- 14] La inaŭguro de tiuj ludoj estis planita por la 19-an de Julio, sed la puĉo malebligis ĝian okazon. Tiun eventon priskribas la tiama partopreninto Eduardo Vivancos en teksto verkita katalune en 1992. Vidu ĝin esperante, “*La aliaj Olimpiaj Ludoj en Barcelono*”, en E. Vivancos, *Mia taglibro (1937-1938) kaj aliaj tekstoj*, komentitaj kaj traduktitaj de J. Alcalde, Madrido, SATeH, preseje.
- 15] Konata bildo de organiza budo de la Olimpiaj Ludoj montras indikojn en kelkaj lingvoj. Krom la kataluna, ili estas en la hispana, angla, franca kaj en esperanto: *informado, turismo, loĝigado*. Vidu ĝin en jena artikolo de la hispana ĵurnalo *El País* publikigita la 19-an de Julio de 2016, alirebla je: https://elpais.com/ccaa/2016/07/18/catalunya/1468872650_817020.html
- 16] Vidu anoncon publikigitan en *La Vanguardia* la 10-an de Julio de 1936 de Kataluna Esperanto-Federacio. Tiu anonco celis kontakti esperantistojn interesitajn pri helpado en tiu servo de tradukado kaj interpretado por la alvenontaj esperantaj sportemuloj.
- 17] Vidu la organizan strukturon de tiu Komisarejo pri Propagando en E. Pujol kaj R. Pascuet, *La revolución del bon gust. Jaime Miravittles i el Comissariat de Propaganda de la Generalitat de Catalunya (1936 – 1939)*, Barcelono, Viena, 2007, p. 56.
- 18] Vidu la artikolojn publikigitajn prie en *La Vanguardia* inter la 28-a Augusto kaj la 12-a Septembro 1937.
- 19] Inter la unuaj, *Esperanto kaj la unuiĝo de la proleta klaso*, de F. Miró, kaj *Esperanto kaj la plibonigo de la proletaro*, de F. Surinyac. Pri la duaĵ, *Natura patriotismo, politika patriotismo kaj Esperanto*, de akademiano Delfi Dalmau, kaj *Katalunio kaj la internacia lingvo*, de S. Roca. Aldone, aliaj konferencoj pritraktis la jenajn temojn: *Esperanto kaj la Ruĝa Kruco*, de F. Gorgues, *Esperanto kaj la blindulo*, de A. Martínez, kaj *Esperanto kaj la gazetaro*, de la ukraina ĵurnalista O. Kupperman. Kroma elstara preleganto estis Jaime Grau Casas, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

kaj kulturo en nia lando”.²⁰ Ĉefa rezulto de tiu kunlaborado estis la eldono fare de la kataluna registaro de dusemajnaj gazetarkomunikoj en Esperanto. Jarojn post la milito, Miravitlles deklaris, ke tiuj gazetaraj komunikoj celis atingi la [internaciajn] anarkiistojn.²¹

Temis pri populara ideologio en la tiutempa Iberia Duoninsulo. Tiel, esperantaj anarkiismaj rondoj multnombris ankaŭ en Katalunio ekde la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento kaj intense aktivis dum la milito. Jam en julio 1936 aperis *Informa Bulteno*, eldonita de la sindikato CNT en Barcelono kaj disvastigita internacie. En Bulgario, ekzemple, tiu bulteno helpis al la varbado de novaj brigadistoj por la respublikana flanko.²² Aliflanke, proletaj partioj, kiuj eldonis esperantlingvajn bultenojn estis la marksisma sed kontraŭstalinisma POUM (*Informa Bulteno POUM* kaj *La hispana revolucio*), kaj la kataluna komunisma PSUC (*Informoj pri Hispanio* kaj *Unueco*). Pli ligita al ortodoksa komunismo kaj altkvalite redaktita estis *Popola Fronto*, eldonita de la Grupo Laborista Esperantista de Valencio kaj atinginta 5000 ekzemplerojn. Aldone, pluraj el ili (kaj ankaŭ aliaj partioj kaj sindikatoj) regule elsendis radie en Esperanto.

Post la ribela venko, multaj esperantistoj ekziliĝis kaj suferis la terurajn kondiĉojn de la francaj koncentrejoj, inkluzive de la francaj kolonioj en Afriko, sed ankaŭ en la germanaj kampoj.²³ Aliaj restis en Hispanio kaj suferis siavice la subpremadon de la diktaturo. La esperanta movado en Hispanio tre malfacile reaktivis, kaj tio nur povis okazi danke al la apogo de esperantistoj ene de la venkinta flanko, ĉefe el religiaj medioj.

Tiu ĉi (milita) konflikto montras la kompleksan de la esperanta movado el ideologia perspektivo. Ja veras, ke estis Esperantistoj en ambaŭ flankoj. Ja veras, ke kelkaj el ili estis faŝistoj. Tamen, kaj kvante kaj kvalite, la rolo de Esperanto inter la respublikanoj klare superis tiun de la ribela flanko, kiel atestita de la jena anekdoto. En majo de 1938 okazis epika fuĝo de 795 homoj de malliberejo en Ezkaba, en la Navara regiono. Ŝlosila aspekto

20] Vidu F. Poblet, “*Serĉante universalan lingvon: La esperantista movado en Katalunio*”, en: *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*, kun. de F. Poblet kaj H. Alòs, Barcelono, Kataluna Esperanto-Asocio, 2010, pp. 253-260.

21] Vidu E. Boquera, *La batalla de la persuasió durant la Guerra Civil. El cas del Comissariat de Propaganda de la Generalitat de Catalunya (1936-1939)*, doktora disertacio, Universitat Ramon Llull, Facultat de Comunicació i Relacions Internacionals Blanquerna, Departament de Comunicació, 2015, p. 304.

22] Vidu N. Mladenov, *Esperantistoj en la Hispana Civitana Milito*, “Bulgara Esperantisto” n. 2, 1987, pp. 4-5. Citita en T. Del Barrio kaj U. Lins, “*La utiligado de Esperanto dum la Intercivitana Hispana Milito*”, en: *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*, kun. de F. Poblet kaj H. Alòs, Barcelono, Kataluna Esperanto-Asocio, 2010.

23] Vidu la kortuŝan taglibron en la francaj koncentrejoj de J. Grau Casas, *Tagoj kaj ruinoj*, elstare tradukita kaj komentita de Miguel Fernández, Madrido, SATeH, 2017.

pri tiu esplorinda aventuro estis la uzo de Esperanto kiel komunika lingvo inter pluraj organizantoj de la fuĝo.²⁴ Kompreneble, ĝi nur povis roli kiel sekreta lingvo, ĉar la gardistoj ne scipovis ĝin. Ĉu tio estis hazardo aŭ ĉu ĝi okazis nature, ĉar la valoroj ligataj al la internacia lingvo pli kongruas kun tiuj defenditaj de la respublikanoj kaj pro tio Esperanto estis multe pli disvastigita inter ili ol inter la faŝistoj?

Kroma paradokso kuŝas en tio, ke ne malgranda kvanto da esperantistoj, kiuj batalis kontraŭ la faŝismo dum la Hispana milito (kaj ne nur) estis elkoraĵ pacistoj, kiuj tamen en eksterordinaraj cirkonstancoj decidis agi kontraŭnature. Por profundigi tiun ĉi temon, la jena sekcio pritraktos la ligan inter Esperanto kaj pacismo.

LA PACISMA ALIRO

En la kadro de pasinta verkado plurfoje mi esploris la rilaton inter esperantismo kaj pacismo.²⁵ Interalie, mi argumentis, ke dum la tempo de Zamenhof, temis pri vortoj tre intime ligataj. Unuflanke, pacistoj konsideris Esperanton kiel neperfortan ilon de siaj pensado kaj agado. Dume, esperantistoj ofte decidis lerni la lingvon por kontribui al pli justa kaj paca mondo. Jam la iniciatinto de la lingvo forte substrekiis tiun ĉi rilaton, foje iom naive, sed ĉiam konvinkita de la potencialo de neŭtrala helplingvo por nemilita transformo de etnaj (kaj ne nur) konfliktoj.

Tiam abundis pacistoj el diversaj tendencoj (religia, ina, scienca, militrezistanta, proleta internaciisma), kiuj subtenis Esperanton. Inter la plej konataj, menciindas Émile Peltier, Josef Metzger, Albert Ŝkarvan, Henri Lafontaine, Felix Moscheles, Gaston Moch, William T. Stead kaj

24] Vidu F. Ezkieta, *Los fugados del Fuerte de Ezkaba*, edición revisada, Arre, Navaro, Hispanio, Pamiela, 2017.

25] Vidu J. Alcalde, "Pacifism", en: *The Wiley-Blackwell Encyclopedia of Social and Political Movements*, kun. de D. A. Snow, D. Della Porta, B. Klandermans kaj D. McAdam, Blackwell Encyclopedias in Social Sciences, Hoboken, New Jersey, Wiley-Blackwell, 2013; J. Alcalde, *Esperanto kaj neperforto*, "Global Education Magazine" n. 2, 2013, pp. 60-64, alirebla je: <http://www.globaleducationmagazine.com/esperanto-kaj-neperforto>; J. Alcalde, *Esperantistes en un mon eterne militanta: en el centenari de la mort de Zamenhof*, "Kataluna Esperantisto", n. 367 (133), 2017, pp. 33-37; J. Alcalde, *Pacaj klopodoj. La praktika internaciismo de Esperanto*, en *Antaŭ jarcento. Esperanto kaj la unua mondmilito*, kun. de J. Alcalde kaj J. M. Salguero, Parizo, 2018, pp. 333-340; J. Alcalde, *La pacisma aliro*, en: *Aliroj al esperanto*, kun. de C. Kiselman, R. Corsetti kaj P. Dasgupta, Dobřichovice, Ĉeĥio, Kava-Pech, 2018, pp. 9-24; J. Alcalde, *The Esperanto Movement and Pacifism in Zamenhof's time: a special relationship*, en *The Heritage and Legacy of Ludwik Lejzer Zamenhof: Between Judaism and Esperanto*, kun. de F. Gobbo, kaj L. R. Feierstein, Berlino, Hentrich & Hentrich, preseje. Vidu ankaŭ U. Lins, *La laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo*, "Esperanto Documents", n. 36 E, Roterdamo, Universala Esperanto-Asocio, 2000.

Alfred Fried. Koncerne la gvidantojn de la esperanta movado, profunde pacisman sintenon montris interalie Hector Hodler, Edmond Privat, Lanti kaj multaj aliaj.

Pli freŝ-date, UNESKO rekonis la esperantan kontribuon (konkrete, de Universala Esperanto-Asocio, UEA) al la celoj de tiu institucio por kompreniĝo inter la popoloj kaj por atingo de pacaj socioj pere de kulturaj, sciencaj kaj edukaj interŝanĝoj.²⁶ Ekzemplo de tia praktika uzo de Esperanto estis la humana agado, kiun esperantistoj plenumis en malsamaj historiaj momentoj, inkluzive de la poŝta perado dum la mondmilitoj fare de UEA. Alia memorinda evento okazis post la unua mondmilito, kiam tricent aŭstraj infanoj trovis rifuĝon en Hispanio danke al la perado de hispanaj kaj aŭstraj esperantistoj.²⁷

Ĝis nun mi pritraktis la multflankan kolektivajn agadon de esperantistoj kiel socia movado. Verŝajne, tio ja ebligas nin defendi la rilaton inter Esperanto kaj la socia mobilizado por pli justa mondo. Tamen, kio pri individua agado? Ĉu la esperantaj valoroj influas individuojn en ilia ĉiutaga vivo? Kaj en ekstremaj situacioj? Ĉu ilia esperantisteco ebligas ilin konduki pli humane, eĉ akceptante personajn riskojn? Tiel mi argumentos en la lasta sekcio de tiu ĉi artikolo.

HUMANA AGADO

La historio de la esperanta movado enhavas aron de etikaj faroj, pri kiuj respondecas konataj kaj malpli konataj esperantistoj.²⁸ Mi mencias kelkajn el ili. Unue, Domènèch Massachs (1891-1965), barcelona anarkiisto, kiu klopodis murdi diktatoron pere de ponardo. Profunde pacisma, li prenis tiun decidon por damaĝi nur la hispanan registestron. Tial kompreneblas lia kurioza metodo, kiu verŝajne estis destinita al fiasko. Post pluraj periodoj en malliberejo, Massachs daŭrigis pasie sian taskon kiel instruiston de Esperanto. Alia memorinda esperantisto kiu efektivigis grandan sinoferon estas Alice Herz (1882-1965). Juddevena germanino, ŝi migris kune kun sia filino Helga al Usono por fuĝi de la nazia reĝimo. Tie ŝi aktive partoprenis la

26] Vidu la tiurilatajn rezoluciojn de Montevideo en 1954 kaj de Prago en 1985. Aldone, en 2017 UNESKO rememoris la centjarigon de Zamenhof.

27] Vidu L. Cortès, *Els nens austriacs acollits a Osona (1920-1923)*, "AUSA", n. XXV (167), 2011, pp., 209-247, alirebla je: <http://www.raco.cat/index.php/ausa/article/viewFile/248029/332117>. Vidu ankaŭ B. Tuidar, "Esperanto en Aŭstrio ĉirkaŭ la unua mondmilito", en: *Antaŭ jarcento. Esperanto kaj la unua mondmilito*, kun. de J. Alcalde kaj J. M. Salguero, Parizo, SAT, 2018, pp. 319-329.

28] La interesita leganto trovos pliajn detalojn pri tiuj kaj aliaj similaj homoj en 'Memorindaj Esperantistoj', konstanta rubriko, kiun mi aperigas en *Heroldo de Esperanto* ekde la unua numero de la jarolekto 2017.

Internacian Ligon de Virinoj por Paco kaj Libero, kaj interesiĝis pri la militaj konfliktoj okazintaj en Sud-Orienta Azio. Pere de lokaj pacistoj ŝi informiĝis diverslingve, inkluzive de Esperanto. Fine, influita de la neperforta rezistado de Budhanaj monaĥoj, Alice Herz decidis sinbruligi kiel protesto kontraŭ la rolo de la usona registaro en la Vietnamana milito.

En tiu ĉi mallonga listo de homamaj figuroj elstaras la sveda Valdemar Langlet (1872-1960), kiu havis aventurplenan vivon. Ekzemple, je la komenco de la dudeka jarcento li vojaĝis ĉevalrajde tra kelkaj landoj. Tiel li konatiĝis kun Leo Tolstoj kaj kun aliaj esperantaj pioniroj. Langlet kaj lia edzino, la esperantistino Nina Borovko, estas agnoskitaj kiel Justuloj inter la Popoloj por savi milojn da judojn en Budapeŝto dum la dua mondmilito pere de diplomatia ilo, kiu inspiros interalie la agadon de Raoul Wallenberg. Alia esperantisto agnoskita kiel Justulo inter la Popoloj estas la ĉeĥa Premysl Pitter, kiu iĝis internacia pacisma aktivulo pro siaj travivaĵoj dum la unua mondmilito. Rakontas lia intima kunlaborantino Olga Fierz, ke ili ekkonatiĝis en la 1920 jaroj dum kunveno de la Internacio de Militrezistantoj, kie Pitter prelegis favore al Esperanto. En la 1940 jaroj Pitter kaj Fierz (ankaŭ ŝi estas Justulo inter la Popoloj) ne nur savis judojn kaj aliajn persekutatojn de la nazia reĝimo; post la fino de la milito, ili ŝimle protektis centojn da germanaj infanoj de la venĝa konduto de la ĉeĥoslovaka loĝantaro.

Krome menciindas la irlanda Francis Sheehy-Skeffington (1878-1916). Pioniro en la defendo de inaj rajtoj, li edziĝis al inisma aktivulino Hanna Sheehy, kies propran familinomon li adoptis kiel parton de sia nomo. Longtempa pacisto kaj subtenanto de neperforto, li estis tamen arestita kaj mortpafita de la brita armeo dum la Paska Ribelo en 1916. Fine, ni substreku la vivon de la usonano William Pickens (1881-1954), la unua konata nigra esperantisto. Post sia lernado de la internacia lingvo en 1906, li korespondis kun tutmondaj samideanoj, kaj diplomiiĝis de la Brita Esperanto-Asocio. Pickens estis ankaŭ pra-aktivulo pri la rajtoj de la Afrik-usonanoj, kiujn li publike defendis jam dum la unua mondmilito.

Jen ekzemploj de radikala humanismo fare de homoj, kiuj decidis oferi parton de siaj vivoj pro profunde homisma konvinko, en kiu Esperanto estis ŝlosila elemento. La serio de nomoj povus daŭrigi preskaŭ senfine. Temas pri diverslandaj kaj diverskondiĉaj viroj kaj virinoj, kiuj aktivis pacisme, kontraŭfaŝisme, inisme, solidare ktp, kvankam ne nepre pere de rekta uzo de Esperanto. Ĉu la internacia lingvo tamen ludis iun rolon tiusence? Ĉu eble estis tiu konvinko, tiu idealo enhavanta ilian esperantistecon, kiu permesis ilin agadi plej kohere eĉ en la plej malfacilaj cirkonstancoj?

KONKLUDE

Esperanto estas lingvo, sed ne nur. Ĝi ankaŭ ĉefrolas en la socia movado kreita de siaj subtenantoj. Tiu movado havas politikajn valorojn inspiritajn de la zamenhofa etiko. Fakte, Esperanto estas esence politika.²⁹ El tiu perspektivo, fakuloj kiuj serioze studas tiun ĉi socian movadon nepre inkludu ĝian politikan flankon en siaj analizoj. Alikaze, tiaj esploroj restos minimume nekompletaj kaj verŝajne eĉ fuŝaj.

Kiel vidite, esperantistoj ofte aktivis por pli justa kaj senlima mondo en proletaj, pacismaj, kontraŭfaŝismaj kaj humanaj medioj. Kaj pro tio ili estis persekutataj. Temas pri kerna punkto de la esperanta movado kaj pro tio ĝi substrekindas ankaŭ de la aktivuloj, kvankam la nuntempa propagando preferas baziĝi sur pragmatikaj konsideroj pri profitoj kaj vantaĝoj.

Esperanto ja ligiĝas ankaŭ al komunumo, kiu renkontiĝas regule, kaj kiu ebligas plenan verdan vivon.³⁰ Tamen, eĉ en la erao de Interreto, tio ne sufiĉas. Nuntempe, la kvanto de homoj, kiuj lernas la lingvon multobligas, sed oni ne vidas ilin amase en la esperantaj asocioj. Atentinda malforto de novaj lernometodoj kiel Duolingo eble kuŝas en tio, ke ili ne sufiĉe emfazas la politikan dimension de la lingvo. Jen elemento, kiu povus helpi la lingvoscipovanton transiri al pli konscia fazo, kaj tiel iĝi aktivulo de la socia movado.

En tiu ĉi artikolo mi priskribis kaj analizis plurajn historiajn faktojn, sed mi ankaŭ lasis kelkajn demandojn intence malfermitaj. Tion mi faris por montri la neceson kaj bonvenigon de pliaj debatoj kaj esploroj pri tiuj ĉi temoj. Kara leganto, vi nun havas la parolon.

29] Similan aserton faras E. Schor, *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language*, Novjorko, Metropolitan Books, 2016.

30] Pri Esperanto kiel komunumo, vidu G. Fians, “*A cultura e a comunidade esperantistas*”, en: *O Esperanto além da língua*, kun. de G. Fians kaj F. Pita, Porto Velho – Rondônia, Brazilo, Temática Editora, 2017, pp. 81-114.

MONDA LITERATURO EN ESPERANTO, ESPERANTA LITERATURO EN LA MONDO

KIEL KONATE, LA UNUA LIBRO KIU STARTIGIS EN 1887 LA GRANDAN aventuron de esperanto enhavis kelkajn literaturajojn. Zamenhof (1859-1917) enmetis du originalajn poeziaĵojn, montrante tiel la eblecojn de la nova lingvo, kaj tri tradukojn: la preĝon de la katolikoj “Patro nia”, la komencan fragmenton de la Biblio kaj unu poeziaĵon el la *Lyrisches Intermezzo* de Heine, germana hebreo translokiĝinta al Parizo, kiu poste fariĝis luterana kristano. La pecoj ne estis elektitaj hazarde: Zamenhof volis tuj enigi la lingvon en la kulturon kaj kristanan kaj hebrean, kaj elektante ĝuste Heine li volis jam insisti pri internacia persono.

La deziro de Zamenhof igi la lingvon familieca al kiom eble plej multe da homoj puŝis lin al tradukado kaj de grandaj verkoj kaj de eroj malgrandaj, sed tre famaj: li revis pri Internacia Biblioteko, kiu povu enteni ĉiujn ĉefverkojn de la monda literaturo en esperanto. Jam en la *Dua libro* en la komenco de 1888 estas fabelo de Andersen kaj la internacia studenta himno *Gaudeamus igitur*; aldone estis deko da “popoldiroj”, el kiuj nun kelkaj povus nomiĝi proverboj. Lia unua sufiĉe grava traduka verko estas *La batalo de l' vivo*, mallonga romano de la brita aŭtoro Charles Dickens, kiu aperas felietone en la revuo *La Esperantisto* en 1891, tra ĉiuj numeroj 2 -11/12. Zamenhof ankoraŭ ne kuraĝas traduki el la orienteŭropaj aŭtoroj, kaj, konante tre bone la germanan (krom la franca, ambaŭ li lernis knabaĝe), sin helpas per la germana traduko kaj el la danaj fabeloj kaj el la verkoj anglaj.

En 1894 jen la traduko de *Hamleto*, aperinta ĉe presejo Tümmel en Nurnbergo. Kiel konate en la esperantista medio, 1894 estis jaro en kiu la forta agitado por la reformoj praktike devigis Zamenhof-on al publikigado en sinsekvaj numeroj de *La Esperantisto*, sub la titolo “Ŝanĝotaĵo”, de listoj de modifoj sugestitaj de diversaj gravaj esperantistoj, inter kiuj Goldberg kaj Grabowski, kaj li submetis ilin al aprobo de la legantoj de la gazeto. Li malbonvole estis tiritita al ĉi tiu paŝo, ĉar li jam konsideris la lingvon taŭga, kaj opiniis, ke ĉiu abrupta kaj “desupra” ŝanĝo estas danĝera por la afero ankoraŭ ne tiom stabila. Tial la eldono de *Hamleto* havis ankaŭ preventan celon: oni malfacile ŝanĝus la lingvon, se jam aperas en ĝi verkoj tiom famaj kiom *Hamleto*.


Zamenhof havis du celojn per siaj tradukoj, kiuj estis komplementaj, tamen preskaŭ kontraŭdiraj. La havigo al ĉiuj de la plej grandaj verkoj pere de esperanto estis certe tre nobla, sed ĝi apenaŭ utilis en la realo:

tiuj verkoj estis jam tradukitaj al pluraj lingvoj (kvankam ne tiom multe, kiom rezultus nun), do la esperanta versio nenion aldonis, krom al legantoj kun lingvoj “malgrandaj”, kiuj ne havis tradukojn, kaj hazarde lernis esperanton. En tiu kunteksto la tradukoj havis alian celon: montri, ke ankaŭ en la nova lingvo oni povas esprimi ĉion. Ĉi tiu dua celo estis la ĉefa en la unuaj jaroj: fakte Zamenhof ne “kuraĝas” aliri verkojn malmulte konatajn; lia traduko el la pola, de *Marta* de Eliza Orzeszko, aperas poparte en *La Revuo* de 1908 ĝis 1910, liaj tradukoj el Molière (*Georgo Dandin*) en *La Revuo* en 1908, el Schiller (*La Rabistoj*), el Gogol (*La revizoro*), el la Biblio (*La predikanto*) estis aperintaj poparte en *La Revuo* jam pli frue. Tie

aperas en 1910 *Proverboj*, 1232 sentencoj; aperas *La Biblio* ekde aprilo 1910 ĝis januaro 1914 kaj poste en apartaj volumoj. Tamen lia revo konkretiĝis per la kolekto “Esperanta Biblioteko Internacia” de la germana eldonejo Möller & Borel, kiu produktis 33 broŝurojn de internacia literaturo inter 1909 kaj 1924.

Pli kuraĝa koncerne la polan lingvon estis d-ro Kazimierz Bein (1872-1959), konata kiel Kabe, kiu jam en 1907 publikigis ĉe Hachette la romanon *La faraono* de Boleslav Prus. Tio estas aparte interesa, ĉar la romano estis unue aperinta serie en varsovia semajna gazeto en 1895 kaj 1896; do ĝi estis relative freŝa kaj ne multe konata ekster la pollingva medio.






Kabe sin dediĉis al tradukado el la pola, kun la celo konigi tiun literaturon eksterlande pere de esperanto, sed ankaŭ redaktis kolekton “Internacia Krestomatio”, kiu komenciĝas per ĉerpaĵo el *La tri musketeroj* de Aleksandro Dumas; sekvas fragmentoj el Ĉeĥov, Gorkij, Kipling, Niemojewski, Seroa, Sienkiewicz, Suttner. Rimarkindas unu detalo: kleruloj de orienta Eŭropo mastris trankvile la rusan, la germanan, la francan; kleruloj en centra Eŭropo malfacile mastris la rusan aŭ la polan.

Proksima al la ideo de Zamenhof estis la kolekto de antologioj el la etnolingvaj literaturoj, kiuj furoris ĉefe en la intermilita periodo, sed havis elanon ankaŭ poste. Aperis la angla, la estona, la skota, la bulgara, la kataluna, la kvarlingva svisa, la dulingva belga, la ĉina, la itala kaj aliaj. Eminentas la *Franca antologio*, konsistanta el pli ol 2100 paĝoj kunigitaj el la literaturaj kromnumeroj de *Franca Esperantisto*. Sed ekzistas multaj aliaj antologiaj kolektoj pli specifaj, kiel la *Antologio de kroataj unuaktaj dramoj* (red. Spomenka Ŝtimec), aŭ *Rakontoj de Oogai* (tr. Teruo Mikami), aŭ *Islandaj pravoĉoj* (red. kaj tr. Baldur Ragnarsson) aŭ la pluraj antologioj de la italaj regionaj literaturoj (sicilia, liguria, trentlanda, lukana) aŭ dediĉitaj al specifaj aŭtoroj, kiel D’Annunzio (ĉiuj redaktitaj de Carlo Minnaja).

Ne havas sencon demandi ĉu la ĉefaj gravaj verkoj nacilingvaj estis tradukitaj al esperanto: la respondo povas esti, tute objektivite: multaj, kaj se temas pri ĉerpaĵoj el ties aŭtoroj, la respondo estus: (preskaŭ) ĉiuj. De la *Rolandkanto* al la *Sonetoj* de Shakespeare, de *La origino de la specioj* de Darwin al *La Gefianĉoj* de Manzoni, de *Faŭsto* de Goethe al *La Gastejestrino* de Goldoni, de *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin al *Martin Fierro* de Hernandez, de *Malsata ŝtono* de Thakur al la *Biblio*, de la *Korano* al la *Dia Komedio* de Dante, de *La oldulo kaj la maro* de Hemingway al la *Odiseado* de Homero (ses kantoj verse, la tuto proze), de *Eneido* de Vergilio al *Jerusalemo liberigita* de Tasso, de *La Inĝenia hidalgo Don*



Quijote de la Mancha de Cervantes al *Cent jaroj da soleco* de García Márquez, de *Asteriks la gaŭlo* de Goscinny kaj Uderzo al *La aventuroj de Pinokjo* de Collodi kaj multaj, multaj aliaj. Ĉar ni estas en Italio, ni menciuj la tutan poemaron de Giuseppe Ungaretti, ĵus aperintan sub la titolo *Vivo de homo*, aŭ specifajn verkojn de iu aŭtoro, kiel *Myricae* de Pascoli aŭ ĉiuj *Kantoj* de Leopardi; ĉiuj tri verkoj estas en la mirinda traduko de Nicolino Rossi.

Valoras menciuj specifan aliron al la mondaj ĉefverkoj fare de la esperantista medio: ĝi estas la Serio Oriento-Okcidento. Temas pri eldonserio kiu celas kontribui al la Programo de Unesko por Reciproka Studo kaj Aprecado de Kulturoj. En la serio aperas verkoj aparte gravaj kaj reprezentaj de la nacilingvaj literaturoj de diversaj landoj en la Okcidento kaj en la Oriento. Kvankam ne estas precize difinite, kio estas oriento kaj kio okcidento, kaj kiu eventuala meridiano ilin disigas (certe ne la grenviĉa, aŭ ĉu eble la Uraloj?), kaj ĉu anglalingvaj teritorioj kiel Aŭstralio aŭ Hindio devas konsideriĝi en la orienta kulturo, oni devas, bedaŭrinde, agnoski, ke estas ege pli multaj la verkoj de okcidentaj verkistoj kiuj estas konataj en oriento ol inverse. Utilas




anekdoto rilatanta al unu el la verkoj de la serio, la *Dia Komedio* de Dante Alighieri en la traduko de Giovanni Peterlongo, kun la originalo vidalvida kaj la tuta kolekto de la gravuroj de Sandro Botticelli, iam disperdita en diversaj lokoj. Kiam estis planata la eldono de ĉi verko, unu el la konkuratoroj, Clelia Conterno, por organizi notojn kaj enkondukon, enketis pri la kono, kiun povas havi lernanto de supera mezgrada lernejo en Ĉinio kaj en Japanio pri la itala mezepoka historio, pri la luktoj inter la roma papo kaj la imperiestro heredinto de la roma imperio. Ja la poemo estas forte ligita al tiu epoko kaj al la antaŭa historio de la itala duoninsulo: en la tri kantikoj, Infero, Purgatorio kaj Paradizo, distribuigas tuta aro da historiaj personoj, kiujn Dante jen kondamnas al la infero, jen glorigas en la paradizo. Nu, la rezultoj de la enketo montris, ke la acelataj lernejoj en Ĉinio kaj Japanio konas pli ol sufiĉe la politikajn kaj religiajn luktojn en Eŭropo, tiel ke la poemo ne estis por ili pli malfacila ol por eŭropano.

Se ni rigardas ĝuste tiun serion, ni trovas, ke en ĝi aperis ĝis nun 53 verkoj ekde ĝia komenco en 1961. Por ke ne estiĝu miskomprenoj, tiu serio tute ne reprezentas la tutan esperantlingvan eldonadon, kiu, katalogite en la brita biblioteko, aŭ en la viena Muzeo, aŭ en la Centro pri Studoj pri la Internacia Lingvo en la svislanda Ĉaŭdefono, ampleksas abunde pli ol 100.000 titolojn, inkluzive revuojn; la nuntempa eldonado pri nuraj libroj povas konturiĝi, laŭ la jaroj, inter 150 kaj 250 verkoj ĉiujare. La serio “Oriento-Okcidento” estas dediĉita nur al ĉefverkoj reprezentaj de unu el la du kulturoj. Tamen ankoraŭ oni devas agnoski, ke la proporcio inter orientaj verkoj kaj okcidentaj estas forte favora al la okcidento (ĉ. kvardeko kontraŭ ĉ. deko). Sed certe evidentiĝis al la esperanta publiko ĉefverkoj en la bengala, turka, japana, vjetnama; certe Ihara Saikaku, Tanizaki Junichiro, kiuj verkis en la japana, Upendronath Gangopadhae, kiu verkis en la bengala, aŭ NguyenDu, kiu verkis en la vjetnama, eĉ ne havas vikipedian paĝon, do ili estas tute nekonataj de la “riĉa” okcidenta mondo; same la granda epopeo en la palia, mezhinda lingvo kaj sankta lingvo de budhismo, estas en Eŭropo tute nekonata. Pri ĉi lasta interese estas, ke ĝi estis esperantigita de svedo. Komplemente, ni povas diri ke eĉ lingvoj iĝis nove konataj: mi vetas, ke ege malmultaj eĉ meze kleraj italoj scias, ke ekzistas la galega lingvo kaj en kiu teritorio ĝi estas parolata. Entute la serio entenas tradukojn el 17 lingvoj; pleje abundas la japana per 6 verkoj, sekvata de la rusa per 5, sekvas la angla kaj la ĉina per 4, franca, itala, hispana kaj germana per 3. Krome estas du multlingvaj antologioj, kiuj enhavas tradukojn el trideko.

Por resti en ĉi tiu lando, en la serio aperas tri verkoj el la itala: krom la menciita *Dia Komedio* estas *La Gefianĉoj* de Manzoni (tr. G. Cadei) kaj *La Princo*

de Machiavelli (tr. C. Minnaja); por resti en la medio de ĉi tiu Akademio, en la serio aperas *Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz (tr. A. Grabowski) kaj *Mi inventas la mondon* de la Nobel-laŭreato Wisława Szymborska (tr. pluraj).



* * * * *


Ni venu nun al la dua parto: ĉu la esperanta literaturo havas monde konindajn verkojn, kiuj plenrajte apartenu al la universala kulturo, samrange kiel iuj etnolingvaj? Ni aliru la temon per frazo dirita, antaŭ pluraj jardekoj, de Giangiacomo Feltrinelli, la eldoninto en Italio de *Doktoro Živago* (tiam kuraĝa pionira elpaŝo) kaj de *La panterkato* de Tomasi di Lampedusa (nuntempe tiu eldonejo partoprenas en holdingo distribuanta ĉ. 70 milionojn da libroj jare kaj estas la unua en Italio). La frazo estis: “Ne eblas esti granda poeto bulgara”. Nun oni rifuzus tiun frazon kiel rasisman, sed ĝi devas esti komprenata tiel: lingvo kiun malmultaj en la mondo legas kaj el kiu ekzistas malmultaj alilingvaj tradukoj, ne atingas tiom grandan publikon, kies juĝado (kaj aĉetado) povas garantii pri elstareco de iuj ĝiaj aŭtoroj. Ĉu tiu frazo estus adekvata al la hodiaŭo? Kaj kiel oni devas interpreti ĝin rilate al la esperanta literaturo? Ni flankelasu iujn bizancastilajn opiniojn de kelkaj izolitaj unuopuloj kiuj diras, ke ne ekzistas esperanta literaturo, sed nur literaturo en esperanto, kaj rifuzas la ekziston de la esperanta kulturo ĝenerale, kvazaŭ la ĉiutagaj kulturaj agadoj de la esperanta popolo (eĉ ĉi tiu termino estas kontestata) estus nur klonajoj de naciaj eventoj kiuj simple uzas la internacian lingvon. Ni venu al la esenco, serioze.

Dum longa tempo la esperanta literaturo originala estis rigardata de la esperantistoj mem kiel minora, kaj la ideo, ke valoras traduki el esperanto al naciaj lingvoj, ne kongruis kun la ĉefa aspiro esperantigi la etnolingvajn ĉefverkojn kaj montri, ke en esperanto oni povas diri ĉion (kion diris jam la aliaj). La demando, kiu konturigiĝis specife dum la junulara kongreso en

Raŭmo (Finnlando), estis: ĉu la esperantistoj kapablas diri ion (signifan)? pri literaturo, pri kulturo, pri socia mesaĝo?

Estas nenegeble, ke la socia mesaĝo kiun portas esperantistoj estas la “interna ideo”, kiun Zamenhof difinis en la festparolado ĉe la dua universala kongreso en Ĝenevo: *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*. Kaj estas same nenegeble, ke malgraŭ ĉiuj “ismoj” kaj subtilaj diferencigoj alkroĉitaj poste dum jarcento, tiu interna ideo estas tiu kiu allogis, kaj daŭre allogas, la personojn kiuj venas al esperanto kaj restas en ĝi, malgraŭ persekutoj, obstakloj, internaj malpacoj, personaj konfliktoj, sennombraj organizaj misoj, malgraŭ multo riproĉinda en la konduto de tiu kaj tiu alia; sed oni restas kaptita de ĝi, de tiu espero ke, se ne alvenos la fina venko, tamen ĉiu konscia esperantisto iomete kontribuas al la interkompreniĝo de la popoloj, sen kiu nek frateco nek justeco povas maturiĝi. Tial tute certe ankaŭ tiu parametro, la adhero al la interna ideo, estas taksinda en la juĝado de la esperanta literaturo, kaj ni mencias kelkajn ekzemplojn kiuj ja esprimas tiun spiriton.

La franclingva sviso Edmond Privat (1889-1962) en la komencaj jaroj de la pasinta jarcento diris, ke la originala esperanta literaturo jam estas tia, ke valoras studi ĝian lingvon eĉ nur por alproksimiĝi al tiuj juveloj. Ĉu nur propaganda slogano? Kiun vere rekomendindan verkon la esperanta literaturo proponis al la monda publiko? Same kiel pri la aliaj literaturoj, el centoj, miloj da produktitaj eroj oni sukcesas pluki ion vere valoran. Tiun aserton ripetis poste pluraj aliaj elstaruloj, kaj, honeste, ni povas senrefute ĝin konfirmi.



Je la tempo de Privat montriĝis jam tre promesplena duopo, la poloj Eska (Stanisław Karolczyk) kaj Wiktoria Elski (Stanisław Braun), aŭtoroj de *Unuaj agordoj* (1912); la lasta daŭre poetis en revuoj dum preskaŭ tuta posta jardeko. Tiu unua modesta broŝuro entenis 42 poemojn, el kiuj pluraj revis pri la fina sceno, ke la popoloj sidigōs pace kaj frate. Sed se ni povas nur kelkajn ekzemplojn mencii, ni venu al pli famaj.

Skoto William Auld (1924-2006) estis prezidanto de la esperanta PEN-centro, prezidanto de la Akademio de Esperanto, vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, do plene mergita en la kulturo kaj literatura kaj movada de Esperantio. Lia produktaĵo estas enorma, kaj originala kaj traduka (el la skota kaj el la angla), sed ni ekzameni nur lian ĉefan verkon, *La infana raso* (1952), epopeon kiu havis tradukojn, almenaŭ partajn, al pluraj lingvoj: skota, angla, nederlanda, franca, hungara, islanda, itala, pola, portugala; kompreneble tuta aro da aliaj poemoj de Auld estis tradukita al la samaj lingvoj kaj ankaŭ al aliaj, kiel la vjetnama, la rumana, la hispana, la sveda, la turka. Ne surprize, ke li estis kandidatigita al la Nobel-premio.

Tiu ĉefa poemo estas inspirita de la esperantista idealo: la historio de la homaro estas rakontata sub la ideo, ke la homa raso ankoraŭ estas infana, ĝi ankoraŭ ne iĝis adoleska, ankoraŭ ne alvenis al la ideo de frateco kaj justeco esperita de Zamenhof. Auld estis esplorpiloto sur Mediteraneo kaj Nordafriko dum la dua mondmilito kaj demandas sin, ĉu la milito kaj la venko kontraŭ la diktaturoj, kun tiom da mortintoj kaj vunditoj, eventuale havis rezulton kiu estis trompo al la junuloj.



Alia verko kiu identiĝas kun la sama sento montranta, kiel absurdaj estas la landlimoj, ŝanĝiĝantaj laŭ la jardekoj, estas *Kiel akvo de l' rivero* de franco Raymond Schwartz (1894-1973). Ja, la vivo fluas kiel akvo de l' rivero: milito estas detrua, la individuo estas valoro sendepende de la nacieco. Parte aŭtobiografia (la aŭtoro komence estis germano enkadrigita en la armeo kontraŭ Francio, dudek jarojn poste li devis militi kiel franco kontraŭ Germanio), la romano montras kiel determinismo, fonto de posta ŝovinismo kaj milito, envenas en la amon inter franca junulo kaj germana junulino.

Siavice aŭstraliano Trevor Steele (1940) verkas dekon da historiaj romanoj, kie la historia precizeco kuniras kun la streĉa rakonta stilo. *Paradizo ŝtelita*

(2012) rakontas pri la koloniigo de insulo Tasmanio fare de britaj alvenintoj, kun granda defendo de la indiĝenoj forpelitaj el la propra tero. Alia romano, *Kvazaŭ ĉio dependus de mi* (2009), omaĝas al Carl von Ossietzky, unu el la fruaj viktimoj de la nazia reĝimo. Fragmentoj el liaj romanoj aperis en la angla kaj en la japana.

Oni povus fari longan liston de esperanto-verkistoj, kies verkoj estis, almenaŭ parte, tradukitaj al etnolingvoj, portante tiel en la mondan arenon la principojn kiuj allogis la personojn (kaj sekve ankaŭ la verkistojn) al la lingvo. Jen nuraj ekzemploj: hungaro Julio Baghy (1891-1967) estis tradukita al la angla, ĉina, kroata, franca, gaŝa, germana, hungara, itala, japana, ukraina, vjetnama; kroatino Spomenka Štivec (1949) estis tradukita al la slovena, franca, ĉina, angla, bengala kaj persa; islandano Baldur Ragnarsson (1930) al la angla, nederlanda, hungara, itala kaj pola; kataluno Abel Montagut (1953) al la bengala, kataluna, itala, hispana. Post la morto de Auld en 2006, Ragnarsson estis kandidatigita al Nobel-premio, kaj inter la kvinopo el kiu elvenos nova kandidatigo estas Štivec kaj Steele. La *Historio de la Esperanta Literaturo* de C. Minnaja kaj G. Silfer (2015) listigas ĉ. 800 aŭtorojn, saman nombron indikas *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto* de G. Sutton (2008).

Jes ja, la esperanta literaturo havas siajn perlojn, kiuj prezentas la esperantan kulturon, ties filozofian, etikan aliron al la mondo: pacemo, kondamno de malamoj kaj militoj, respekto de la valoro de la homo kiel tia, sendepende de la nacieco kaj eĉ spite al la aventuroj en kiujn la nacieco, trudita aŭ hazarde trafita, envolvas la individuon. La himno de la esperantistoj ne alvokas al armiloj, al bataloj, al venkoj kontraŭ aliaj popoloj aŭ regantaj kasto, sed promesas sanktan harmonion kaj la efektiviĝon de bela sonĝo de la tuta homaro. La esperanta literaturo ĉerpis ja el ĉiuj aliaj, ĉar ĝi ĉerpis sendube el la diversaj literaturoj de la gepatraj lingvoj de ĝiaj verkistoj, sed ĝi havas karakterizojn proprajn, kiuj spegulas la idealon pro kiu la lingvo naskiĝis. Kompreneble, oni devas konsideri, ke la lingvo ne havas jarmilan tradicion kiel la itala aŭ la latina, sed aĝas nur 130 jarojn; la parolantoj estas taksataj inter 100.000 kaj du milionoj laŭ Vikipedio, sed partoprenantaj en la literaturo estas verŝajne nombro proksima al la malsupera el tiuj du. Tial ankaŭ la literaturaj juveloj kongruas kun tiu nombro, sed ili kontribuas, aŭtonome, al la literaturo universala.

KRITERIOJ POR LA KONSTRUO DE INTERNACIAJ PLANLINGVOJ

KONCEPTOJ POR KONSCIE KREITAJ INTERNACIAJ HELPLINGVOJ POR interhoma komunikado bazas sur ĝenerale rekonitaj principoj. Tiuj principoj celas eviti la problemojn, kiuj okulfrapas ĉe multaj histori-naturaj lingvoj. Gravan rolon ludas ĉitie postulo pri *universaleco*, alivorte: *universala alirebleco*. Tio signifas, ke – idealkaze – la koncerna planlingvo devas esti ellernebla kun sama grado de fortostreĉo por ĉiu homo de la terglobo. La strukturo de multaj kandidatoj por mondhelplingvo montras tamen, ke ĉe la planado de internaciaj lingvoj estis precipe favorataj la okcidentaj nacilingvoj (speciale ilia leksiko kaj sintakso). Uzantoj de *neokcidentaj* lingvoj povus tion kritiki kiel maljusta kaj eliteca solvo, ĉar la favorado de la disvastiĝintaj nacilingvoj (speciale de la ĝermanaj kaj latinidaj lingvoj) rezultas malsaman gradon de lernfacileco kaj fortostreĉo. Ĉar tio, kio estas facila por brito aŭ italo, povas esti malfacila por japano aŭ ĉino kaj kontraŭe. Ĉitiu artilolo prezentas la plej gravajn kriteriojn por konstrui internaciajn planlingvojn. Ĝia celo estas: (1) montri, kiujn strukturajn fenomenojn de la historii-naturaj lingvoj oni devas nepre eviti, kaj (2) kiaj solvoj ekzistas por minimumigi iliajn gramatikajn kaj sintaksajn komplikaĵojn.

1. Por gajni necesan subtenon kaj ĝui la lobion nacia lingvo devas adekvati ne nur al la *strukturaj*, sed antaŭ ĉio al la *eksterlingvaj kriterioj*. Tiaj eksterlingvaj kriterioj rilatas al milita, politika, kultura, ekonomia kaj religia influoj, sed ankaŭ al demografia potenco. Kontraŭe al tio planlingvo devas esti pli altgrade

konforma ol iu ajn historii-natura lingvo al certaj *lingvointernaj*, t.e. *strukturaj*, postuloj por esti entute atrakcia por ĝia ellerno kaj uzado.

Konceptoj por konscie kreitaj (mond)helplingvoj por interhoma komunikado bazas sur ĝenerale rekonitaj principoj. Tiuj principoj celas eviti la problemojn, kiuj okulfrapas ĉe multaj histori-naturaj lingvoj. Gravan rolon ludas ĉitie postulo pri *universaleco*, alivorte: *universala alirebleco*. Tio signifas, ke – idealkaze – la koncerna planlingvo devas esti ellernebla kun sama grado de fortostreĉo por ĉiu homo de la terglobo. La strukturo de multaj kandidatoj por mondhelplingvo montras tamen, ke ĉe la planado de internaciaj lingvoj estis precipe favorataj la *okcidentaj nacilingvoj* (speciale ilia leksiko kaj sintakso). Uzantoj de *neokcidentaj* lingvoj povus tion kritiki kiel maljusta kaj eliteca solvo. Sed aliflanke konsiderante la rolon de planlingvo kiel helpinstrumento en la kultura, diplomatia, ekonomia, teknologia kaj scienca kampoj, la gvida rolo de la okcidentaj lingvoj mondscale estas evidenta.¹

Ĉiukaze la favorado de la disvastiĝintaj nacilingvoj en la lingvoplanado (speciale de la ĝermanaj kaj latinidaj lingvoj) rezultas malsaman gradon de lernfacileco kaj fortostreĉo. Ĉar tio, kio estas facila por brito aŭ italo, povas esti malfacila por japano aŭ ĉino kaj kontraŭe. Tial nur *apriora* kreita planlingvo povus esti ellernebla por iu ajn homo kun sama grado de malfacileco. Tamen la alternativo uzi aprioran lingvon nebaziĝitan sur la materialo de histori-naturaj lingvoj evidentiĝis praktike nerealigebla. Ni povas do konstati: Ju pli granda estas la celpopulacio, despli kompleksa estas la tasko (ja defio) krei internacian planlingvon. Juste dividi lingvajn malfacilaĵojn kaj samtempe grave minimumigi ilin sonas ĉiukaze tre alloga. Sed kiomgrade estas atingebla tiu idealeca celo?

Gravan kontribuon al tiu temo liveris Otto Jespersen² lige kun la prezento de lia planlingvo Novial. Ankaŭ Rasmus Kristian Rask³, Edward Sapir, Leonard Bloomfield kaj Franz Boas⁴ prezentis ĝeneralajn principojn por

-
- 1] Rilate la soci-politikan statuson de la angla kaj germana kp. ekzemple: D. Cristal, *English as a global language*, Cambridge, New York: University Press, ([1997] 2010) (10th printing 2010, first printing 1997); S. Skudlik, *Sprachen in den Wissenschaften. Deutsch und Englisch in der internationalen Kommunikation*, Tübingen: Narr, 1990; U. Ammon, *Deutsch als Publikationssprache der Wissenschaft: Zum Umfang seiner Verwendung im Vergleich mit anderen Sprachen*, „Germanistische Mitteilungen“ 28, 1988, pp. 75-85; U. Ammon (ed.), *Status and function of language and language varieties*, Berlin, New York: de Gruyter, 1989 kaj U. Ammon, *Die Stellung der deutschen Sprache in der Welt*, Berlin, München, Boston: de Gruyter, 2015.
 - 2] O. Jespersen, *An international language*, London: Allen & Unwin, 1928. (Germana traduko de S. Auerbach: *Eine internationale Sprache*, Heidelberg: Winter, 1928.)
 - 3] R. K. Rask, *Traktatu d' un Lingvauniversale (Abhandlung über eine allgemeine Sprache / Traktato pri ĝenerala lingvo). Teil II aus der Handschrift „Optegnelse til en Pasiographie“ (1823)*. Aus dem Nachlaß herausgegeben und kommentiert von Alicja Sakaguchi / El la postlasaĵo eldonita kaj komentita de Alicja Sakaguchi, Frankfurt am Main: Lang, 1996.
 - 4] E. Sapir u.a. [kaj aliaj aŭtoroj], *Memorandum zum Problem einer internationalen Hilfssprache*, germana traduko, in: R. Haupenthal (Hrsg.), *Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik*, Darmstadt: Wissenschaftliche

krei internacian helplingvon. Ankaŭ Dan Maxwell⁵ skribis poste pri la konstruprincipoj de planlingvoj en la konteksto de lingvoplanado. Mi mem dediĉis al tiu temo la atenton en mia germanlingva libro “Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden” (Interlingvistiko. Objekto, celoj, taskoj, metodoj), speciale en la ĉapitro “Die Suche nach Kriterien für die Schaffung von Welthilfssprachen” (Serĉo de kriterioj por konstrui mondhelpingvojn)⁶.

2. Komence mi ŝatas priparoli kelkajn bazajn interlingvistikajn nociojn. Sub *aposteriora lingvo* (latine *a posteriori*: ‘de la posta’; ‘devenanta el la sperto’) oni komprenas lingvon, kiu ĉerpas sian materialon el la ekzistantaj naturaj lingvoj kun pli aŭ malpli grandaj modifoj. Tiel konstruitaj planlingvoj strebas esti facile lerneblaj kaj laŭeble mondvaste uzeblaj. Ili celas unuflanke regulecon kaj simplecon, sed aliflanke ili konsideras la historie evoluintajn ortografiajn, fonologiajn, morfologiajn, leksikajn kaj sintaksajn fenomenojn. *Aposterioraj lingvoj* reprezentas tri bazajn tipojn: a) la naturalisman, b) la skemisman kaj c) la miksan, nome: la skemism-naturalisman lingvotipon. Ekzemple Interlingua apartenas al la naturalisma tipo, Esperanto al la skemisma kaj Paraglot⁷ al la skemism-naturalisma tipo. Tiuj tri konstrumetodoj, la naturalisma, la skemisma kaj la miksa, rilatas (1) al la kreado de la leksiko, (2) al la gramatiko kaj (3) al la ortografio de la nova lingvo.

Tabelo 1. Ekzemploj de naturalismaj lingvoj en kronologia ordo

Aŭtoro	Nomo de plan-lingvo	Jaro de publikiĝo	Lando
J. Križanić ⁸	Ruski jezik (1666)	[1848-1859] 1976	Kroatio/Ruslando
R. K. Rask ⁹	Linguuniversale (1823)	1996	Danlando
M. Pirro ¹⁰	Universal-Glot	1868	Francujo

Buchgesellschaft, 1976, pp. 133-147. (Originala eldono: „The Romanic Review“ (Columbia) 16, 1925, pp. 244-256.)

- 5] D. Maxwell, *Principles für constructing planned languages*, in: K. Schubert, ed., *Interlinguistics. Aspects of the science of planned languages*, Berlin, New York: Mouton de Gruyter, 1989, pp. 101-119.
- 6] A. Sakaguchi, *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*, Frankfurt am Main [etc.]: Lang 1998, pp. 384-392. Kp. ankaŭ la antaŭan ĉapitron „Zur Frage der Beurteilung sprachlicher Erscheinungsformen als ‚schwierig‘ und ‚leicht‘“ (Demando rilate la prijuĝon de lingvaj fenomenoj kiel „malfacilaj“ kaj „facilaj“), pp. 374-384.
- 7] T. Ficowski, *Paraglot. Język powszechny (1942-1944). Z pism pośmiertnych wydała i zaopatrzyła w przedmowę oraz uwagi do tekstu dzieła Alija Sakaguchi*, Poznań: Wydawnictwo „Rys”, 2005.
- 8] J. Križanić, Gramatiĉno izkazanje ob ruskom jeziku (1666). Abdruck der Erstausgabe von 1848/59 besorgt von Gerd Freidhof, *Frankfurt am Main: Kubon u. Sagner, 1976*.
- 9] R. K. Rask, *Traktatu d’ un Linguuniversale, cit.*
- 10] M. Pirro, *Universal language – Universalsprache [Universal-Glot.], Paris: Retaux, 1868*.

Aŭtoro	Nomo de plan-lingvo	Jaro de publikigo	Lando
P. Hoinix (alias G. Henderson) ¹¹	Anglo-Franca	1889	Britujo
J. Lott ¹²	Lingua internazional	1890	Aŭstrio
D. Rosa ¹³	Nov Latin	1890	Italio
E. Beermann ¹⁴	Novlatiin	[1895] 1907	Germanio
V. Rosenberger ¹⁵	Idiom Neutral	1902	Ruslando
G. Peano ¹⁶	Latino sine flexione (Interlingua)	[1903] 1905	Italio
H. Molenaar ¹⁷	Universal	1906	Germanio
A. Michaux (alias A. M. Boningue) ¹⁸	Romanal	[1909] 1922	Francojo
A. Koleszár ¹⁹	Neolatin	1917	Hungario
E. von Wahl ²⁰	Occidental-Interlingue	1922	Estonio
O. Jespersen ²¹	Novial	1928	Danlando
H. Heimer ²²	Mondial	1943	Svedujo
A. Gode / H. E. Blair ²³	Interlingua	[1951] 1955	Usono

- 11] P. Hoinix (alias George Henderson), *Anglo-Franca: A compromis language English-Français (an nouveau plan) for the facilitation of international communication*, London: Trübner, 1889.
- 12] J. Lott, *Un lingua internazional. Grammatika et vokabular pro angleses, germanes, romanes et pro kultivates de tut mond, Wien [eldonejo nekonata], 1890.*
- 13] D. Rosa, *La Nov Latin international scientific lingua, Torino: Clausen, 1890.*
- 14] E. Beermann, *Novlatiin: Un esaje de proformaar li latiin a un lingue usaabil al international relasions*, Leipzig: Fock, 1895. (Germana traduko: *Die internationale Sprache Novlatiin, Leipzig: Dietrich u. Weicher, 1907.*)
- 15] W. Rosenberger, *Wörterbuch der Neutralsprache (Idiom Neutral) Neutral-Deutsch und Deutsch-Neutral mit einer vollständigen Grammatik nach den Beschlüssen der Internationalen Weltspracheakademie und einer kurzgefassten Entstehungsgeschichte der Neutralsprache zusammengestellt und mit Bewilligung der Akademie herausgegeben vom Mitgliede derselben Woldemar Rosenberger*, Leipzig: Haberland, 1902.
- 16] G. Peano, *De latino sine flexione, lingua auxiliare internationale*, Torino [eldonejo nekonata], 1903. (Represo en: „Revue de mathématiques“ 8, 1905, 3, pp. 74-83.)
- 17] H. Molenaar, *Gramatik de Universal, pro Italiani, Spanidi, Franzesi, Anglesi, Germani*, Leipzig: Püttmann, 1906.
- 18] A. Michaux, *Romanal: Langue auxiliaire Anglo-Latine*, 2. éd. Boulogne-sur-Mer [eldonejo nekonata], 1922. (Originala eldono: Boulogne-sur-Mer, 1909.)
- 19] A. Koleszár, *Előszó az új nemzetközi világhelynek tervezett újlatin (Neo-Latin)*, Budapest [eldonejo nekonata], 1917.
- 20] E. von Wahl, *Li principies de Occidental*. [La unua prezento de la gramatiko de Occidental, poste nomata Interlingue]. [Kvarpaĝa, nenumerigita folio en:] „Kosmoglott“ (Jurnal scientific inpartial de lingue international. Organ del Societé Kosmoglott, Reval, Estonia), Nr. 1, Februar 1922.
- 21] O. Jespersen, *An international language*, London: Allen & Unwin, 1928.
- 22] H. W. Heimer, *Världsspråket Mondial: Grammatik*, Lund: Gleerupska universitets bokhandeln, 1943.
- 23] A. Gode / H. E. Blair, *Interlingua. A grammar of the international language*. Prepared by A. Gode and H. E. Blair of the research staff of the International Auxiliary Language Association, New York: Storm, 1951. (2nd ed. New York, 1955.)

Rimarkindas la fakto, ke Rasmus Kristian Rask estas la unua reprezentanto de scienca lingvistiko, kiu antaŭpaŝis kun principoj por konstrui ĝeneralan lingvon kaj prezentis konkretan rezulton de siaj ĉikoncernaj klopodoj, nome la plimalpli precize ellaboritan propran planlingvon.

3. Nun mi ŝatas mallonge priparoli la plej gravajn interlingvistikajn konstruprincipojn.

Principo I.

Konscie kreita internacia lingvo devas konsisti el leksika materialo de la plej disvastiĝintaj okcidentaj lingvoj. Praktike tio signifas, ke oni devas laŭeble racie kongruigi la origine grekajn kaj latinajn kaj entute el aliaj lingvoj transprenitajn radikojn. Tio estas grava vidpunkte de la optimuma lernebleco por laŭeble plej granda parto de parolanoj²⁴.

grekaj vortoj

HIDRO- el *hydor* ‘akvo’

KRONO el *chronos* ‘tempo’

ARITMO el *arithmos* ‘numero’

ANTROPO el *anthropos* ‘homo’

KIRO el *cheir* ‘mano’, *cheirurgos* ‘manlaboristo’

MONE el *monos* ‘sola’

latinaj vortoj

– ACVA ‘akvo’

– TEMPOR ‘tempo’

– NUMER ‘numero’

– HOME ‘homo’

– MANU ‘mano’

– SOLE ‘sole’

Oni povas distingi tri specojn de vortelementoj:

(1) Leksemoj kun alta grado de „internacieco“, ekz. Esperanto: *homo*, (lat. *humanus*), *lingvo* (lat. *lingua*), *insulo* (lat. *insula*); ĉefaj numeraloj: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, ..., *dek*, *cent*, *mil*; nomoj de monatoj: *januaro*, *februaro*, *marto*, *aprilo*, *majo*; esprimo de parenceco: *patro* (lat. *pater*), *filo* (lat. *filius*), *frato* (lat. *frater*), *nepo* (lat. *nepos*); fak-technikaj esprimoj: *matematiko*, *integralo*, *adicii*, *diferencialo* (mat.); *neurologo*, *endokrino*, *akuta* (med.), *singularo*, *nominativo* (gram.), *rozoo*, *lilio*, *vino* (bot.); *tigro*, *gorilo* (zool.); vortkreaĵoj: *mal-* ‘kontraŭa, kontraŭanta sin, malamika’, *mis-* ‘malĝuste, erare, false’, *plur-*, *re-* ‘denove, ree’ aŭ en Occidental-Interlingue: *tigre*, *gorille*, *rose*, *lilie*, *vin*.

(2) Leksemoj neplene „internaciaj”, sed konataj al la plimulto de la uzantoj de la okcidentaj lingvoj, ekz. institucioj: *hospitalo*; korpopartoj: *kapo*, *okulo*, *mano*, *piedo*, *ventro*; topografiaj nomoj: *vojo*, *urbo*, *lando*; botanikaj nomoj: *arbo* (lat. *arbor*), nomoj de semajnoj: *lundo*, *mardo*, *merkredo*, ..., *sabato*, *dimanĉo*.

24] Kp. O. Jespersen, *An international language*, op. cit., p. 123.

(3) Leksemoj kun malpligranda aŭ nenia disvastiĝo en eŭropaj lingvoj (speciale en la ĝenerala, ĉiutaga lingvo), ekz. Esperanto *edzo/edzino*; Paraglot substantivoj: *coliro* ‘bulko’ (malnovgr. *kollyra* ‘ovala bulko el hordeo’; lat. *collis*, hisp. *colina*, it. *collin*, fr. *colline* ‘monteto, supraĵo’ kaj lat., it. *collare* ‘kolĉeno’), *foro* ‘placo’ (lat. *forum*), *plate'o* ‘strato’ (lat. *platea*), *maneo* ‘mateno’ (lat. *mane*), *morbo* ‘malsano’ (lat. *morbis*), *oro* ‘buŝo’ (lat. *os*), *muliero* ‘virino’ (lat. *mulier*), *felo* ‘kato’ (lat. *felis*), *auranta* ‘orangĝo’ (malnovprovans. *arange*, *auranja*, it. *arancia*), *mapo* ‘tablotuko’ (lat. *mappa*), *hiberno* ‘vintro’ (lat. *hibernus*); verboj: *roge* ‘demandi’ (lat. *rogo*), *inquizze* ‘ekzameni, esplori’ (lat. *inquisitio*), *intelege* ‘kompreni’ (lat. *intellego*), *demande* ‘mendi’, ‘komisii’ (franc. *demande* ‘peto’, ‘petskribo’, *demande* ‘peti’), *opte* ‘deziri’ (lat. *opto*), *lube* ‘ŝati’ (pol. *lubić*, rus. *любить*); adjektivoj: *tetra* ‘malbela’ (lat. *taeter*), *calda* ‘varmega’ (lat. *caleo*, it. *caldo*, franc. *chaud*), *recenta* ‘freŝa’ (lat. *recens*).

En la senco de simileco de vortformoj kun la latin-eŭropaj radikoj ekz. Paraglot ne posedas – kontraŭe al Esperanto – afikson por krei antonimajn formojn (kun kontraŭa signifo). Tiel antonimoj estas kreataj en Paraglot helpe de apartaj radikoj kaj liveras al ĝi en tiu sfero pli altan gradon de redundanco²⁵, ekz. *bela* ‘bela’ – *tetra* ‘malbela’, *calda* ‘varmega’ – *friga* ‘malvarma’ (E-o-neologismo: *frida!*), *dextra* ‘dekstra’ – *sinistra* ‘maldekstra’ (E-o-neologismo: *liva!*), *diligenta* ‘diligenta’ – *pigra* ‘maldiligenta’ (E-o-neologismo: *pigra!*), *ante* ‘antaŭ, rekte, kontraŭe’ – *postri* ‘malantaŭ, malantaŭe, post, post tio’.

Ĉitie temas pri la vortoj, kiuj estas firme ligitaj al la okcidenta civilizacio.
Principo II.

Planlingvo devas esti regula en la sfero de morfologio kaj derivado, t.e. ne enhavi esceptojn kaj alomorfojn (ŝanĝojn de la radikoj)²⁶. Tiu postulo ofte malkongruas kun la principo konsideri internacian leksikon (komparu ekz. morfemŝanĝon *vid-/vis-*, el la lat. *videre* ‘vidi’) en la germana *Evidenz/Revision* aŭ en Esperanto *evidenteco/revizio*; alia ekzemplo: germ. *Video/Visum*, Esperanto: *video/vizo*. Pri tiaj morfemŝanĝoj (speciale en la latindevenaj vortoj) jam pli frue atentigis Rasmus Rask. Li skribis: „La samaj vortoj ekzistas en plej malsamaj formoj en la diversaj latinidaj lingvoj, ekz. lat[ine] *multum*, ital[e] *m[o]lto*, p[ortugale] *muito*, hisp[ane] *mucho*, ang[le] *much* [‘multe’], kaj la sama radikvorto ŝpartas en unu kaj sama lingvo multajn ŝanĝojn pere

25] Redundanco aŭ redundanta (el la lat. *redundantia* ‘elverŝiĝo’, ‘tropleno’) signifas enhavanta aldonajn aŭ troajn informojn. Praktike tio signifas, ke io estas facile komprenebla / komunikebla.

26] Ekz. la morfemo „3-a persono singularo indikativo prezenco“ en la germana havas kaze de la malfortaj verboj la ambaŭ morfemojn *-et* (en: *rechn-et*) kaj *-t* (en: *geb-t*). Pluralo de la substantivo kreiĝas helpe de diversaj alomorfoj: *Fisch* ‘fiŝo’ – *Fische* ‘fiŝoj’ (plurala-alomorfo: -e), *Vater* ‘patro’ – *Väter* ‘patroj’ (plurala-alomorfo: umlaŭto), *Wald* ‘arbaro’ – *Wälder* ‘arbaroj’ (plurala-alomorfo: umlaŭto + -er), *Schwester* ‘fratino’ – *Schwestern* ‘fratinoj’ (plurala-alomorfo: -n), *Auto* ‘aŭtomobilo’ – *Autos* ‘aŭtomobiloj’ (plurala-alomorfo: -s), *Tiger* ‘tigro’ – *Tiger*Ø ‘tigroj’ (plurala-alomorfo: nula alomorfo).

de derivado kaj fleksiado, ekz. hisp[ane] *factor* [‘faktoro’] [(kp. ankaŭ latine)], [hispane] *hacer* [‘fari’], *baria* [‘mi, li farus’], *hice* [‘mi faris’], *haga* [‘mi, li faru’], *hecho* [‘farita’].” (Rask [1823] 1996: 143).

Aŭtoroj de planlingvoj decidas fojfoje akcepti arbitrajn formojn, kiuj ne devenas el la naturlingvaj fontoj. El la psikologia vidpunkto tiuj formoj povas postuli aldonan tempooferon en la lernprocezo. Aliflanke ili evidentiĝas pli regulaj ol tiuj en la histori-naturaj lingvoj kaj konsekvence estas pli rapide lerneblaj. Ekzemplon por la akcepto de la arbitraj formoj prezentas la sistemo de la korelativaj pronomoj kaj korelativaj adverboj en Esperanto, nome: pronomradiko (*ki-*: baza signifo „interrogativo, demando pri io“, *ti-*: „demonstrativo“, *ĉi-*: „kolektivo“, *i-*: „indefinito“ kaj *neni-*: „negacio“). Same la finaĵo por pluaj distingo (-o: por markigo de la aĵoj, -u: personoj, -a: ecoj, -e: loko, -en: direkto, -el: maniero, -am: tempo, -om: nombro, -al: kialo kaj -es: posedo). El la kombinaĵo de la disponeblaj elementoj rezultas sume kvindek regule kreitaj tabelvortoj (korelativpronomoj kaj -adverboj). Ili havas klare difinitajn leksikajn signifojn. Ekzemploj: *ki-o?* germ. ‚was?’, *ki-u?* germ. ‚wer?’, *ki-a?* germ. ‚was für ein (-e, -es)?’, *ti-o* germ. ‚das’, *ti-om* germ. ‚soviel’; *i-o* germ. ‚alles’, *ĉi-e* germ. ‚überall’, *ĉi-am* germ. ‚immer’; *neni-u* germ. ‚niemand’, *neni-e* germ. ‚nirgendwo’, *neni-am* germ. ‚nirgendwann’, *neni-en* germ. ‚nirgendwohin’ ktp.²⁷

Tabelo 2. Korelativaj pronomoj kaj adverboj en Esperanto

	Individueco:	Objekto:	Eco:	Posedo:
	-u	-o	-a	-es
demandaj kaj rilataj: ki-	kiu	kio	kia	kies
montraj: ti-	tiu	tio	tia	ties
kolektivaj: ĉi-	ĉiu	ĉio	ĉia	ĉies
negativaj: neni-	neniu	nenio	nenia	nenies
nedifinitaj: i-	iu	io	ia	ies

Sfere de morfologio Rasmus Rask rekomendas: „Oni maksimume limigu la fleksion, ĉar ĝuste tiuĉi [fenomeno] komplikas kaj malfaciligas la lingvojn kaj diferencigas ilin unu de la alia; malsameco en fleksio necese implicas malsamecon en vicigo kaj kombino de la vortoj, konsideru ekz. la kontraŭraciecon de tio, ke la vorto [itale] *vantaggio* ‘avantaĝo’ en la ital[a] devas havi maskulinan genron, sed *ventaja* en la hisp[ana] havas la femininan

27] La artikolo de K. Ammer „Komparo de la esperanta korelativa tabelo kun la sanskrita” (1952) enhavas kritikan pritrakton kaj komparon de esperantaj korelativaj pronomoj kaj adverboj kun tiuj en la sanskrita. Ammer, K. *Komparo de la esperanta korelativa tabelo kun la sanskrita*, „Scienca Revuo“ (Purmerend) 3, 1952, 4, pp. 148-150.

genron, tiel ke kun artikolo ‘la’ estas *il vantaggio* kaj la alia *la venta-ja*; tamen tiu vorto en si mem estas nek maskla nek ina.” (Rask [1823] 1996: 143).

Principo III.

Oni devas eviti kompleksajn sintaksajn regulojn, kiel ekz. tiujn en la germana lingvo pri la pozicio de la verbo en la frazo. Depende de la frazotipo (ĉefpropozicio, subpropozicio aŭ demanda propozicio/frazo) la verbo en la germana okupas diversajn poziciojn: la unuan, la duan aŭ la lastan. 1.) En la ĉefpropozicio la verbo okupas la duan pozicion (kaj la subjekto la unuan), ekz.: *Der Bauer pflügt sein Feld.* ‚La vilaĝano plugas sian kampon.‘ 2.) Tamen en la demanda frazo la verbo okupas ĉiam la unuan lokon: *Pflügt der Bauer sein Feld?* ‚Ĉu la vilaĝano plugas sian kampon?‘ 3.) Kaze de du verboj tamen la konjugita (help)verbo okupas la duan pozicion (*muss* ‚devas‘) kaj la alia verbo staras fine de la frazo (*pflügen* ‚plugi‘): *Der Bauer muss sein Feld pflügen.* ‚La vilaĝano devas plugi sian kampon.‘ 4.) En la subpropozicio la verbo staras fine de la frazo (oni nomas tion la finpozicio de la verbo): *Das Jahr geht zu Ende, sodass der Bauer sein Feld pflügt.* ‚La jaro finiĝas, tiel ke la vilaĝano plugas sian kampon.‘ La subpropozicioj ne povas stari unusole. Ili ĉiam bezonas ĉefpropoziciojn. Ĉefpropozicio kaj subpropozicio estas ĉiam dividita per komo.

Ankoraŭ alia ekzemplo en la kaŭza frazo: *Ich gehe heute nicht zur Arbeit* (ĉefpropozicio), *weil ich krank bin* (subpropozicio). ‚Mi ne iras hodiaŭ al laborejo, ĉar mi estas malsana.‘ Frazoj kun la subordiga konjunkcio *weil* (‚ĉar‘) estas subpropozicioj, tial la verbo aperas fine de la frazo. Krome oni povas esprimi kaŭzon en la germana ankaŭ helpe de la apudordiga konjunkcio *denn* (‚ĉar‘) kunliganta du frazojn. La vortordo en la ambaŭ frazoj estas sama, kvazaŭ ili estus sendependaj unu de la alia, ekz.: *Ich gehe heute nicht zur Arbeit* (ĉefpropozicio), *denn ich bin krank* (ĉefpropozicio). ‚Mi ne iras hodiaŭ al laborejo, ĉar mi estas malsana.‘

Nepre eviteblaj estas ankaŭ divideblaj verboj (ekzemplo en la germana: *Ich gebe es nicht her.* ‚Mi ne fordonos ĝin.‘). Evito de tiaj sintaksaj komplikaĵoj estas rekomendinda speciale tiam, kiam ili estas malsignifaj por la semantiko.

Principo IV.

Oni devas eviti aŭ simpligi regulojn de la uzado de tiuspecaj gramatikaj kategorioj, kiuj ne servas la komunikadon, nome: rezignacio de gramatika genro (ekz. la germana, pola, sveda), la redukto de reguloj sfere de konjugacio, la simpligo de tempo- kaj modossistemoj, la simpligo de la morfologia sistemo ktp.

Tre simplan kaj klaran konjugacimodelon helpe de personaj finaĵoj (kongruantan al la personaj pronomoj) prezentis en la jaro 1823 la dana lingvisto Rasmus Rask:

Tabelo 3. Modelo de konjugacio en Linguaŝ universale de Rasmus Rask (1823) 1996 kun Esperanto-ekvivalentoj

	Prezenco	Preterito	Futuro
	∅	-T-	-R-
Sing. 1.	ama m ,mi amas'	ama t em ,mi amis'	ama r em ,mi amos'
2.	ama t ,vi amas'	ama t et ,vi amis'	ama r et ,vi amos'
3.	ama h ,li/ŝi/ ĝi amas'	ama t eh ,li/ŝi/ ĝi amis'	ama r eh ,li/ŝi/ ĝi amos'
Plur. 1.	ama mi ,ni amas'	ama t emi ,ni amis'	ama r emi ,ni amos'
2.	ama ti ,vi amas'	ama t eti ,vi amis'	ama r eti ,vi amos'
3.	ama hi ,ili amas'	ama t ehi ,ili amis'	ama r ehi ,ili amos'

Vidpunkte al la demando de allasebla grado de libereco en la prilaboro de la disponebla lingva materialo, Rask decidiĝas por la principo de la „maksimuma elektofideleco“ (kp. „maximale Auswahltreue“ en la senco de Eugen Wüster [1931] 1970: 326)²⁸. Li klopodas atingi laŭeble plej grandan „simplecon“ de la nova lingvo. Por atingi tiun celon li alstrebas optimuman ekvilibron inter la raciaj kaj lingvohistoriaj faktoroj.

Esperanto nun uzas por marki kompleksajn tempojn la helpverbon kaj participojn (participmarkilo en Esperanto: *-nt* – aktivo kaj *-t-* – pasivo). Helpe de la participoj en la kombinaĵo kun la tempo- (*-a-*, *-i-*, *-o-*) respektive modo-markilo (*-us*) kaj la helpverbo *esti* eblas esprimi diversspecajn temporilatojn. Linguaŝ universale enhavas apud la naturalismaj ankaŭ plurajn skemismajn karakteriztraĵojn. Al ili apartenas elementoj kaj formoj, kiuj estas pli regulaj kaj konsekvencaj ol tiuj de la naturaj lingvoj kaj tiel signife faciligas ellernon kaj uzadon de la nova lingvo. Rask postsekvas do la principojn, kiuj estas konformaj al la aposteriora tipo. Ni rememorigu ĉitie, ke tiaspecaj planlingvoj (kreitaj sur la bazo de la histori-naturaj lingvoj) strebas esti facile lerneblaj kaj laŭeble mondvaste uzeblaj. Unuflanke la aposterioraj lingvoj celas regulecon kaj simplecon kaj per tio laŭeble unusencan rilaton inter la signoformo kaj ĝia signoenhavo. Sed aliflanke ili konsideras la historie evoluintajn ortografiajn, fonologiajn, morfologiajn, leksikajn kaj sintaksajn fenomenojn.

La sistemo de Esperanto ebligas jenajn diferencigojn de tempo kaj ago (tabelo 4).

28] E. Wüster, *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik*, Bonn: Bouvier, 1970. (1. Aufl. Berlin 1931.)

Tabelo 4. Eblecoj esprimi kompleksajn tempojn en Esperanto

<p>Aktiva voĉo</p> <p>mi estas skribanta</p> <p>mi estas skribinta</p> <p>mi estas skribonta</p> <p>mi estis skribanta</p> <p>mi estis skribinta</p> <p>mi estis skribonta</p> <p>mi estos skribanta</p> <p>mi estos skribinta</p> <p>mi estos skribonta</p>	<p>‚ich bin dabei zu schreiben, ich schreibe gerade‘ (por esprimi okazadon en la nuntempo)</p> <p>‚ich habe geschrieben‘ (por esprimi la daŭron de la finita ago)</p> <p>‚ich gehe ans Schreiben‘ (por esprimi intencon aŭ staton antaŭan al ago)</p> <p>‚ich war dabei zu schreiben, ich schrieb gerade‘ (por emfazi la subitecon, neatenditecon de la intervenanta okazaĵo)</p> <p>‚ich hatte geschrieben‘ (por esprimi daŭron de la finita ago)</p> <p>‚ich ging ans Schreiben‘ (por esprimi intencon aŭ staton antaŭan al ago)</p> <p>‚ich werde dabei sein zu schreiben‘ (por esprimi okazadon en la estonteco)</p> <p>‚ich werde geschrieben haben‘ (por esprimi okazadon de la finita ago)</p> <p>‚ich werde ans Schreiben gehen‘ (por esprimi intencon antaŭan al ago)</p>
<p>Pasiva voĉo</p> <p>ĝi (ekz. ĉapitro) estas skribata</p> <p>ĝi estas skribita</p> <p>ĝi estas skribota</p> <p>ĝi estis skribata</p> <p>ĝi estis skribita</p> <p>ĝi estis skribota</p> <p>ĝi estos skribata</p> <p>ĝi estos skribita</p> <p>ĝi estos skribota</p>	<p>‚es (z.B. das Kapitel) wird gerade geschrieben‘ (por esprimi agon en la nuntempo)</p> <p>‚es ist geschrieben worden‘ (por esprimi rezulton en la nuntempo)</p> <p>‚es ist dazu bestimmt, (später) geschrieben zu werden‘ (por esprimi intencon en la nuntempo)</p> <p>‚es wurde gerade geschrieben‘ (por esprimi finitan agon mem en la nuntempo)</p> <p>‚es war geschrieben worden‘ (por esprimi finitan agon mem en la pasinteco)</p> <p>‚es war dazu bestimmt, (später) geschrieben zu werden‘ (por esprimi finitan agon mem en la estonto)</p> <p>‚es wird geschrieben werden‘ (por esprimi agon mem en la estonto)</p> <p>‚es wird geschrieben worden sein‘ (por esprimi rezulton mem en la estonto)</p> <p>‚es wird dazu bestimmt sein, (danach) geschrieben zu werden‘ (por esprimi rezulton mem en la estonto)</p>
<p>Kondicionalo aktivo</p> <p>mi estus skribanta</p> <p>mi estus skribinta</p> <p>mi estus skribonta</p>	<p>‚ich wäre dabei zu schreiben‘ (hipoteza esprimo de okazado en la nuntempo)</p> <p>‚ich hätte geschrieben‘ (hipoteza esprimo de okazado en la pasinto)</p> <p>‚ich würde ans Schreiben gehen‘ (hipoteza esprimo de okazado en la pasinto)</p>

Kondicionalo pasivo	
ĝi estus skribata	,es (z.B. ein Kapitel) würde gerade geschrieben' (hipoteza esprimo de okazado en la nuntempo)
ĝi estus skribita	,es wäre geschrieben worden' (hipoteza esprimo de okazado en la pasinto)
ĝi estus skribota	,es wäre dazu bestimmt, (später) geschrieben zu werden' (hipoteza esprimo de okazado en la pasinto)

Tiuj diversaj analitikaj formoj ebligas nuanci la signifon de diversaj tempo-/stato- kaj agorilatoj (ekz. por esprimi la anglan durativon *continuous tense*). Sed aliflanke, eĉ se tiaj kompleksaj formoj evidentigaŝ fojfoje utilaj, oni povas en la normala ĉiutaga lingvouzo rezigni pri ili. Sume oni povas diri, ke la kreado de tiel kompleksaj tempo- kaj agoformoj en Esperanto ne ĝenas ties morfologian klarecon.

Alia ekzemplo: En la komparacio en Esperanto la pozitivo estas la elirformo por krei gradojn de kvalito (ekz. *bona*). En la aŭgmentacio (ascendo) komparativo kreiĝas helpe de la partikulo *pli* (ekz. *pli bona*) kaj la superlativo helpe de la partikulo *plej* (ekz. *plej bona*). En la diminucio (descendo) helpe de *malpli* (ekz. *malpli bona*) kaj *malplej* (ekz. *malplej bona*). En la planlingvo Linguaŭ universale en la aŭgmentacio helpe de *mas* (,pli') kaj *el mas* (,plej'). En la diminucio helpe de *min* (,malpli') kaj *el min* (,malplej'). Ekz. *Caio ser mas dokte ke Pedro es el mas dokte de pante italianos*. (,Caio estas pli edukita ol Pedro kaj la plej edukita de ĉiuj italoj.) (Komparu male al tio la neregule kreitajn formojn en la latina *bonus* ,bona' – *melior* ,pli bona' – *optimus* ,plej bona', *malus* ,malbona' – *peior* ,pli malbona' – *pessimus* ,plej malbona' aŭ en la dana *god* ,bona' – *bedre* ,pli bona' – *bedst* ,plej bona', *små* ,malgranda' – *mindre* ,pli malgranda' – *mindst* ,plej malgranda'.)

Tabelo 5. Komparacio en Linguaŭ universale (kp. Rask [1823] 1996: 72)

pozitivo	komparativo	superlativo
BONE [,bona'] (MELJO)	MELJÓR [,pli bona']	OPTIME {(MELLIME)} [,plej bone']
MALE [,malbona'] (PEĜÍÓ)	PEĜÍÓR [,pli malbona']	PECSIME [plej malbona']
GRANDE [granda'] (MAS)	MAĜÍÓR [,pli granda']	MACSIME [plej granda']
PECENE [malmulta'](MIN)	MINJÓR [,pli malmulta']	MINNIME [plej malmulta']

Principo V.

Mondskale uzebla planlingvo devas esti kapabla, redoni kaj adekvate prezenti ĉiujn konceptojn de la homa vivo kaj sperto. Pro tio ilia fonologia kaj morfologia strukturo devas ĉiam ebligi (a) transprenon de internaciismoj

kaj pruntvortoj el la etnaj lingvoj kaj akomodigi ilin al la propra sistemo aŭ (b) krei novajn vortojn surbaze de la jam ekzistantaj leksikaj elementoj. Krome ĝi devas havi flekseblan vortkreatan sistemon por nomi ĉiujn novajn objektojn kaj fenomenojn. Aldone plej multaj planlingvoj strebas havi vortojn, kiuj estos unusignifaj. Tio rilatas speciale la fakajn lingvojn. La historio kaj la uzado de la funkciantaj planlingvoj kiel Esperanto aŭ Ido montras tamen, ke la *sinonimio* kaj la *homonimio* ne estas tute eviteblaj. Jen kelkaj ekzemploj en Esperanto: *dorm/ĉambro* – *dorm/ej/o*, *grand/a* – *eg/a*, *pom/arb/o* – *pom/uj/o* ktp. Kandidatoj por plena sinonimio en Esperanto ŝajnas esti a) konkurantaj geografiaj nomoj, kiel ekz. *Suomio* – *Finnlando*, *Hindujo* – *Bharato* kaj b) multaj konkurantaj kun si formoj (t.e. internaciaj radikoj apud la vortkunmetaĵoj), kiel ekz. *ambigua* – *dusenca*, *eterna* – *porĉiama*, *trajno* – *vagonaro*, *arkipelago* – *insularo*.

Rask kaj Jespersen atentigis pri la danĝero krei tro multajn nenecesajn samsignifajn vortojn, kiuj nur ŝarĝos kaj komplikos vortarojn.²⁹ Tiaj dubindaj samsignifaj vortoj fojfoje troveblas en Esperanto: *kevezalo* (apud la jam ekzistanta *kecalo*), germ. ‚Quetzal‘ (birdo), *toksiko* (apud *drogo*), germ. ‚Droge‘, *versiklo* (apud *verso*, *versego*), germ. ‚Vers‘.³⁰

Ekzemploj de *polisemio* estas vortoj kiel *verda*, kiuj en diversaj kuntekstoj povas signifi: *Maria havas verdan bluzon*. *La pomoj estas verdaj*. *Ni sendas verdajn salutojn*³¹, samkiel: *el verda vidpunkto*.

Principo VI.

Nepre eviteblaj estas esprimoj, en kiuj la signifo de la tuto ne estas divenebla surbaze de la unuopaj vortoj (frazeologismoj), kiel ekz. la angla: *How are you?*, la germana: *Wie geht es Ihnen?*, *die Flinte ins Korn werfen*, la pola: *utrząć komuś nosa* ‚diri al iu sian opinion‘ (laŭvorte: ‚froti al iu la nazon‘), *znać się na czymś tyle, co kura na pieprzu*, germ. ‚von etwas soviel wie der Blinde von der Farbe verstehen‘ (laŭvorte: ‚tiom kompreni kiel la kokino pri la pipro‘) ktp. Ankaŭ frazeologismoj enhavantaj proprajn nomojn, kiel ekz. la angla: *it's all Greek to me* kaj la germ. *böhmische Dörfer* por ‚io nekomprenebla‘ aŭ ‚tute nekonata‘, estas nepre eviteblaj.³²

29] O. Jespersen, *An international language*, cit., p. 127.

30] Kp. W. F. Huppertz, *Sublamenta veo je l'Pivida pereo*, „Esperanto” (Rotterdam) 84, 1991, 4, n-ro 1024, p. 78.

31] Kp. ankaŭ M. Waseda, *Esperanto: a living language*, in: I. Szerdahelyi, (red.), *Miscellanea Interlinguistica*, Budapest: Tankönyvkiadó, 1980, pp. 465-512.

32] Pri diversaj tipoj de frazeologismoj pli detale okupiĝas S. Fiedler en ŝia ampleksa verko „Plansprache und Phraseologie”, Frankfurt am Main [etc.]: Lang 1999.

4. Resumaj rimarkoj

Resume oni povas diri, ke ne ĉiam estas facile konsideri ĉiujn bazajn konstruprincipojn. Kelkaj el tiuj principoj povas eĉ kontraŭi unu la alian. Tiel la aŭtoroj de planlingvoj devas en ĉiu unuopa kazo decidi, kiun principon ili sekvas. Tio signifas, ke ili devas fojfoje trovi kompromisan solvon inter diversaj konkurantaj kun si principoj. Diversaj planlingvoj sekvas la principojn malsamgrade, tiel ke rilate al unu aŭ alia konstruprincipo tiaj lingvoj povas havi defecitojn.

Ĉiuokaze estas certe, ke plej multaj aŭtoroj de planlingvoj preferas morfologiajn formojn, kiuj estas senesceptaj, senvariaj, facile segmenteblaj, travideblaj kaj unusignifaj. Tioĉi adekvatas al ĝeneralaj konstrureguloj de internaciaj planlingvoj strebantaj al laŭeble plej altgrada reguleco.

Ĝenerale oni povas konstati, ke tiu aŭ alia planlingvo estas pli facile lernebla ol iu ajn histori-natura lingvo kaj tamen ne esti malpli esprimkapabla. La plej problemaj estas la principoj II. kaj IV. Tipa karakterizaĵo de la leksiko kreita laŭ la skemisma metodo estas ĝia reguleco kaj kapablo krei novajn formojn surbaze de la jam ekzistantaj, bazaj, kio kondukas al pli da aŭtonomeco. Klaraj, flekseblaj vortkreaĵoj reguloj ebligas en skemismaj lingvoj generadon de diversaj vortkombinaĵoj (t.e. derivaĵoj kaj kunmetaĵoj). Utiligo de la baza leksiko por konstrui aliajn formojn permesas ŝpari tempon por lerni novajn vortojn, kiel ekz. Esperanto: *sano, sana, resaniĝi, malsana, malsanulo, malsanulejo, sanstato* ktp. Ambicio de la plej multaj aŭtoroj de planlingvoj estis ja atingi esprimkapablon en iliaj lingvoj ne malpli altan ol tiu en la naturaj lingvoj.

Konsekvence de la vortkreaĵoj procedoj en skemismaj lingvoj morfemaj ne ŝanĝiĝas (ĉi tie temas pri la morfologia fenomeno de sonalternado aŭ supleco ĉefe en la histori-naturaj lingvoj). Sonalternado (alivorte: morfemvariado) tamen fojfoje okazas ankaŭ en planlingvoj kiel ekz. Paraglot de Tadeusz Ficowski (ekz. *lek* ,vorto': *lex / ario* ,vortaro"), kie okazas interŝanĝo de fonemoj kadre de unu morfemo (*k* → *x*). Tiu fenomeno ne estas tute fremda al la naturalismaj lingvoj, kiuj volas esti en sia ekstera aspekto laŭeble plej similaj al la naturaj (font)lingvoj de iu difinita lingvofamilio (kaze de Paraglot – la latinida), eĉ se tio devas okazi je la kostoj de certagrada nereguleco – kaj tio signifas: lernfacileco.³³ Tiel al la plej granda avantaĝo de la naturalismaj lingvoj apartenas senpera rekono de iliaj elementoj kaj formoj. Al edukitaj uzantoj tiu eco devas ebligi rapidan alproprigon de la leksika materialo de la nova lingvo.

33] Kp. W. F. Huppertz, *Sublamenta veo je l'Pivida pereu*, „Esperanto” (Rotterdam) 84, 1991, 4, n-ro 1024, p. 78.

Multaj planlingvoj enkorpiĝas provon krei lingvon sen nereguleco kaj sen esceptoj. Por marki gramatikajn kategoriojn, kiel vortospecoj, tempo, modo kaj nombro, skemismaj lingvoj posedas finaĵojn, ekz. Esperanto: substantivo *-o*, adjektivo *-a*, pluralo *-j*, adverbo *-e* kaj *-aŭ*, verbo – infinitivo *-i*, prezenco *-as*, preterito *-is*, futuro *-os*, kondicionalo *-us*, optativo (imperativo) *-u*.

La leksika materialo kune kun iliaj signifoĵoj estas en multaj planlingvoj transprenita ĉefe el la klasika latina, parte ankaŭ el la novtempaj latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj. Tiel vidpunkte al la demando de vortetimologio unu grava riproĉo rilatas la troan centriĝon je la eŭropaj aŭ la okcident-eŭropaj lingvoj. Se temas pri la leksiko, tiu problemoj estas malfacile solvebla pro la disvastiĝo de internaciaj terminologioj. Nesolvita demando restas ankaŭ, ĉu ne eblus en alia sfero de la lingvosistemo pli altgrade konsideri ekstereŭropajn lingvojn.

Krome en la deklinacio en la plimulto de planlingvoj ekzistas „rekta kazo“ (*casus rectus*). „Oblikva kazo“ (*casus obliqui*) en genitivo, dativo, akuzativo kaj instrumentalo kreiĝas helpe de prepozicioj aŭ finaĵoj. Ekzemplo en Esperanto: nominativo: *patro*, genitivo *de patro* (prepozicio *de*), dativo: *al patro* (prepozicio *al*), akuzativo: *patron* (finaĵo *-n*). Tiamaniere la skemismaj kaj naturalismaj lingvoj preferas sfero de deklinacio kaj konjugacio fleksion apud-/ĉepozician (ekz. Esperanto: de *patro*, al *patro*, kun *patro*) kaj ne afiksan (ekz. pola: *ojca* ‚de patro‘, *ojcu* ‚al patro‘, *z ojcem* ‚kun patro‘). Tio signifas, ke tiaj planlingvoj preferas fleksion alispecan de tiu, kiun karakterizas klasikaj hindeŭropaj lingvoj plenaj de afiksa fleksio kaj de alomorfoj.

Konsiderante la morfologion kaj sintakson de la plej multaj planlingvoj oni povas observi, ke ili pli inklinas al la modeloj de la aglutinaj lingvoj (kiel ekz. la turka aŭ la afrikaj lingvoj el la Bantufamilio) kaj ne al tiuj de la fleksia tipo de la hindeŭropaj lingvoj (kiel la latina, la pola, la rusa aŭ la germana).

DE LA PLANLINGVO DE ZAMENHOF ĜIS NATURE DISVOLVIĜANTA LINGVO: ETAPOJ DE LA EVOLUO DE ESPERANTO

0. ENKONDUKO

MULTAJ LINGVOPROJEKTOJ EKSTIS DUM LA HISTORIO, EĈ LASTATEMPE la emo krei lingvon kreskis dank'al la interreto (vd. *The Language Construction Kit*), sed malmultaj planlingvoj ekvivas, la plejmulto restas kuriozaĵo aŭ lingva ludo. Por ke lingvo ekvivu, necesas lingvokomunumo kiu ĝin uzas kaj disvolvas. Tio okazis ĉe Volapuko (publikigita en 1879) tuj antaŭ la apero de esperanto kaj ĉe pluraj postaj planlingvoj kiel Ido, Novial, Interlingua. Eĉ iuj artaj lingvoj (por la klasifiko de artefaritaj lingvoj vd. Blanke 2001, Stria 2013) havas kelkajn parolantojn kiel Klingon. Tamen nur esperanto disvolviĝis al plena lingvo, al nature funkcia lingvo, ĝi havas disvolviĝantajn strukturon, riĉan leksikon kaj parolkomunumon. Blanke (2001) formulas 28 kriteriojn de strukturaj ĝis pragmatikaj por povi paroli pri plena planlingvo. Fakte, eĉ kelkaj etnaj lingvoj ne plenumas ilin, sed tiam ili jam estas endanĝerigitaj.

Por ke lingvo plenumu la rolon de natura komunikilo, necesas ankaŭ bezono por ĝi. En la XIX-a jc. unuflanke pro la teknika evoluo (apero de vaporlokomotivo, telegramo) komunikado de homoj el pli malproksimaj terenoj jam iĝis kutima, aliflanke la latina ne plu plenumis sian internacian rolon, tiel ekstis bezono por komuna internacia lingvo (kp. Tonkin 2004). Do, Ludoviko Zamenhof en la ĝusta historia momento proponis sian internacian lingvon. La loka multlingveco en Bjalistoko (tiam parto de la Rusa Imperio) kaj la konfliktoj inter diversnacianoj instigis lin krei esperanton

kredante, ke komuna lingvo helpas solvi la problemojn. Kun la vastiĝanta procezo de tutteriĝo en la XX-a jc. la bezono por komuna lingvo kreskis. Kvankam la etnolingva kandidato, la angla grandskale transprenis tiun rolon en la XXI-a jc., esperanto transvivis 130 jarojn kaj restas kiel alternative por internacia komunikado, plej ofte en amikaj kontaktoj.

Zamenhof kreis lingvon surbaze de eŭropaj lingvoj (latinidaj kaj ĝermanaj), sed kun simpla kaj regula gramatiko, limigis la originajn signifojn de la vortoj al iliaj kernaj signifoj, kaj li kompensis tion per la produktiva vortfarado (vd. Koutny 2015, 2018). Pro tio ĝi estas pli alirebla ankaŭ al ekstereŭropanoj (kp Yamasaki 2000).

Mi esploras kiel la lingvoprojekto de Zamenhof el 1887 kun minimumaj gramatiko kaj vortaro evoluis al disvolviĝanta natura lingvo kun relative granda lingvokomunumo dismetita en la mondo kaj provas instali periodojn en la evoluo de esperanto. En tio mi baziĝas sur la aliro de István Szerdahelyi (fondinto kaj gvidanto de la Esperanto-fako de Eötvös Universitato (ELTE) en Budapeŝto). Li distingis en 1987 tri etapojn en la evoluo de esperanto referencante al la gravaj lingvaj dokumentoj de la epoko (Szerdahelyi 1987):

- 1) De la komenco ĝis 1920 – unua fundamento: kiam okazas la elfomiĝo de la lingvo, kiun reprezentas la *Fundamento de Esperanto* el 1905;
- 2) de 1920 ĝis 1960 – dua fundamento: kiam elformiĝas la literatura lingvo en esperanto ankaŭ dank'al la kontribuo de la literatura revuo *Literatura Mondo*. Gravaj dokumentoj de tiu epoko estas la unulingva *Plena Vortaro de Esperanto* (el 1930, redaktita de E. Grosjean-Maupin) kaj la *Plena Gramatiko* (el 1935, ellaborita de G. Waringhien kaj K. Kalocsay).
- 3) de la 60-aj jaroj – scienca esperantologio: kiam komenciĝas scienca okupiĝo pri esperanto. Karakterizas tiun ĉi epokon *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV el 1970) kaj Plena Analiza Gramatiko (PAG el 1980).

En la 70-aj jaroj ne nur la Esperanto-fako de ELTE donis institucian kadron al scienca okupiĝo pri esperanto, sed ankaŭ Helmar Frank, profesoro de la Paderborna universitato. Li kun aliaj fondis ankaŭ la *Akademion Internacian de la Sciencoj* en 1985. En la sekvoj mi prezentos la evoluon de la lingvo esperanto de la komencoj ĝis nun en 5 etapoj kaj kun la reprezentaj gravaj lingvaj dokumentoj koncerne gramatikon, leksikon kaj kulturon.

1. LA LINGVOPROJEKTO DE ZAMENHOF – LA UNUA LERNOLIBRO EN 1887

La „kompleta lernolibro“ de la Internacia lingvo de D-ro Esperanto, la t.n. Unua libro aperis en 1887 ruse, poste pole, germane kaj france, en

1888 angle, en 1889 hebree. Reale temas pri 40-paĝa broŝuro. Ĝiaj gravaj elementoj estas:

- ✓ Gramatiko en 16 reguloj (kun la alfabeto nur 6 paĝoj)
En 1894 aperis la 43 paĝa Ekzercaro (dua eldono en 1898) kiu entenas implicite la gramatikon en 42 ekzercoj. Ĝi iĝis parto de la Fundamento. Ankaŭ la *Lingvaj respondoj* de la Aŭtoro (Zamenhof 1889-1912) helpis en la problemaj kazoj.
- ✓ Vortaro: 917 radikoj kun etnolingvaj ekvivalentoj (sur disfaldebla folio)
En la koncizega „vortaro“, praktike vortlisto, enestas leksikaj radikoj, afiksoj kaj finaĵoj en alfabeto ordo kun alilingvaj ekvivalentoj, la du lastaj kun klarigoj. Jam tie ĝermas la problemo i.a. de radikkaraktero, ja estas diferenco inter la nacilingvaj vortoj inter si (ekz. *komb kämmen* en la germana estas verbo, sed *comb* en la angla povas esti verbo kaj substantivo).
- ✓ Kulturo:
En la enkonduka parto de la *Unua libro* troviĝas literaturaĵoj kiel *Patro nia*, *El la Biblio*, *Letero*, du originalaj poemoj – *Mia penso*; *Ho, mia kor* – kaj tradukaĵo el la verko de Heine. Zamenhof konsciis pri tio, ke necesas viviĝi la lingvon per kulturo, kaj tion eblas montri per ĝia taŭgeco ne nur por la ĉiutaga komunikado, sed ankaŭ por la literaturo. Li poste komencis traduki klasikajn verkojn kio kontribuis al la riĉigo de la vortoprovizo. La kultura flanko estis eŭropeca, judkristana. Tion demonstros ankaŭ la *Proverbaro de Esperanto* verkita de Zamenhof (1910).

En la enkonduko de la *Unua libro* Zamenhof skribas:

„Ĉiu vorto [de mia “Internacia Lingvo”] sin trovas *ĉiam* kaj *sole* en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro, kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj, k.t.p. estas esprimataj per la kunigo de sensanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembrigon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj...”

La lingvoprojekto ĉerpis siajn radikojn el eŭropaj lingvoj, kiujn Zamenhof konis, sed la kombineblo de sensanĝaj vortoj – kiel li nomas ĉiujn lingvajn elementojn, kiujn ni hodiaŭ nomas morfemoj – igas ĝin iom simila al ekstereŭropaj lingvoj, kiel la ĉina (Haitao 2004).

Rapide elformiĝis parolkomunumo, kiu estas esenca en la evoluo de lingvoprojekto al lingvo. Gravus ankaŭ tio, ke Zamenhof konsideris sin

kiel iniciatinton de la lingvo kaj deklaris, ke la internacia lingvo apartenas al ĉiuj. Li estis preta ŝanĝi la lingvon, sed la voĉdonado en 1894 en la gazeto *Esperantisto* rifuzis la reformojn kaj konfirmis la version de Zamenhof.

En tiu periodo okazis jam evoluo, la afiksoj komencis memstariĝi: *inda, igi, ilo, ano, dise, emo, ekxa* (1888), *eco, estro* (1889), *eta, ingo, ino, aro* (1890-94), *iĝi* (1896), el ili eblis fari kunmetitajn vortojn kiel *aliĝi, ekxiĝi* (1888) kaj tio daŭris poste (DucGoninaz 2004). Iuj vortoj arkaikiĝis, transdonis sian lokon al aliaj: *alrigardi* > *aspekti, bankiero* > *bankisto, pafilego* > *kanono* ktp. Jam sentiĝis la batalo de la du tendencoj skemismo kaj naturalismo (Minnaja) kiel *redakcio – redaktejo, redaktoro – redaktisto*.

Menciindas, ke Zamenhof havis senton por surmerkato de la internacia lingvo, li aldonis promesilojn al la broŝuro kun la teksto: „Mi, subskribita, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson“ (subskribo). Kvankam neniam estis tiom granda amaso da lernantoj, uzantoj de esperanto, la ebleco, ke aliaj lernos la lingvon, certe spronis la homojn.

2. STABILIGO DE LA LINGVO ESPERANTO – FUNDAMENTO EN 1905

La Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marco (Boulogne-sur-Mer) en 1905, la unua UK estas grava mejloŝtono en la historio de esperanto kaj montras la stabiligon de la internacia lingvo. La *Deklaracio pri la esenco de Esperantismo*, alinome *Bulonja Deklaracio* estis tiam akceptita kiu deklaris la netuŝeblecon de la fundamentoj de esperanto kiu aperis sub la nomo Fundamento de Esperanto. Ĝi entenas:

- ✓ Fundamenta Gramatiko en 5 lingvoj: franca, angla, germana, rusa kaj pola.
La dua parto estas la Ekzercaro. Temas pri 42 paragrafoj kun 5 lingvaj tradukoj kiuj praktike ekzercas kaj klarigas diversajn gramatikaĵojn.
- ✓ Universala Vortaro: 2640 radikoj kun la 5 etnolingvaj ekvivalentoj.
La vortoprovizo kreskis dum la pasintaj 18 jaroj pro la efektiva uzo kaj literatura tradukado.
- ✓ Larĝa kultura kaj socia fono: tradukoj (Zamenhof: Hamleto, Kabe: Faraono, Grabowski: Sinjoro Tadeo ...), originalaj verkoj (Vallienne: *Kastelo de Prelongo. Ĉu li? Ktp.*).

En 1905 estis fondita ankaŭ la *Lingva Komitato* kun 102 membroj el 28 landoj laŭ la propono de Zamenhof. Ĝi celis kontroli la konservon de la fundamentaj principoj kaj la evoluon de la lingvo. La Fundamento ĝis nun valida certigas la bazon de la lingvo kaj la lingvokomunumo ĝian evoluon.

Komenciĝas teoriumado pri esperanta gramatiko: René de Saussure, membro de la Akademio de Esperanto, skribas pri la logika vortfarado de esperanto, enkondukas la regulon de sufiĉo kaj neceso (en *Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en Esperanto*, 1915). La fama diskuto pri radikalkaraktero laniĝas. Lingvistoj ekinteresiĝas pri esperanto, i.a. Ferdinand de Saussure, granda figuro de la moderna ĝenerala lingvistiko, frato de la matematikisto René (pri ilia interrilato vd. Kuznetcov 2018).

La unuan UK-n partoprenis 688 personoj, kio montras ke la parolkomunumo bone disvolviĝis. Poste sekvis ĝin aliaj kongresoj en Eŭropo kaj Usono ĝis kiam la unua mondmilito faris paŭzon. Ekestis asocioj kaj organizaĵoj. La unuajn du periodojn karakterizas la persona kontribuo kaj kontrolo de Zamenhof.

3. EVOLUO AL MATURA LINGVO – EKDE LA 30AJ JAROJ

Post la unua mondmilito reviviĝis la movado, ankaŭ la okupiĝo pri la lingvo kaj verkado, kio plene disvolviĝis en la 30-aj jaroj. Jam estis bezono por deca gramatika priskribo de esperanto kaj ankaŭ por vortaro kiu difinas esperanton ne surbaze de aliaj lingvoj – kiuj cetere diferencas inter si, sed ene de la propra sistemo. Aperis du gravaj dokumentoj en tiu periodo.

- ▼ Plena Gramatiko de Esperanto (PG, Kolomano Kalocsay & Gaston Waringhien, 1935, Literatura Mondo en Budapeŝto), sekvis kelkaj eldonoj: en 1938 la korektita, en 1958 la 3a kompletigita eldono.

Estas grava evento la apero de aparta detala gramatiko, kiu plenigis la iaman gramatikan skeleton de la Zamenhofa lingvo. Ĝi spegulas la tiaman tradician aliron al gramatiko. La priskriba gramatiko konsistas el du partoj en pluraj ĉapitroj, fine indekso.

LA VORTO: I. Fonetiko; II. Vortfarado; III. Morfologio k sinetio

LA FRAZO: I. Vortsintakso; II. Propozicio-sintakso; III. Frazsintakso

- ▼ Plena Vortaro de Esperanto (PV, redaktita de Emile Grosjean-Maupin, 1930, SAT). Kelkaj eldonoj: en 1934 plivastigita 2a eldono, en 1953 4a eldono kun suplemento de G. Waringhien en 1953, en 1996 11-a eldono.

PV estas unulingva difinvortaro kiu estis tre bonvena por la internacia lingvo, ja ĝis tiam aperis nur dulingvaj vortaroj, do esperanto ne havis propran semantikan sistemon. La *Plena Vortaro* povis doni modelon, iusence normon por la alilingvaj vortaroj, eĉ se oficiale ĝi ne estis preskriba vortaro. La dua eldono konsistis jam el 6900 radikoj, la eldono kun suplemento el 1953 jam 7866. La evoluo de la vortoprovizio estas bone videbla. Pri la vortaro indas citi la opinion de Kalocsay el la *Esperanta Enciklopedio*:

„Zorge farita ampleksa kaj detala, vere grandvalora verko. La Vortaro ne donas sole vortklarigojn, sed montras la uzon de la vorto per fraz-ekzemploj el bonaj aŭtoroj, precipe de Zamenhof. Per sia tre zorge redaktitaj Zamenhof-ekzemploj li fiksas por ni la tutan Zamenhofan lingvo-uzon. Ampleksaj gramatikaj kaj vortderivaj klarigoj kaj vere admirinde zorge farita sinonimaro kompletigas la verkon je dezirinda kaj nemalhavebla vortaro”.

Kvankam en la 20-aj jaroj (1923, 25, 26, 29) aperis la volumoj de la Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana de Eugen Wüster, eblas ilin kalkuli al tiu ĉi epoko de maturiĝo: la vortaro entenas terminojn kaj en la enkonduko Wüster formulas principojn de terminfarado kiuj poste iĝis principoj de ĝenerala terminologio-scienco (pli detale i.a. vd. Blanke 1999). El tio vidiĝas la taŭgeco de esperanto por sciencaj tekstoj kaj modela rolo por aliaj lingvoj.

- La Enciklopedio de Esperanto el 1933 (red. Lajos Kökény kaj Vilmos Bleier, Budapeŝto: Literatura Mondo) manifestas, ke la lingvo jam havas historion kaj propran kulturon kun famaj personoj kaj verkoj.

La tradukoj de bone konataj literaturaj verkoj kaj la verkado de originalaj verkoj maturigas la lingvon. La revuo *Literatura Mondo* en Hungario kaj la *Budapeŝta skolo* multe kontribuas al la elformiĝo de literatura lingvo kaj entute al la disvolviĝo de esperanto. La tradukado esperanten havas pli grandan rolon ol en la etnaj lingvoj.

Eblas jam paroli pri aŭtonoma lingva sistemo, uzebla en diversaj terenoj de la vivo, la vortoprovizo daŭre pliriĉiĝas, sed la gramatika fundamento restas stabila.

4. MATURA LINGVO – POSTMILITA RENASKIĜO KAJ EVOLUO ĜIS 1980-AJ JAROJ

Esperanto gajnis kontraŭ la konkurencaj planlingvoj (ne nur kontraŭ Ido, sed ankaŭ Interlingua de IALA kaj aliaj) pro la plena ensociiĝo. Ĝi jam havis konsiderindan nombron da denaskuloj kiuj nature uzas esperanton kiel gepatran lingvon. La vortotrezoro de familia lingvaĵo disvolviĝas (vd. *Hejma vortaro*, red. de Jouko Lindstedt en 1999). La bazaj dokumentoj de tiu epoko estas:

- ✓ Plena Analiza Gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien (PAG 4-a reverkita eldono de *Plena Gramatiko*, en 1980, poste 1985)

Temas pri pliampleksigita tradicia priskriba gramatiko kiu koncentriĝas al konkretaj kaj propraj internaj problemoj de la internacia lingvo (radikkaraktero, -ata/ita problemoj). Vidu recenzon de Jouko Lindstedt el 1982. Tamen aperas

malgranda moderna, konciza gramatiko en 1978, Lingvistikaj aspektoj de Esperanto de John Wells. Ĝi lasta provas priskribi esperanton en moderna lingvistika kadro, komparante ĝin kun naturaj lingvoj.

- ✓ Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV, 1970, SAT) red. G. Waringhien en kunlaboro kun multaj fakuloj. Suplemento aperas en 1987. PIV entenas ĉ. 16 000 radikojn en vortnesta aranĝo.
- ✓ Esperanta Bildvortaro de Rüdiger Eichholz (1988 post 24 jara laborado surbaze de Duden bildvortaro el la 50-aj jaroj, 880 p.). Ĝi havas grandan nombron da fakaj vortoj.

La faka aplikado de esperanto, unuavice la ellaboro de terminaroj pli intensiĝas, fondiĝas TEC (Terminologia Esperanto-Centro) en 1987 kun celo serioze daŭrigi la laboron komencitan de Wüster kaj aliaj fakuloj kiel Neergaard. Vera kaj Detlev Blanke multe faras por la scienca okupilo pri terminologio.

- ✓ Esperanto-fako en la Universitato Eötvös en Budapeŝto ekde 1966 (ĝis ĉ. 2006) ofertas esperantologiajn studojn kun diplomo (egalvalora al magistra). Estas la unua kaj longe sola universitato kun kompleta studprogramo pri esperantologio, temas pri instituciigita scienca traktado de esperanto. István Szerdahelyi ellaboris universitatajn studprogramojn kaj lernolibrojn. Li gvidis grandan eksperimenton en 5-landoj pri la propedeŭtika valoro de esperanto kaj prilaboris ĝin kun la gestudentoj de la E-fako. Li kontestas la akademian aliron al la radikkaraktero, neas ĝin.
- ✓ Esploroj pri kibernetika pedagogio de prof. Helmar Frank en la Universitato de Paderborn. Li fondis Akademion Internacian de la Sciencoj (AIS) en 1985 en San Marino kun la celo oferti universitatajn studojn en diversaj sciencobranĉoj en esperanto.

Kulture esperanto plene disvolviĝis: ekzistas multaj revuoj, libroj, teatraĵoj, eventoj. La kulturaj signoj aperas en la lingvo. Esperanto ekhavis gravan rolon kiel pontolingvo en la maŝintraduka sistemo DLT.

5. ESPERANTO POST 1989 KAJ EN LA XXI-A JĈ. – RETA EPOKO

Post 1989 estis ŝanĝoj en la esperanto-movado pro la reĝimisŝanĝoj en Eŭropo. La tradicia kluba komunikado komencis cedi sian lokon al la reta komunikado. Komunikado inter diverslandanoj iĝis multe pli ofta, vigliĝis lingvaj diskutoj en diversaj forumoj, la lingvo en la tereno de informadiko multe riĉiĝas, entute komunikado iĝas pli senpera, nature aperas slango (kiel *mojosa*). Tio donas impeton ankaŭ al la evoluo de la lingvo. La influo de la angla sentiĝas ankaŭ en esperanto, la neologismoj venas nun plej ofte el ĝi.

La lingva kreemo funkcias, plioftiĝas la uzo de sintezaj verboformoj (kiel *parolintus, vendatas*), aperas proponoj por personaj pronomoj (por pli egaligi la uzon inter viraj kaj virinaj formoj, ekz. apud *li* kaj *ŝi* la neŭtrala *ŝli*), *far* en de prepozicia rolo ktp. La fundamentistoj rifuzas iun ajn evoluon en la gramatika sistemo, eĉ se la ŝanĝo detruas nenion en la fundamento, simple enkondukas novan formon – kiel la ĵus menciitaj ekzemploj. Rimarkeblas la mallongiĝo de vortoj: *ebleco* > *eblo*, *organizaĵo* > *organizo*.

La lingvoevoluo montras la vivkapablon de la lingvo. Dum la longa uzado la kulturo de la lingvokomunumo spureblas en la lingvo, eblas esplori la lingvan bildon de la mondo en esperanto kaj la speciala sinteza sistemo kontribuas al tio (Koutny 2010).

Ĉu aperis moderna prezentado de esperanto?

- ✓ PMEG (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko) – post maturiĝo en la interreto aperis en 2005 ampleksa libro. Ĝi estas bona, detala, didaktika gramatiko.

Tamen daŭre mankas moderna lingvistika priskribo de esperanto. La lingvistikaj artikoloj rilataj al esperanto traktas unuavice lingvopolitikon. Aperas artikoloj ankaŭ pri denaskismo, pri kulturaj influoj, pri frazeologio. La lingvo post travivo de pli ol 100 jarojn, ekhavas etimologiajn vortarojn (5 volumoj de Ebbe Vilborg 1989–2001 kaj la *Konciza Etimologia Vortaro de Esperanto* de André Cherpillot en 2002).

- ✓ NPIV (Nova Plena Ilustrita Vortaro) redaktita de Michel Duc Goninaz kunlabore kun multaj fakuloj aperis en 2002, post iom da modifoj en 2005, ankaŭ rete traserĉeblas ekde 2012. Ĝi estas revizio de tradicia vortaro, ne baziĝas sur korpuso.
- ✓ Esperanta Tekstaro (<http://www.tekstaro.com>) jam ekzistas, sed ĝi estas relative malgranda: multas Zamenhofaj kaj fruaj tekstoj, kaj ne reprezentas sufiĉe la nuntempan lingvouzon (lasta teksto en 2004), parolataj tekstoj tute mankas. Corpuseye (<http://corp.hum.sdu.dk/cqp.eo.html>) estas pli kompleksa, entenas multajn tekstojn ankaŭ el Vikipedio.
- ✓ Nova bildvortaro de Petro Desmet' kaj Jozefo Horváth (2012, FEL, 800 p.) prezentas aktualajn terminojn kun modernaj bildoj.
- ✓ ReVo (Reta Vortaro) estas moderna vortaro interreta bazita sur PV kaj pretigata de internacia kunlaborantaro: esperantaj difinoj kaj tradukoj en diversaj lingvoj faciligas ĝian bonan Luzon.
- ✓ Kulturo speguliĝas ankaŭ en Vikipedio (la esperanta Vikipedio troviĝas inter la plej aktivaj). Aperas ampleksaj literaturhistorioj: *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto* de Geoffrey Sutton (2008) kaj *Historio de la Esperanta Literaturo* de Carlo Minnaja

kaj Giorgio Silfer (2015) kaj Historio de Esperanto de Aleksander Korĵenkov (2005).

KONKLUDOJ

La internacia lingvo esperanto evoluas kiel la etnaj lingvoj, dum la kutima uzado en lingvokomunumo kaj taŭgas por esprimi pensojn, sentojn, spertojn kaj ilin transdoni dum skriba aŭ parola komunikado. La kulturo de de la lingvokomunumo trapenetras la lingvon. En tiu senco ĝi estas natura lingvo, ĝi evoluis de planita lingvoprojekto al plene nature funkcia, aŭtonoma lingvo. La nekontrolitan evoluon bridas la fiksitaj reguloj en la *Fundamento de Esperanto* kaj la internacia uzo.

La ŝanĝoj en la lingvo estas influataj de ekstere, de sociaj, ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj ŝanĝoj kaj de interne, de sistemaj kialoj, tio manifestiĝas ankaŭ en la kontraŭaj tendencoj de naturalismo kaj skemismo. Diversaj gravaj dokumentoj kiel gramatikoj, vortaroj kaj enciklopedioj fiksas la staton de la lingvo kiu estis prezentita en kvin etapoj de la historio de esperanto. La lingvistika analizo de esperanto povas kaj devas okazi en komparo kun aliaj naturaj lingvoj (vd. tipologian analizon en Koutny 2015, 2018).

BIBLIOGRAFIO

- Blanke D., 1999: La rolo de planlingvoj ĉe la evoluo de terminologi-sciencaj konceptoj de Eugen Wüster. In: Malovec, Miroslav (1999, Red.): *Modernaj rimedoj de komunikado*. (Serio: Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko). Dobřichovice: KAVA-PECH. 75-84.
- Blanke D., 2001: Vom Entwurf zur Sprache. En: Schubert, K. (red.): *Planned Languages: From Concept to Reality*. Interface. Journal of Applied Linguistics 15.1. 37-89.
- DucGoninaz M., 2004: Evoluo de Esperanto. Materialo por la Interlingvistikaj Studo.
- Grosjean-Maupin E. (red.), 1930: *Plena Vortaro de Esperanto*. SAT: Parizo
- Kalocsay K., Waringhien G., 1935: *Plena Gramatiko de Esperanto*. Budapeŝto: Literatura Mondo
- Kalocsay K., Waringhien G., 1980: *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. Rotterdam: UEA
- Koutny I., 2010: Esperantlingva bildo de la mondo. En: Detlev Blanke, Ulrich Lins (red.): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: UEA, 2010: 290-305.
- Koutny I., 2016: Esperantologio kaj formado de esperanto-instruistoj en universitato. En: *Prelegaro de la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto*. Red. Grosjean Mireille. ILEI 26-33.
- Koutny I., 2018: Tipologia karakterizo de esperanto kiel natura lingvo. En: Kiselman Ch. & Corsetti R. & Dasgupta P. (red.) 2018: *Aliroj al Esperanto*. KAVA-PECH, Dobrichovice.

- 129-146. <http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/dokumentoj.html>; angle: A typological description of Esperanto as a natural language. In: JKI 10: 43-62. <http://jki.amu.edu.pl>
- Kuznetcov S., 2018: René de Saussure kaj lia rolo en la lingvoscienco (Honore al lia 150-a datreveno de lia naskiĝo). *Esperanto* 2018. Majo. 106-107.
- The Language Construction Kit <https://www.zompist.com/kit.html>
- Lindstedt J., 1982: Rece4nza eseo pri Kalman Kalocsay – Gaston Waringhien: Plena Analiza Gramatiko. *Planlingvistiko* 1982/1: 10–18., 1982/3: 13–19. kaj 1983/6: 7–14.
- Liu H., 2004: Lingvistikaj konceptoj de Zamenhof. In: *Grkg Humankybernetik* 2004/4: 155-165.
- Minnaja C., La “Fundamento” centjara. https://www.academia.edu/33097981/LA_FUNDAMENTO_CENTJARA_2
- Stria I., 2013: Classification of artificial languages. JKI 8. 125-132
- Tonkin H., 2004: Lingva egaleco en internaciaj rilatoj. Lee Chong-Yeong & Liu Haitao (red.): *Al nova internacia lingva ordo / Towards a New International Language Order*. Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj / Proceedings of the Third Nitobe Symposium. 31-39.
- Yamasaki S., 2000: La aglutineco kaj la neeŭropeco. En: *De A al B. Festlibro por André Albault*. Reinhardt kaj Irmtraud Haupenthal (red.). Schliengen: Ed. Iltis. 233-246.
- Waringhien G. (red.), 1970: *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. SAT: Parizo.
- Wells J., (1978): *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: UEA-CED
- Zamenhof, L. L. 1887: La Unua libro
- Zamenhof, L. L. 1905: Fundamento de Esperanto <http://akademio-de-esperanto.org/fundamento/index.html>
- Zamenhof, L. L. 1889-1912: *Lingvaj respondoj*. <http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20zamenhof,%20l.l.%20-%20lingvaj%20respondoj.pdf>

VIVANTA LINGVO. ĈU EKZISTAS UNUECA BILDO DE LA MONDO DE ESPERANTISTOJ?

ENKONDUKO

ESPERANTO ESTAS PLANITA INTERNACIA HELPLINGVO, KONSTRUITA de L.L. Zamenhof kaj lanĉita en 1887. Dum la jaroj ĝi evoluis en kompletan lingvon kun forta parolkomunumo.¹ Esperanto-parolantoj traktas ĝin ne nur kiel simplan ilon de interkultura komunikado; ili disvolvas la lingvon kaj uzas ĝin kiel ilon de mem-identigo. La karakterizaĵoj de la lingvo ebligas klasifiki ĝin kiel proksima al naturaj lingvoj multrilate. Tial, ĉar Esperanto disvolviĝas en natura maniero, ĝi povas ankaŭ esti analizata enkadre de kultura lingvistiko, kiu ĝis nun studis principe etnajn lingvojn.

La nuna kontribuo prezentas la rezultojn de du pilotaj studoj pri la lingva bildo de la mondo (t. e. interpreto de realeco de iu komunumo, kiun oni povas pristudi analizante lingvon) de altnivelaj Esperanto-parolantoj. Ili sugestas ne nur, ke aktivaj Esperantistoj prezentas koheran mondbildon bazitan sur

1] Vidu D. Blanke, *Vom Entwurf Zur Sprache*, en *Planned Languages: From Concept to Reality*, red. K. Schubert, Brussel, Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 2001, pp. 37–89; A. Duliĉenko, *Planlingvo: inter lingvokonstruo kaj etna lingvo*, en *Studoj pri interlingvistiko: Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke = Studien zur Interlinguistik: Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag*, red. S. Fiedler kaj Haitao Liu, Dobrichovice (Praha), Kava-Pech, 2001, pp. 109–15; S. Fiedler, *On the Main Characteristics of Esperanto Communication*, en *Lingua Franca Communication*, red. K. Knapp kaj Ch. Meierkord, Frankfurt am Main, Peter Lang, 2002, pp. 53–86; I. Stria, *Esperanto as a Natural Language*, “Język, Komunikacja, Informacja”, n. 10, 2015; I. Stria, *Language Attitudes among Esperanto Speakers*, “Język, Komunikacja, Informacja”, n. 12, 2017.

la sento de aparteno al la komunumo, ĝiaj kulturo kaj normoj, sed ankaŭ, ke ekzistas terenoj, kie la bildoj estas malsimilaj kaj iliaj limoj svagaj.

LINGVA MONDBILDO

La ideo de la lingva bildo de la mondo (precize *Weltansicht*) eksplicite aperis por la unua fojo en la verkoj de W. von Humboldt en la unua duono de la 19-a jarcento. La koncepto prezentita de Humboldt, nome, ke lingvo permesas al la uzantoj formi mondvidon (*Weltansicht*) per sia propra specifa strukturo malĝuste estas traktata kiel egala kun la koncepto de *Weltanschauung*, tio estas, socie konstruitaj konceptoj pri la mondo, kiuj povas esti malsamaj en la sama lingvo (ekz. socialismaj kaj kristanaj opinioj de germanlingvaj homoj), sed la samaj en malsamaj lingvoj (ekz. liberalaj opinioj de anglaj kaj germanaj parolantoj). *Weltansichten* estas lingvodependaj kaj samtempe, kulturdependaj.²

La titola koncepto en la formo prezentata en tiu ĉi artikolo ne nur reiras al la ideoj de W. von Humboldt, sed ankaŭ, en sia interpreta formo, ĉerpas de relativismo de E. Sapir kaj B. L. Whorf. Ĝi nun estas evoluigata en la Etnolingvistika Skolo de Lublino, Pollando. La lingva bildo de la mondo (ekde nun LBM) estas:

lingvo-enradikiĝinta interpreto de realeco, kiu povas esti esprimita en la formo de juĝoj pri la mondo, homoj, aĵoj aŭ eventoj. Ĝi estas interpreto, ne reflektado [...]. La interpreto estas la rezulto de la subjektiva percepto kaj konceptado de realeco plenumata fare de parolantoj de iu lingvo; tial, ĝi estas klare subjektiva kaj homcentra sed ankaŭ intersubjektiva (socia). [...] Ĝi influas [...] la percepton kaj komprenon de la socia situacio fare de membroj de la komunumo.^{3,4}

La LBM fakte estas unu el la aro de sep interrilataj konceptoj, nome: (1) la LBM mem, (2) stereotipoj kiel ĝiaj komponantoj, (3) kognaj difinoj kiel ilo por priskribi lingvajn stereotipojn, (4) profilojn (diversaj aspektoj de la priskribata koncepto, “faskoj” de ĝiaj ecoj), (5) valorojn de la perceptanta subjekto (ankaŭ en la senco de *Weltanschauung*), (6) la vidpunkto kaj perspektivo de la subjekto, kaj fine (7) la perceptanta subjekto mem (t. e. komunumo). La plej grava punkto estas la dinamika karaktero de la LBM, kiu estas socia, ŝanĝanta interpreto.

2] J. W. Underhill, *Humboldt, Worldview and Language*, Edinburgh, Edinburgh University Press, 2009, p. 55ff.

3] Ĉiuj citaĵoj tradukitaj de originaj lingvoj fare de aŭtorino.

4] J. Bartmiński, *Językowe Podstawy Obrazu Świata*, Lublin, Wydawnictwo Uniwersytetu Marii Curie-Skłodowskiej, 2012.

Fragmentoj de la bildo estas rekonstruitaj per priskribo de stereotipaj juĝoj (profilado) pri objekto, kiuj kuniĝas en faskoj (facetoj) por krei kognan difinon de la priskribata objekto / nocio. La strukturo de la difino dependas plejparte de la vidpunkto kaj perspektivo de la parolanta subjekto. Ĉi tio indikas, ke nocioj ne povas esti reproduktataj kaj rekonstruitaj sen subjekto.

La Lublina Skolo premisas, ke la LBM formiĝas en parol- kaj kultur-komunumo. Nur vivanta lingvo kun forta bazo povas sekve estis analizata kadre de tiu ĉi teorio. Tiun ĉi bazan kondiĉon de la komunumo kun komuna kultura fono Esperanto certe plenumas.

METODO

La premisoj de esplorado de la LBM plejparte evoluigis en la projekto EUROJOS⁵, kiu nun estas daŭrigata kiel internacia projekto EUROJOS-2. La metodika instrukcio distingas plurajn fontojn de materialo. La datumoj devas esti eliritaj el:

- vortaroj (nur bazaj, ne specialigitaj difinoj, kolokaĵoj, citaĵoj ktp.),
- tekstoj kaj tekstaroj (ĉirkaŭ 200-300 kuntekstoj stile neŭtralaj, balancitaj koncerne al politika orientiĝo),
- enketoj.

La sistemaj datumoj devus inkludi la rilatojn leksiko-semantikajn kaj paradigmatajn kaj sintagmajn (ekz. hiperonimojn kaj hiponimojn, malojn, sinonimojn, originalaj proverbojn).

La lasta paŝo en la proceduro estas enketo kun nur unu deviga demando, nome “Laŭ via opinio, kio estas vera X?” Bartmiński diferencas inter “idealaj”, “tipaj” kaj “veraj” (“vera” korespondas al “reala” de Lakoff).⁶ “Ideala” reprezentas modelan X-on (preskriba aliro), “tipa” reprezentas averaĝan X-on (priskriba aliro), dum “vera” kombinas ambaŭ.

Alie, la enketilo ankaŭ povas enhavi malfermitajn demandojn. Ĉi tiuj inkluzivas: provizi nur unu vorton plej bone priskribantan la X-on, listigi la objektojn de la X, aldoni substantivon al adjektivo, aldoni sinonimajn esprimojn aŭ plenigi per la mankantaj vortoj (testo de kolokado).⁷

5] ‘EUROJOS’, *Językowo-Kulturowy Obraz Świata Słowian i Ich Sąsiadów Na Tle Porównawczym (EUROJOS)*, 2008, <<http://ispan.waw.pl/default/pl/projekty-naukowe/eurojos>>.

6] J. Bartmiński, *Aspects of Cognitive Ethnolinguistics*, red. J. Zinken, trad. A. Glaz, London; Oakville, Equinox, 2012, pp. 132–48, 178–98.

7] Vidu J. Bartmiński, *Aspects of Cognitive ...*, cit., pp. 132–48, 178–98.

REALIGO

Mi ŝatus prezenti du similajn etnolingvistikajn enketojn (ambaŭ esploras lingvajn mondvidojn de progresintaj esperantistoj; ambaŭ plene en Esperanto), tamen malsamajn tiusence, ke unu celas esplori *Weltanschauung* kaj la dua fokusiĝas prefere pri *Weltansichten* de la parolantoj. La du pilotaj studoj estis:

- E1: dum la 100a UK (25a de Julio – 1a de Aŭgusto 2015, Lillo, Francio) kaj tra la retlisto de Interlingvistikaj Studoj ĉe AMU (respondis 32 progresintaj Esperanto-parolantoj inkluzive du denaskulinoj),
- E2: nun daŭranta perreta enketado enkadre de EUROJOS-2 kun I. Koutny (ĝis 12.09.2017 respondis 37 progresintaj E-parolantoj, neniu denaskulo).

Mi celis esplori:

- kiun influon havas denaskaj lingvoj kaj kulturoj sur perceptaj kategorioj (ekz. koloroj, plantoj kaj bestoj),
- ĉu E-aj kulturritataj konceptoj estas videblaj en la lingvo kaj kompreneblaj por E-parolantoj,
- ĉu E-parolantoj similas ideologie pro la interna ideo.

Ambaŭ enketiloj enhavis 7 kompleksajn demandojn pri personaj datumoj en parto II. Por kontroli la nivelon de Esperanto rilate al la deklarita nivelo la partoprenantoj respondis ankaŭ pri la ofteco de uzado de konataj lingvoj kaj la preferata lingvo en ĉiutaga uzo por diversaj agadoj. Aldone, E2 demandis pri ilia movadumado. En parto I (pri la LBM) E1 enhavis 16 kompleksajn malfermitajn demandojn: “kompletigu”, “listigu”, la SED testo ktp. dum E2 enhavis 24 demandojn en 7 grupoj.

EKZEMPLOJ

La demandoj de E1 estis kreitaj por kovri plurajn interesajn terenojn.⁸ Ili koncernis tipajn kognajn kategoriojn (prototipecon, ekz. ‘Listigu 5 bestojn kaj 5 legomojn’), kulture malsamajn lingvajn stereotipojn (personigon de la suno, vivon ktp., simbolajn valorojn de bestoj kaj plantoj, stereotipojn de koloroj), leksikigojn kaj kolokaĵojn, Esperantan kulturon kaj fine la memstereotipon de Esperantisto.

8] Por detaloj vidu I. Stria, *Inventing Languages, Inventing Worlds. Towards a Linguistic Worldview for Artificial Languages*, Poznań: Wydział Neofilologii UAM w Poznaniu, 2016 (Dysertacje Wydziału Neofilologii UAM w Poznaniu, 29); aŭ I. Stria, *Haben Esperanto-Sprecher ein gemeinsames Weltbild? Zu den Ergebnissen einer Fragebogenstudie*, en *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*, red. C. Brosch kaj S. Fiedler, Leipzig, Leipziger Universitätsverlag GmbH, 2017, pp. 103–10.

Prototipeco de plantoj kaj bestoj (D2, 5 kaj 12) estis malfacila tasko por studi. Esperanto-parolantoj ne kutime okupiĝas pri tiu tereno kaj do ofte ne konas la bezonatajn nomojn. En pluraj kazoj ili klare transprenas el siaj denaskaj lingvoj. Simile, koloroj (D1 ‘Kia estas la koloro de...’ kaj 11 ‘Kio / kiu havas ĉi tiun koloron?’) estas konate variu inter lingvoj kaj kulturoj. La enketintaro konsistis en ne sufiĉe granda nombro da parolantoj de lingvoj kaj kulturoj ekster Eŭropo por konfirmi la supozon, ke Esperantistoj ne kategorias kolorojn sammaniere. Plie, metaforaj valoroj de bestoj kaj plantoj en D10 kaj D13 estas malsamaj de lingvo al lingvo. Ĉi tiu pilota studo montris, ke Esperantistoj transprenas multe el siaj denaskaj lingvoj en ĉiuj ĉefaj kampoj, krom la kultura.

Tamen, demandoj pri Esperanto-kulturo atestas la forton de Esperanto-kulturo inter aktivaj Esperantistoj, kvankam ĝi ne estas instruata kiel parto de eduka sistemo. Plie, la stereotipoj, kiuj aktivaj Esperantistoj havas pri si mem, estas sufiĉe konsekvencecaj kaj fortaj. Ekzemple, demando 4 temis pri E-kulturo:

D4: Priskribu mallonge (se eblas, per unu – du vortoj)!

a. Li ĉiam estis aktiva esperantisto, sed ĵus forlasis la movadon. (Kion li faris?)

[...]

c. Kiam ili estas inter esperantistoj, ili ofte parolas en sia denaska lingvo. (Kion ili faras?) [...]

La atenditaj respondoj estas ‘kabe(iĝ)’⁹ kaj ‘krokodili’¹⁰. El 31 homoj, kiuj respondis al ĉi tiu demando, nur la du movade neaktivaj denaskulinoj ne uzis la unuan nocion (ambaŭ uzis iun parafrazon: ‘ĉesis esti aktiva’ kaj ‘perdis intereson’). Ĉiuj 31 respondintoj konis la esprimon ‘krokodili’. Ĉi tio ne estas neatendita, ĉar la vorto estas vaste konata ankaŭ ekster Esperantujo kiel ekzemplo de originala Esperanto-kulturo.

Kvankam iuj partoprenintoj ne respondis kiel atendite, multaj respondoj venis el la literaturaj verkoj de Zamenhof kaj lia kolekto de proverboj, Esperantaj diraĵoj kaj kulturaj ŝlosilvortoj. La respondoj konfirmis la supozon, ke denaskaj parolantoj ne povos rekoni iujn konceptojn, se ili ne movadumas (ĉi tion ankaŭ montris Koutny¹¹). Evidentiĝis, ke Esperanta kulturo estas profunde enradikiĝinta inter aktivaj Esperantistoj.

9] De la inicialoj de Kazimierz Bein (pseŭdonimo Kabe), kiu estis tre konata Esperantisto ĝis kiam li subite kaj neatendite tute forlasis la lingvon.

10] Paroli sian denaskan lingvon kiam oni devus uzi Esperanton.

11] I. Koutny, *Esperantlingva bildo de la mondo*, en *La arto labori kune: festlibro por Humphrey Tonkin*, red. D. Blanke kaj U. Lins, Rotterdam, Universala Esperanto-Asocio, 2010, pp. 290–305.

Demandoj 6, 7 kaj 8 koncernis la memstereotipon de Esperantisto.

D8: Kia estas vera Esperantisto?

D6: Kompletigu! “Johano estas arda Esperantisto, sed...”

El ĉi tiuj du demandoj la indekso de stereotipigo (Si) de la du plej oftaj trajtoj (‘uzas E-on’ kaj ‘bone konas E-on’) estis tre alta (29.85), porkompare Si por germano estis 18,16 – ege forta stereotipo inter poloj¹²).

D6 postulis de la enketintoj imagi stereotipan Esperantiston kaj aldoni kontrastan trajton. El la 6 plej oftaj, 4 trajtoj koincidas kun tiuj de “vera” Esperantisto. La novaj ecoj ‘plibonigas konon de Esperanto’ kaj ‘ne fanatika’ povas esti klarigitaj per la fakto, ke la demando uzis la modifilon “arda”, tiel ke la partoprenantoj pensis prefere pri “ideala” Esperantisto.

En D7, la partoprenantoj estis petataj listigi kulturajn simbolojn de Esperantisto. La plej oftaj listeroj estis la verda stelo (26), sekvata de la verda flago (20) kaj la himno *La Espero* (14).

En E1 evidentiĝis, ke la kono de Esperanto-kulturo inter movaduloj montriĝas kiel sufiĉe homogena aro de trajtoj.

En E2 ni demandis pri, interalie, 1. justeco kaj 2. egaleco. Aliaj demandoj koncernis patrinon, familion, amon, amikecon, toleremon kaj lingvon.

1. Kio, laŭ vi, estas la esenco de vera justeco?

Por 15 personoj justeco egalas al egaleco kaj samaj ŝancoj. 11 partoprenintoj pensis pri objektiveco (‘juĝo de situacio laŭ cirkonstancoj’; ‘doni al tiuj, kiuj meritas’), tamen 7 pri (ekonomia) kompenso por “malfortuloj”. Tiuj ĉi respondoj sugestas, ke justeco devus prefere esti traktata kiel *Weltanschauung* laŭ la politika orientiĝo de partoprenantoj.

2. Kio, laŭ vi, estas la esenco de evidenta maljusteco?

La respondoj al tiu ĉi demando konfirmis tiujn de la antaŭa (16: ‘malegaleco, malsamaj ŝancoj, diskriminacio’; 9: ‘malobjektiveco’; 6: ‘manko de (ekonomiaj) rimedoj kaj helpo’). Aperis tamen unu nova trajto, nome ‘sufer(ig)o, subpremo’ (5 respondoj).

Kio, sekve, estas egaleco? 24 (!) respondintoj skribis, ke ĝi estas samaj ŝancoj kaj oportunoj, respekto kaj komprenemo. Nur 4 respondoj temis pri ekonomia situacio kaj same 4 pri efektiveco de kapabloj (objektiveco).

12] J. Bartmiński, *Aspects of Cognitive ...*, cit., p. 182.

Kvankam la limoj de tiuj nocioj estas svagaj, ŝajnas, ke iliaj kernoj estas stabilaj kaj fortaj. La rezulton oni povas interpreti kiel relative koheran.

REZULTOJ

E1 montris, ke la kampoj, en kiuj la LBM estas transprenata de denaskaj lingvoj estas: kognaj kategorioj kiel koloroj aŭ prototipeco de plantoj kaj bestoj. Tamen, la bildo de Esperantisto ŝajnas esti unueca bone evoluinta aro de trajtoj. La memstereotipo estas solida kaj temas pri la lingvo. La plej oftaj trajtoj en la SED-testo konfirmas la vidon de “vera” Esperantisto kiel parolanta la lingvon flue kaj aktiva por Esperanto kaj la Movado.

E2 sugestas, ke justeco estas vidata malsame, ĉar Esperanto-parolantoj ne konsistigas homogenan grupon kaj devenas de diversaj medioj. Ĝi devus prefere esti traktata en kategorioj de *Weltanschauung* laŭ la politika orientiĝo de partoprenantoj. Dume egaleco estas konsekvence prezentata kiel samaj ŝancoj kaj oportunoj.

Unufle, demandoj pri politikaj opinioj aŭ ideologioj ne estis atendataj produkti unuforman mondvidon, ĉar Esperantistoj devenas de diversaj fonoj kaj apartenas al pluraj parolkomunumoj samtempe. Aliflanke, ĉi tiuj mondvidoj ŝajnas esti surprize konsekvencaj kaj subtenas la observon, ke Esperantistoj elektas paroli la lingvon pro ĝia “interna ideo”¹³ kaj ke ili same elektas sian identecon de Esperantisto.

KONKLUDOJ

Ĉi tiuj pilotaj studoj implicas, ke ne-denaskaj Esperantistoj vere transprenas siajn LBMOjn de siaj denaskaj lingvoj en pluraj kampoj. En la kognaj terenoj Esperanto klare restas L2 (aŭ L3..., por ne uzi la markitan etiketon de “fremda” lingvo). Tamen, samtempe ekzistas homogenaj, kulture enradikiĝinta LBM de Esperanto, komprenebla por ne-denaskaj parolantoj. Esperanto estas traktita kiel internacia kulture neŭtrala helplingvo de ĝiaj lernantoj. Tamen ili nature fariĝas parto de la komunumo per mergiĝo en la propra kulturo de la lingvo. Oni povas konstati, ke movadanoj fariĝas komunumo de L2-uzantoj, kiuj formas sian identecon kiel multkompetentajn kaj kunlaborantajn parolantojn de internacia lingvo.¹⁴

13] I. Caligaris, *Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese: una ricerca sul campo sulle identità esperantiste*, Ariccia, Aracne Editrice, 2016, ĉ. 5.

14] Vidu ankaŭ S. Fiedler, *Lingua-franca-Kommunikation – wirklich ein Fall des Let-it-pass? (Eine Analyse von Reparaturen in der Esperanto-Kommunikation)*, en *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*, red. C. Brosch kaj S. Fiedler, Leipzig, Leipziger Universitätsverlag GmbH, 2017, pp. 57–71; I. Stria, *Language Attitudes...*, cit.

Evidente, la mondvido de la komunumo ne povas esti traktata plene samnivele al tiuj en etnaj evoluintaj lingvoj, kiuj estas akiritaj de naskiĝo, instruitaj en lernejoj kaj uzataj ĉiutage. Esperantistoj ne havas komunan kognan *Weltansicht* pro siaj tre malsamaj fonoj.

Tamen, la mondvido rilatanta al la memstereotipo kaj la komuna kultura bazo estas enradikiĝinta. Interese, la fakto, ke ankaŭ la *Weltanschauung* de progresintaj Esperantistoj estas surprize pli malpli kohera, rezultas el la unuarangaj motivoj, por kiuj multaj lernas Esperanton, tio estas, la interna ideo (la espero disvastigi pacon surbaze de kulture neŭtrala lingvo) aŭ la Praga manifesto (dokumento, kiu starigas vaste kundividitajn principojn de la Esperanto-movado, inter aliaj, demokratio, lingvaj rajtoj, lingva diverseco).

Oni singarde povus konkludi, ke la kerno de la Movado prezentas koheran bildon de la mondo bazitan sur la sento de aparteno al la komunumo, ĝia kulturo kaj normoj. Aliflanke, ĉi tiu kohereco de LBM povas atesti la komunan identecon de aktivaj Esperantistoj kaj ebligas konfirmi ilian statuson kiel parolkomunumo.

CENT JAROJN POSTE: LA ZAMENHOFA FILOZOFIO KAJ ESPERANTO

Resumo

Zamenhof laŭ Unesko estas granda personeco de la homaro pro tio, ke Unesko proklamis 2017 Zamenhofa Jaro, ĉar la aŭtoro de Esperanto forpasis en 1917. Kio postrestas de la Zamenhofa penso hodiaŭ, post cent jaroj ekde lia forpaso? En ĉi tiu teksto oni priskribas la fundamentajn tekstojn de Hilelismo kaj Homaranismo en komparo, kaj oni celas eltiri instruojn por la homoj vivantaj en la dudek-unua jarcento.

1. ENKONDUKO

LA FIGURO DE ZAMENHOF ESTAS LA PLEJ STUDATA EN LA HISTORIO DE Esperanto por tute evidentaj kialoj: li estas la fondinto de la ‘lingvo internacia’, por uzi la originan nomon de lia planlingvo. Tamen, la ‘lingvo internacia’ ne estis por li la ĉefa parto de lia projekto pri profunda reformo de la homaro sed nur la unua ŝtupo. Fakte, Esperanto devintus esti nur la lingva instrumento por realigi la unuiĝon de la homaro en ‘unu granda rondo familia’, alia fama Zamenhofa esprimo. Male, devintus esti Hilelismo, t.e. la ‘pontoreligio’, la ĉefmotoro kiu efektivigu tian projekton, kiu tute nature venus – laŭ la Zamenhofa opinio – kiel dua ŝtupo.

Ni nomu ĉi tie ĝeneralsence la tutan Zamenhofan projekton – Esperanto inkluzivite – *filozofio*, kies esenca karaktero estas etika kaj politika, kaj do ja koncernas la konvenan manieron vivi kun la aliuloj. La celo ĉi tie estas priskribi la ĉefajn karakterojn de la Zamenhofa filozofio, kun aparta atento al la diferencoj inter Hilelismo, kronologie la unua versio, kaj Homaranismo, la dua – kaj lasta – versio. Post tiu ĉi prezento, ni klopodu analizi kio restas aktuala de la Zamenhofa filozofio en la nuntempa mondo, alivorte kio jam realiĝis, kion oni devas an- koraŭ realigi kaj kio restas tute utopiisma.

1] Miaj elkoraj dankvortoj pro la provlegado de la manuskripto iras al: Fabrizio A. Pennacchetti.

2. KIAL ESPERANTO NE SUFIĈAS

Kiel konate, Esperanto publikiĝis en 1887 – antaŭ 130 jaroj – kaj ĝi eliris la unuan fazon kiam serioze interesiĝis pri la lingvo la francoj. Laŭ la sociologia esploro de Garvía (2015), ekde jaro 1900 estis pli da esperantistoj en Francio ol en la cara teritorio – Ruslando, kiu inkluzivis ankaŭ grandan parton de la nuntempa Pollando, kie siatempe loĝis la familio Zamenhof.

Ekde la unuaj jaroj de la dudeka jarcento, Esperanto ŝajnis esti sufiĉe stabila por ne pereci samkiel Volapuko. Tiu ĉi fakto certe stimulis Zamenhof pripensi Hilelismon pliprofunde, kiel li sin konfidis per privata letero kun unu el la fruaj ok verkistoj de la Esperanta lingvo (Sutton 2007), lia juda amiko Abraham Kofman. Ĉi tiu letero, verkita la 28an de majo 1901, enhavas rimarkindajn ideojn:²

Se eĉ ĉiuj akademioj de la mondo akceptus Esperanton, se eĉ milionoj da personoj ĝin uzadus, nenio garantias, ke en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! Se ĝi unu fojon “eliros el la modo”, ĝi plej rapide pereos por ĉiam. Lingvo Internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan.

Centoj da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multe pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popoloeto havas vivon multe pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj. Jes, mi estas profunde konvinkita, ke nek solvo de la hebrea demando, nek enradikiĝo de lingvo neŭtrala estos iam ebla sen hilelismo, t. e. sen kreo de neŭtrala popolo. (OV: 323)

Klaras, ke laŭ Zamenhof tiu ĉi ‘neŭtrala popolo’ devus paroli Esperanton kiel familian, heredan lingvon, kaj ke kerno de tiu ĉi popolo estu la judoj. Tiu ĉi ideo malfermas du problemojn al Zamenhof: unue, kiel rilati Esperanton al la ‘hebrea demando’; due, kiel rilati Esperanton al Hilelismo. Pasas la jaroj, kaj la laboro por Esperanto iĝas pli prema kaj forta. En 1905, post la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marzo, Zamenhof estis preskaŭ certa, ke la estonteco de la lingvo ne plu estas en grava danĝero. Li do sin konfidis kun alia grava juda amiko, kiu subtenas Esperanton, Émile Javal. En la 24a de septembro 1905 Zamenhof skribas:

2] Ĉiuj eltiraĵoj venas de la volumo *Originala Verkaro* (Dietterle 1929), kaj por simpleco mi indikos ĝin sekve tra la teksto per la siglo OV, krom alia indiko.

Tiu ĉi malgranda popolo, kiu havus sian konstantan kulturen centron en unu el la urboj de la neŭtrala Svisujo, prezentus fundamentan grupon, kiu iom post iom ensorbus en sin ĉiam pli da homoj el ĉiuj nacioj kaj estus la komenco de la estonta lingve kaj religie unuigita homaro. (Kanzi 1990: 1596-1597).

En 1905 estis jam sufiĉe klara, ke la nova ŝtato de Israelo realiĝos en Palestino, kiel proklamite en la Unua Cionisma Kongreso en 1897. Zamenhof komencas meti distancon inter si kaj la destino de la juda popolo: neŭtrala popolo havu sian naturan patrujon en neŭtrala lando, Svislando; la hebrea demando ne estas plu menciita. La dua Universala Kongreso, planita en Ĝenevo en 1906, estus do la ideala loko kaj momento por lanĉi la duan ŝtupon de la projekto, t.e. la pontoreligio.

Unue li publikigis broŝuron en la rusa, titoligita Hilelismo; poste, en la sama jaro, li publikigis alian version kun la titolo Homaranismo, celitan al la esperantistoj. Evidente malfacile li povis doni la saman mesaĝon al du diversaj celgrupoj, nome la ruslandaj judoj kaj la esperantistoj. Ĉiukaze, li klarigas, ke:

Oni ne devas intermiksi la hilelismen kun la esperantismo! Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed tute ne identaj. Oni povas esti bonega esperantisto kaj tamen kontraŭulo de la hilelismo. (OV: 325)

Laŭ mi indas rimarki la lastan frazon. Ŝajnas, ke li anticipu sciis, ke alvenos malfavoraj reagoj al Hilelismo. Tuj sube, li klarigas pri kio la broŝuro temas.

La homaranismo [vidu sekvan sekcion pri la ŝanĝo] estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj naciareligiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale-homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. (OV: 324)

Zamenhof asertas, ke unuaflanke Hilelismo respektas la diversecon de nacioj, kiuj tiam estis difinitaj ĉefe per lingvoj kaj religioj, sed aliflanke agas kiel antidoto al ĉiaj naciismoj kaj ksenofobioj, por uzi nuntempaj esprimoj.

Krome, notindas, ke du el la tri principoj venas de la Franca Revolucio: tie estis 'libereco, egaleco, frateco', ĉi tie oni legas 'frateco, egaleco, kaj justeco'. En la Zamenhofa versio, anstataŭ 'libereco' estas 'justeco', kaj krome, 'frateco' aperas unuavice, male al la originala versio. Do, Hilelismo prezentiĝas laŭ la intencoj de la aŭtoro kiel laika kaj laikiga programo, etika kaj politika.

3. EKDE HILELISMO AL HOMARANISMO

Zamenhof prave timis, ke la reagoj al Hilelismo povu esti malfavoraj. Famas la forta kontraŭstaro publike farita de la katolika pastro, Aleksandro Dombrovski, fakulo pri matematiko, pionira esperantisto kaj litova nacia patrioto, aparte grava en la historio de la kultura vivo de Litovio ĝis la morto en 1938. Oni ne forgesu, ke tiam Litovio estis nur geografia esprimo.³ Nehazarde kelkaj pioniraj esperantistoj kiuj batalis por la rekono de siaj religiaj kaj lingvaj identecoj povis malfavori Hilelismon, ĉar la laikaj elementoj en ĝi estis esprimitaj per religia lingvaĵo, tiel, ke Hilelismo povis aperi kiel rivalo de kristanismo. Kiam Zamenhof komprenis tion, li ellaboris denove sian proponon, kaj li bezonis sep jarojn antaŭ ol publikigi novan version de la propono, ĉi-foje klare nomita Homaranismo, esprimita per pli kohere laika lingvaĵo. La lasta versio de lia propono – ne plu religiema – aperos en Madrido en 1913.

Sed, ĉu estas alia fonto inter 1906 kaj 1913 kiu povas helpi al ni kompreni kial Zamenhof sentis la bezonon revizii sian proponon? Bonŝance, jes, sed iom paradokse ĉi tiu fonto estas en la angla. Temas pri la ununura intervjuo kiun Zamenhof koncedis al ĵurnalo en sia tuta vivo. La ĵurnalo estas *The Jewish Chronicle*, Juda Kroniko, kaj la intervjuo okazis tuj post la tria Universala Kongreso en Kembriĝo, en la somero de 1907. La intervjuanto estas rabeno de juda reformkongregacio Isidor Harris. Grandan spacon li donis al la kerno de la Hilelisma propono, kiun la intervjuato identigas kun la formiĝo de ‘normala sekto’, kiu eĥas la esprimon ‘neŭtrala popolo’ pri kiu ni legis en la privata letero de 1901 menciita dekomence. Sube aperas eltiro en la angla originalo kaj en la esperantigo – kiu aperis origine en *La Nica Literatura Revuo* – fare de Maimon, la aŭtoro de la ĉefverko *la kaŝita vivo de zamenhof*⁴

Inasmuch as all Jews have a history in common, and the peoples will have nothing to do with us, we ought to beware of calling ourselves 'Russians,' 'Germans,' etc., and we should call ourselves 'Jews' by nationality; always remembering that, unlike other nationalities, ours is neither local nor ethnological, but only ideal. It stands to reason that we cannot reform the whole Jewish people at one step. So we ought to create in Judaism a normal sect, and strive to bring it about that that sect may come, in course of time—say, after 100 or 150 years—to include the whole Jewish people. We should then become a powerful group. Nay, more, we should be in a position to conquer the civilised world with our ideas, as the Christians have

3] Laŭ la esploro de Lins (2017), Dombrovski estis kondamnita en 1889 al kvinjara ekzilo en norda Ruslando ĉar li malpermesis al siaj gefiloj iri al ortodoksa lernejo.

4] La aŭtoro verkis la tutan libron sen uzi majusklojn.

hitherto succeeded in doing, though they only commenced by being a small Jewish body. Instead of being absorbed by the Christian world, we shall absorb them; [but the Russian Jews] had not the courage to help me in organising such a sect as I contemplated. There is a Russian proverb that [says] 'One man in a camp does not make a soldier.' So I have long since abandoned my scheme as unworkable, and my efforts are now devoted to the cognate object of furthering the movement which I have called Esperantism.

Pro tio, ke ĉiuj hebreaĵoj havas komunan historion kaj la popoloj ne volas komunikiĝadi kun ni, ni tute ne nomu nin rusoj, germanoj ktp, sed nomu nin ĉiam hebreaĵoj laŭ nacieco. Kaj ni bone memoru, ke nia nacieco, malsimile al aliaj, estas nek loka nek etnologia, sed pure ideo. Estas afero tute komprenebla, ke ni ne povas reformi la tutan hebrean popolon per unu fojo. Tial ni devas krei normalan hebrean sekton en la judismo kaj klopodi, ke tiu sekto multiĝu kaj kresku tiamaniere, ke kun paso de la tempo ni diru: post 100-150 jaroj – ĝi ensorbos en sin la tutan hebrean popolon. Tiam ni estos potenca grupo. Eĉ pli, ni povos akiri per niaj ideoj la tutan civilizitan mondon, kiel ĝis nun la kristanoj kun sukceso faris, kvankam ili komencis kiel malgranda hebrea grupo. Anstataŭ esti ensorbitaj en la kristana mondo, ni ĝin ensorbos. [Sed] mi trovis neniun, kiu volis subteni min, por starigi la sekton, kiun mi celis fondi. Ekzistas rusa proverbo: "Unu soldato militon ne faras". Pro tio mi jam de longe forĵetis tiun projekton, kiu montriĝis nepraktika, kaj mi laboradas nun per mia tuta forto por simila celo, nome, por la movado, al kiu mi donis la nomon "Esperantismo".

Unuflanke, la judaro prenis la direkton de nacia revigliĝo malsama ol la Zamenhofa ideo, ke judismo estu ĉefe se ne nur nacieco 'sole ideala', aliflanke la ideo absorbi kristanismon povis nur pravigi la oponentajn reagojn fare de esperantistoj kiel Dombrovski.

Ĉiukaze, malgraŭ la asertoj en la intervjuo en jaro 1907, Esperanto kaj esperantismo ne sufiĉis al Zamenhof, do li reellaboris profunde sian filozofion, ĉi-foje kun la celo esti akceptata fare de la esperantistaro kiel celgrupo. En la sekvo, ni do konsideru valida la tekston de 1913, kiel la plej kompletan version de la Zamenhofa filozofio, dum la antaŭajn versiojn ni vidu nur sporade per kontrasto, por pli bone kompreni ĝian evoluon.

1. Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

4. AKTUALECO DE LA ZAMENHOFA FILOZOFIO

Tuj supre oni povas legi la unuan principon de Homaranismo el la dek entutaj. La unua subfrazo estas rekta traduko de la latina esprimo *homo sum*, atribuita al Terencio⁵, kiun Zamenhof uzis kiel ka- ŝnomon. Do, Homaranismo havas sian radikojn en la klasika humanisma tradicio.

La dua principo komencas per la sekvaj vortoj: “mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj.” Mi nomas ĝin ekde nun principo de *universala egaleco*, kaj ĝi estas kvazaŭ natura konsekvenco de la unua. Oni povas diri, ke formale ĝi estas agnoskita de la Unuiĝintaj Nacioj en simila formo: jen mesaĝo de Zamenhof kiu rekte nerekte alvenis ĝeneralan rekonon, almenaŭ teorie. La tria punkto priskribas kion oni nomas nuntempe *principo de teritorieco*:

3. Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas; [...]

Same kiel la universala egaleco, la principo de teritorieco, kie civitanoj estas egalrajtaj laŭ deveno, sekso, aĝo, religio, estas sufiĉe larĝe agnoskita.

4. Mi konscias, ke ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti nomon neŭtrale-geografian, sed ne la nomon de ia gento, lingvo aŭ religio, ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas ankoraŭ multaj landoj de la malnova lando, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia deveno. [...]

Male, la kvara principo, pri la neŭtralaj landonomoj, estas komplete utopiisma. En la antaŭa versio de lia propono Zamenhof donis ekzemplojn de neŭtrale-geografiaj landonomoj: ‘Svisujo, Belgujo, Aŭstrujo, Kanado, Meksiko, Peruo; Peterburgregno, Parizregno; Algerio, Varsovilando.’ Eĉ en la plej ĝisostula esperantista revo, oficialigi Esperanton kiel ĉies duan lingvon – ekzemple per la Unu- iĝintaj Nacioj – Esperanto ne anstataŭus la aliajn lingvojn en la publika lingva pejzaĝo, plej bonŝance ĝi iĝos kunoficiala kaj la nomoj estus dulingvaj, kiel ekzemple en Sudtirolo. Ekzemple, neniam neder- landanoj akceptos kiel ununuran nomon por sia patrujo ‘Amsterdamlando’! Analoge oni povas argumenti pri la principoj por la neŭtralaj nomoj.

5] Grava romia verkisto, Terencio estis sklavo, poste liberigita. Li estas ĝenerale konsiderata la fondinto de la humanista kulturo.

Pli efektiveblaj estas la principoj ses kaj ok, ĉar ili postulas ŝangon en la percepto de propra nacia, lingva kaj religia identeco. Neniel oni rajtas konsideri identecon Di-jure pravigita kaj pro tio aŭtomate pli grava ol ĉiuj aliaj, ĉar tio implikis malrespekton al la fundamenta principo de Homaranismo, “mi estas homo”, *homo sum*.

La deka kaj lasta principo koncernas la rilaton kun la religio, kaj ĝi estas dividita en tri subpartoj. Simile al la rilato kun la patriotismo, aparteno al eklezio estas akceptebla nur ĝis la punkto kiam ĝi malpermesas al la individuo ‘malami aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia.’

Zamenhof nomas Dion ‘nekomprenebla Forto’, por ĵeti ponton inter kredantoj kaj nekredantoj. En filozofiaj terminoj, li povas esti difinita *diisto*, tio estas homo kiu kredas en supera persona Estaĵo, kies trajtoj ne estas homformaj. Lia Dio ne similas al la Dio de Spinozo: *Deus sive natura*, latine por ‘Dio alivorte naturo’ ĉar Dio estas persono. En la dua subparto oni povas legi eĥojn de la instruoj de Jesuo kaj Kant: ‘agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi: ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn.’ Je la fino, estas ankaŭ klara mencio al libercredantoj. Ŝajnas al mi, ke la ideala homaranisto laŭ Zamenhof estu aŭ milda kredanto, prefere diisto aŭ akcepteble agnostikulo – li eksplicite mencias ateismon kiel nuran opcion.

Ni ne scias, ĉu Zamenhof sciis pri la vivhistorio de Auguste Comte, la fondinto de pozitivismo, kiu en la lasta fazo de sia vivo provis fondi novan religion bazata sur Scienco. Certe pro tiu ĉi klopodo Comte restis tre sola je la fino de sia vivo. Tio feliĉe ne okazis al Zamenhof, ĉar danke al la vivanteco de Esperanto li trovis aŭskultantaron kiu ankoraŭ vivas post cent jaroj, en 2017, kiel atestas ĉi tiu okazo.

Ni vivas en epoko kiam malrespekto, maltolero kaj persekuto de alireligianoj kaj alinacianoj denove fortiĝas pro timo kaj nesekureco. Lerni Esperanton kaj praktiki ĝin Homaranisme estas vojo miaopinie pli kaj pli aktuala. Mi volas fini mian intervenon per la sekvaj vortoj de Zamenhof, sen komentoj

[...] laŭ miaj konvinkoj, mi estas “homarano”, kaj mi ne povas ligi kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. [...] Estas vero, ke la nacionalismo de la gentoj premataj – kiel natura sindefenda reago – estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de la fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de la malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

PRI LA AŬTORO

Federico Gobbo (1974) estas ordinara profesoro en la Universitato de Amsterdamo por la speciala katedro Interlingvistiko kaj Esperanto. Li estas ankaŭ vizitanta profesoro en la Universitato de Torino.

AGNOSKO

La ideoj kaj opionioj esprimitaj en ĉi tiu publikaĵo apartenas al la aŭtoro nur; ili ne necese koincidas kun la sponsoroj de la katedro en la Universitato de Amsterdamo, nome Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo. La esploro portanta al ĉi tiuj rezultoj ricevis financadon de la Sepa Kadroprogramo de la Eŭropa Unio sub stipendi-akordo n-ro 613344 (Projekto MIME).

BIBLIOGRAFIO

- Garvia R., *Esperanto and its rivals: the struggle for an international language*, Penn Press, 2015.
- Dietterle J. (red. 1929), *L. L. Zamenhof: Originala Verkaro*, Ferdinand Hirt & Sohn Esperantofako, 1929.
- Itô K. (red. 1990), *Plena verkaro de L. L. Zamenhof: Ĝis la homaranismo 1896-1906*. Ludovikito.
- Lins U., *La danĝera lingvo*, Universala Esperanto-Asocio, 2017.
- Sutton G., *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, Mondial, 2007.

